

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, 69 Wybalena Grove, Cook, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, 69 Wybalena Grove, Cook, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 194 (274)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1982

---

## FINFINE DENOVE EN ADELAJDO

Vic-Guberniestro Sir Walter Crocker malfermis la 23-an  
Aŭstralian Esperanto-Kongreson

Sepdek jarojn post la okazigo de la 1-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso. okazis inter la 2-a kaj 9-a de januaro, 1982, la 23-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Adelajdo.

Adelajdo, jam mondkonata urbo pro la Art-Festivaloj, estas ideala loko por tiaj kunvenoj, ne nur pro la vidindaĵoj, sed pro sia geografia situacio preskaŭ mezvoje inter la du ekstretoj, Perto en la Okcidento kaj Brizbano en la Oriento.

Kiam, ĉe la lasta kongreso en Sidnejo, Adelajdano Bob Felby invitis la kongreson, aŭdiĝis la opinio, ke la tasko estos malfacile plenumbla de la malgranda grupo. Sed Adelajdanoj pruvis, ke per granda entuziasmo kaj persisto oni povas venki ĉi timigajn obstaklojn.

La Kongres-Komitato konsistis el George Clarke (Prezidanto), Bob Felby (Sekretario), forte subtenate de sia edzino Audrey, Beryl Randles (Kasistino) aktive subtenata de neesperantista edzo Wes, kaj S-ino Thea van den Boogaard. S-ro Ralph Harry (Canberra) kaj Ges-roj Jack kaj Ivy Fallu (Melburno) alvenis kelkajn tagojn pli frue por kontribui al la preparlaboroj. Multe helpis dum la kaf-paŭzoj S-inoj Betty Hart (Sydney) kaj Ali Leereveld (Melburno).

La kongreso okazis en "Lincoln College", kiu situas ĉe unu flanko de granda tri-angula park-areo en Norda Adelajdo, nur marŝdistanco for de la centro de la ĉefurbo. Benis la kongreson dum la tuta semajno multe — foje ĉe tro — da sunbrilo. Netakseble gravan servon provizis Bob kaj Audrey Felby, kiuj renkontis multajn kongresanojn ĉe la ĉef-stacidomo kaj flughaveno kaj transportis ilin al la Kolegio.

Bona ideo de la Kongreskomitato estis nomi kelkajn salonojn laŭ konataj aŭstraliaj esperantistoj. Tiel troviĝis la salonoj D-ro C. Caldera, L.N.M. Newell, Ivan Maddern, kaj W. J. Drummond. La plejmulto de la kongresanoj loĝis sufiĉe komforte en la Kolegio. La manĝojn kongresanoj ricevis per memservo en granda lum- kaj spac-plena manĝosalono. La ĉefkuiristo, rusdevena, zorgis bonege per variaj kaj grand-porciaj manĝoj. Eĉ vegetaranoj estis kontentaj por la abundaj salatoj haveblaj. Supre de la manĝosalono troviĝis la granda kongressalono. Tie troviĝis ankaŭ la granda libro-stando abunde provizita per libroj kaj aliaj esperantaĵoj. Ĝin prizorgis, kiel kutime, Libro-Peranto Tom Elliott, helpate de sia edzino Mavis. Kongresanoj entuziasme eluzis la oportunojn aĉeti librojn kaj Tom

povis je la fino de la kongreso anonci, ke li enspezis \$910.55.

### La kongreso komenciĝas

Aliĝis al la kongreso 141 gesamideanoj (120 antaŭ 2 jaroj en Sidnejo), el kiuj fakte ĉeestis 121 (104 en 1980). Laŭŝtate venis el Nova Sud-Kimrujo 39, el Viktorio 26, el Kvinlando 19, el Okcidenta Aŭstralio 17, el Suda Aŭstralio 8, el Kanbero 7,, el Tasmanio 2 kaj el la Norda Teritorio 2. Aldone ni havis la plezuron bonvenigi inter ni Anjo Acton el Manĉestro, Anglujo. Speciale ĝojiga estis la multnombra partopreno de Pertanoj, kiuj kutime, pro la grandaj distancoj, nur malmultnombre ĉeestas kongresojn.

Televida Stacio "Kanalo 9" sendis teamon sabate (2-1-82) al la Kongreso por raportti pri la preparado. Oni filmis la librojn de la bonega librostando dum la Prezidanto kaj Vic-Prezidanto diskutis ilin — la novan libron "La Krabo kun la Oraj Pinĉiloj", la Sanktan Bibliion", "Hamleton" kaj ankaŭ la novan faldofolion "Invito el Aŭstralio". Tiam raportistino intervjuis la Prezidanton pri la celo kaj valoro de Esperanto. Oni disvastigis la raporton la saman vesperon.

La **Bonvenigan Vesperon** (sabate, 2/1) salute malfermis AEA-Prezidanto Ralph Harry. Lin sekvis George Clarke, la prezidanto de la LKK, kiu bonvenigis la kongresanojn al Adelajdo kaj dankis la Kongres-Sekretarion Bob Felby kaj la Kasistinon S-inon Beryl Randles pro la grandaj preparlaboroj. Betty Hart ludis la akordionon kaj instigis kongresanojn al komuna kantado. Sekvis danc-prezentado de 4 sinjorinoj de la klubo en Manly. S-ro Ralph Harry prezentis florbukedon al Ges-roj Randles, honore al ties geedziĝa datreveno. (ĉu la 45-a?). S-ro Wre Chandler prelegis pri sovaĝaj floroj en la Sidneja regiono kaj montris belajn lumbildojn.

Al la **Gazetara Konferenco** (lunde, 4/1) venis kelkaj reprezentantoj de la 2 lokaj gazetoj kaj televidaj stacioj. S-roj Ralph Harry kaj R. Robertson provizis multajn faktojn pri Esperanto al la ĵurnalistoj. Aperis poste kelkaj mallongaj raportoj. La posttagmeza gazeto "News" aperigis bildon de S-ro Harry kun sia artikolo.

### INAŬGURO DE LA KONGRESO

Lunde (4/1) okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Akurate je la 10.30-a alvenis la Vic-Guberniestro de Suda Aŭstralio, Sir Walter Crocker.

S-ro Ralph Harry bonvenigis la Vic-Guberniestron en angla lingvo kaj poste daŭrigis en Esperanto, klarigante faktojn pri la vivo de Sir Walter Crocker.

En sia alparolo al la kongreso, la Vic-Guberniestro diris ke li povis kompreni du trionojn de la parolado de S-ro Harry. Li diris ke dum 20 jaroj li estis en la Diplomata Servo kun Ralph Harry. Li bonvenigis la ĉeestantojn al Suda Aŭstralio kaj Adelajdo, kie en 1911 okazis la unua Aŭstralio E-Kongreso. Li rakontis pri la tiama gazeto "The Register", kiu estis "respondeciga gazeto de alta kvalito", kiu dediĉis 3 kolumnojn al la kongreso. "Vi povos senti vin bonŝancaj", Sir Walter Crocker diris, "se vi ricevos tri liniojn en ĉi tiu gazetaro hodiaŭ". Esperantistoj emlazu tri gravajn faktojn: (1-e) ke la mondo estas Babelo kaj helplingvo estas nepre necesa, (2-e) ke Esperanto ne celas anstataŭi iun ajn nacian lingvon kaj (3-e) ke oni instruu la lingvon en edukaj institucioj. La Vic-Guberniestro finis sian pensinstigan paroladon en Esperanto. Li diris: "Mi salutas, en la nomo de la Reĝino kaj de Sud-Aŭstralio, la 23-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson. Mi deziras por via laboro plenan sukceson. Mi esperas, kun vi, ke Esperanto floros, kaj ke ĝi estos baldaŭ akceptita kiel la internacia lingvo. Vivu Esperanto!"

Dum mallonga paŭzo la Vic-Guberniestro vizitis la libro-standon, akompanita de S-roj R. Harry kaj K. Linton.

S-ro R. Harry daŭrigis la malfermon per prelego "Esperanto Hodiaŭ". Li diris, ke en 1911 la demando estis "Ĉu Esperanto postvivos L. L. Zamenhof?" kaj "Ĉu Esperanto povos fariĝi la Internacia Lingvo?" Esperanto sukcesis laŭ tiuj vidpunktoj. Li klarigis la nunan staton de Esperanto en la mondo, kiu estas nun sur solida bazo. Li finis sian prelegon per la vortoj: "Kiam oni devos uzi 12 lingvojn ĉe U.N. tiam venos la tago por Esperanto".

Post la oficiala fotografado en la korto de la kolegio, oni daŭrigis la malfermon. S-ro Harry legis salutojn de Gregoire Maertens, Prez. de UEA, de S-ro Poul Thorsen (Danlando), de S-ro Mi Ji-sheng (Mongolio), de Emil Vokal, en la nomo de Aŭstria Esperantista Federacio, de Jim kaj Jennifer Dimo, kiuj nuntempe libertempas en Eŭropo, de Mikelo Rizo (Ĉinio) kaj de Eino Loorits (Hobarto).

Sekvis nun la salutoj de la reprezentantoj de diversaj organizaĵoj: Jack Hawks (E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio), George Clarke (Adelajdo), Mac Le Fevre (Launceston), Jack Fallu (Oakleigh E-Grupo), S. Kanaĉki (Melburna E-Societo), Isabel Gale (Waverley E-Grupo), Tom Elliott (Sidneja E-Societo), Prof. R. Robertson (Manly E-Klubo); Brenda Birkett (Kanbera E-Klubo),

(Kanbera E-Klubo), Joan Green (Newcastle), Silvia Burkett (Castle Hill), Betty Cleminson (Federacio de N.S.K.), Trevor Steele (Brisbana E-Societo), Ray Ross (Federacio de Kvinlando), Joyce Turner (E-Klubo de Rockhampton kaj Kaprikorno), Marjorie Duncan (E-Klubo de "Senior Citizens", Sidnejo), Annie Spencer (Int. Ligo de E-Instruitoj), W. Chandler (por Ges-roj Bossong kaj Audrey Childs Mee).

### Ĉe la Inaŭguro



De maldekstre dekstren: La Vic-Guberniestro Sir Walter Crocker, Prof. R. G. Robertson, AEA-Prezidanto Ralph Harry, Vic-Prez. Ken G. Linton.

### LABOR — KUNSIDOJ

Okazis 3 AEA-Kunsidoj kaj po unu de UEA, SAT, ORE, PAPIE kaj ILEI. Prezidanto Ralph Harry malfermis la AEA-Jarkunvenon (4/1). Li petis la ĉestantojn observi minuton da silento por la geesperantistoj mortintaj dum la pasintaj 2 jaroj: Walter Gassner (Sidnejo), Edward McKenzie (Melburno), Ivan T. Maddern (Morwell), John Matasin (Sidnejo), John Munro (Melburno), Heber Valverde Petley (Toowoomba), Jack Ryding (Melburno), Brone Silva (Melburno).

Raporton pri la agado de AEA dum 1980/81 prezentis la sekretario, S-ro Jack Fallu (Vidu aliloke). La finanĉan raporton prezentis S-ino Ivy Fallu, ties ĝustecon atestis Kaskontrolisto Ken Linton). (Vd. aliloke) La kunveno dankis al Ges-roj Fallu pro la granda laboro farita dum la pasintaj 2 jaroj. Tre detalan raporton pri la Libroservo prezentis la peranto Tom Elliott. Laŭ ĝi la profito de la Libroservo de julio 1979 ĝis junio 1981 estis \$1284.33 kaj la Bonhavo je 1-a de julio, 1981 estis \$12054.26. Sekvis la raporto de la re-

daktoro (Herbert Koppel). Trevor Steele dankis la redaktoron pro manko de eraroj en la asocia organo. S-ro John Moore (Korespondkurso Servo) ne povis ĉeesti, sed laŭ skriba raporto tiu servo havis je 1/1/80 kapitalon de \$1400 kaj montris saldon de \$2426 je 31/12/81.

S-ro Linton raportis, ke ĉio iras bone pri la ekzamenoj kaj ke li gajnis talentan novan membron por la Ekzamen-Komisiono — S-ron Trevor Steele. Li ankaŭ gratulis al S-ino Betty Cleminson pro ties Korespondpeta Servo. S-ro Ralph Harry nun raportis pri nova, sed tre grava entrepreno: La Aŭstralia Nacia Esperanto-Biblioteko. Li ricevis ĝis nun donacojn de \$410.75 kaj elspezis \$238.95 por la unuaj esencaj ekipaĵoj. Li petis, ke la aŭstralia esperantistaro forte subtenu kaj kreskigu tiun institucion tiel utilan por estontaj generacioj.

**Registrado de A.E.A.:** S-ro R. Harry atentigis, ke por intertraktado kun oficialaj instancoj A.E.A. nepre devas esti korporacie registrita. S-ro Ray Ross aldonis, ke la Brizbana Societo estas jam registrita. S-ro V. Guelting proponis registradon kaj Ray Ross kaj Ruth McGrath subtenis la proponon. (akceptita).

Je la komenciĝo de la 2-a AEA-Kunveno, teamo de la TV-Stacio 10 venis al la kongresejo por filmi la kunvenon. Samvespere la TV-Stacio 10 prezentis la filmon al la spektantoj.

S-ro R. Harry prezentis al la kongreso detalojn pri la reguloj por la "Aŭstralia Fonduso por E-Stipendio", kiujn la ĉeestantoj akceptis. (Vd. detalojn aliloke) Pri la **Jubileo de Esperanto** en 1987 okazis vigla diskuto. S-ro R. Harry proponis, ke ni nomu junan Komisiiton, kiu kunordigos la preparlaborojn. S-ro R. Ross proponis Trevor Steel por tiu posteno kaj la kunveno unuanime akceptis tiun proponon. Ankaŭ estis akceptita propono de S-ro R. Harry, ke la Jubilea Komitato enhavu 5 aŭstraliajn eminentulojn. La speciala agado konsistu el (a) Eldono de speciala numero de "A.E.", (b) Eldono de "Aŭstralia Antologio" (S-ro A. Towsey akceptis esti la redaktoro), (c) Kompilo de Historio de la Aŭstralia E-movado (R. Ross konsentis esti la Komisiito).

**Kongreso de I.L.E.I.** S-ro R. Harry raportis, ke la Internacia Ligo de E-Instruistoj deziras okazigi kongreson en Aŭstralio. S-ro T. Steele kaj M. Leereveld proponis, ke tia kongreso okazu

en la mezo de la jaro, dum lernejaĵferioj. Oni akceptis proponon de S-ro R. Harry, ke la AEA-Estraro enketu pri eblaj datoj kaj informu I.L.E.I.

**Universala Kongreso en Aŭstralio:** La kongresanoj akceptis proponon de S-ro R. Harry, ke la AEA-Estraro invitu la 1988-an Universalan Kongreson, en la Jubilea Jaro de Aŭstralio. La Estraro invitu la kongreson ĉe la Antverpena Kongreso en ĉi tiu jaro. S-ro R. Harry ankaŭ proponis, ke Brizbano estu la loko de la U.K. (akceptita).

S-ro R. Harry prezentis kvin-punktan **Kongresan Rezolucion** de la Estraro, kiun legantoj trovos aliloke. (Unuanime akceptita).

**Kotizo por 1982/83:** S-ro Harry proponis ke la kotizoj por ordinaraĵoj membroj estu \$18, por Pensiuloj \$10 kaj por Familiaĵoj Membroj \$5. S-ro Trevor Steele diris ke li ĉiam preferas, ke kotizoj estu laŭ "rondaj ciferoj" kaj pro tio li proponis \$20 kiel plenan kotizon, \$10 por Pensiuloj kaj \$5 por Familianoj. Okazis vigla diskuto pri tiu propono kaj fine voĉdono: 31 kongresanoj voĉdonis por kaj 7 kontraŭ la propono de T. Steele. Prof. R. Robertson proponis, ke se iu membro ne povas pagi \$20, li rajtas sin nomi "Pensiulo". Tiu propono estis akceptita, sed la kongreso alvokis la membrojn finance subteni la Asocion per donacoj.

**Loko de la 1984-a Kongreso:** S-ino Marjorie Ellyard kuraĝe alpaŝis la mikrofonon kaj invitis la kongreson al Kanbero kaj la kunveno akceptis ŝian proponon per aklamado.

Sekvis la elekto de la nova Estraro. S-ro Wre Chandler, kiel Nestoro de la aŭstralia movado, gvidis la elekton de la prezidanto. S-ino I. Einihoviĉi proponis S-ron Ralph Harry kiel prezidanton, subtenis la proponon Prof. R. Robertson. Akceptita.

S-ro Ralph Harry gvidis nun la elektadon de la aliaj oficistoj. Post diskutoj la membraro elektis la sekvantan novan Estraron:

Prezidanto: S-ro Ralph Harry, A.C., C.B.E. (Kanbero)

Vic-Prezidantoj: S-ro Mac LeFevre, M.L.C. (Launceston)

S-ro Ray Ross (Brizbano)

Sekretario: S-ino M. Ellyard (Kanbero)

Kasisto: S-ro S. Ellyard (Kanbero)

Redaktoro: S-ro Herbert Koppel (Melbourne)

Komisiito por la Jubilea Jaro: S-ro Trevor Steele (Brizbano)

Libro-Servo: S-ro Tom Elliott  
(Sidnejo)  
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore  
(Emu Park)  
Korespondpetoj: S-ino B. Cleminson  
(Manly)  
Komisiito por Esperanto en Lernejoj:  
S-ro S. J. Campbell (Dorrigo,  
NSK)  
Ĉef-Ekzamenisto: S-ro Ken Linton  
(Melbourne)

Kas-Kontrolisto: S-ro Ken Linton

**Honoriga Komisiono:** S-ro Ralph Harry proponis, ke rekomendoj por honorigoj estu farotaj de la aro de fratuloj de la Asocio. Propono akceptita. La komisiono do konsistas el: D-ro C. J. Caldera (Perto), S-roj E. W. Chandler (Sidnejo), Ralph Harry (Kanbero), H. Koppel (Melburno), K. G. Linton (Melburno).

## Post la Inaŭguro

### La Vic-Guberniestro inspektas la Libro-Standon



De maldekstre dekstren: La Vic-Guberniestro Sir Walter Crocker, A.E.A. Prezidanto Ralph Harry, Libro-Peranto Tom Elliott

S-ro Alan Towsey dankis la Estraron kaj la Redaktoron pro la laboro farita en 1980/81. S-ro Ralph Harry dankis la lokan Kongresan Komitaton pro la grandaj preparlaboroj por la kongreso. Li finis la jarkunvenon kaj petis la ĉeestantaron same malavare subteni A.E.A. kiel dum la pasintaj 2 jaroj.

**S.A.T.** — Kunveno: Ĉeestis 10 personoj. SAT-peranto Volo Gueltling informis, ke la kotizo estas por 1982 \$18.75 (membrecio, jarlibro kaj monata organo "Sennaciulo"), "Sennacieca Revuo" kostas \$3.75. (Oni sendu kotizon al S-ro V. Gueltling, 9/45 Alt Street, Ashfield, 2131, NSW) Okazis longa diskuto pri la praktika diferenco inter SAT kaj UEA.

**U.E.A. — Kunveno:** Ĉef-Delegito Ken Linton informis, ke estas nun 45 delegitoj en Aŭstralio kaj li ankaŭ klarigis pri la agado de la delegitoj. Li legis el "Esperanto-Dokumentoj". (Detalojn pri U.E.A. vi povas legi en "A.E." Dec., 1981 p. 68).

**P.A.P.I.E.:** Partoprenis 22 membroj. Prezidanto Trevor Steele prezidis. Li informis, ke eldono 18 de "Trans-oceana" ne atingis multajn membrojn. Li promesis enketi pri la kialo de la prokrasto. S-ino Annie Spencer demandis "Kial havi PAPIE kaj I.L.E.I., PAPIE ne havas celon?" Kelkaj "ĉeestantoj respondis, ke la organo de I.L.E.I. nur malofte atingis ilin kaj ke ili preferas legi pacifikan organon. S-ro Leereveld aldonis, ke "ni bezonas gazeton speciale por profesiaj instruistoj por interŝanĝo de ideoj kaj spertoj".

Oni decidis NE altigi la kotizon por 1982/83. S-ro Ray Ross raportis, ke la E-Federacio de Kvinslando subtenis PAPIE per donaco de \$100 kaj se eble denove subtenos ĝin.

**I.L.E.I.:** Ĉeestis 13 personoj. Prezidis S-ino Annie Spencer. Laŭ peto de la prezidanto, reprezentantoj de Kvinslando, Sidnejo, Manly, Viktorio kaj Okcidenta Aŭstralio raportis pri agado en siaj regionoj.

**O.R.E. Kunsido:** La Prezidanto, Wre Chandler, raportis, ke la Aŭstralazia Sekcio de ORE jam perdis sian reputacion kiel la plej aktiva sekcio de ORE. La kialoj ŝajnas esti inflacio, la tro teknikaj artikoloj en "La Mevo" kaj lia propra malsano, kiu malebligis la regulan aperon de "la Suda Mevido".

Betty Cleminson, Aŭstralia peranto de ORE raportis, ke el 48 membroj en 1979 nur 12 renovigis membrecon en 1981. La plimulto klarigis, ke la alta kotizo kaj la manko en "La Mevo" de artikoloj interesaj al aŭstraliaj legantoj influis ilin.

Post longa diskutado, ni adoptis la jenajn rezoluciojn:

- 1-e ke ni petu al la Estraro de ORE ke ĝi akceptu nian sekcion kiel filian organizon kontraŭ "per capita" kotizo multe pli malalta ol tio por plena membreco;
- 2-e ke ni petu al ĉiuj aŭstraliaj E-societoj, ke ili filiiĝu al ORE por ricevi "La Mevo"-n por siaj bibliotekoj;
- 3-e ke ni regule eldonu "La Suda Mevido"-n;

4-e ke la jarkotizo de nia Sekcio estu sufiĉe malalta por pagi nur la "per Capita" kotizon de ORE kaj eldon-kostojn de "La Suda Mevido".

Konklude, Wre Chandler petis, ke ĉiu membro faru sian eblon por regajni nian reputacion kiel la plej aktiva landa sekcio de Ornitologia Rondo Esperantlingva.

—Revanto.

Riĉa kultura kaj distra programo ornamis la kongreson, sed eble la plej elstrara ero estis la ĉiam populara

### DRAMO-KONKURSO

por la Drama Trofeo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Partoprenis kvin trupoj el kvar urboj. Denove deĵoris kvin juĝantoj. Ili spertis malfacilon prijuĝi la trupojn, kiuj ludis eksterordinare bone. La juĝantaro konsistis el: George Clarke (Adelajdo), Ivy Fallu (Melburno), Herbert Koppel (Melburno) Alan Towsey, Tahmoor, N.S.K.) kaj Mabel Wybenga Morwell, Vik.)

Marde (5/1/82) la konkurso komenĉiĝis per "La Surda Profesoro", prezentita de la E-Ligo de Perto. Ges-roj Einihovici ludis la ĉefrolojn, kapable subtenitaj de Rene Smeets kaj Gordon Gregson. Sekvis la **Brizbana grupo**, kiu ludis "Hejmen", verkitan de Trevor Steele. Li ankaŭ ludis la ĉefrolon. Ray Ross, Cathy Sullivan, H. C. Bailey kaj aliaj kapable subtenis lin.

Merkrede (6/1/82) la **Manly-grupo** prezentis "La Kadavro de la Kokrito"-n verkitan de Helen Stone. Ĉefroluloj, kiel en antaŭaj jaroj, estis Eunice Graham kaj Prof. R. Robertson. Arthur Cocking kaj Katie Wright estis la aliaj ludantoj. La **Kanbera E-Klubo** prezentis la teatraĵon "Duobla Agento", verkitan de la multtalenta Ralph Harry, kiu ankaŭ ludis la ĉefrolon de ruza agento, kiu sukcesas aranĝi pacon inter Agolando kaj Ursolando. Sam kaj Marj Ellyard, Brenda Birkett kaj Pati Anson estis la aliaj ludantoj. "La Fatala Miskompreno", prezentita de Chris kaj Dolly Dean (Perth) estis tre amuza skeĉo, en kiu la du aktoroj fakte ludis kvin diversajn rolojn.

Kongresanoj devis atendi tri tagojn antaŭ ol ili informiĝis pri la rezulto de la Drama Konkurso. Okaze de la "Neformala Vespero" S-ro H. Koppel anoncis la decidon de la juĝantaro.

Gajnis la trofeon la Kanbera E-Klubo per 80 poentoj, dum la Manly E-Klubo ricevis 77½ poentojn.

**Pri dimanĉaj aranĝoj raportas Profesoro Robertson:** Ni ekskursis la tutan tagon al Goolwa apud la buŝo de la rivero Murray, kaj vojaĝis per la ŝipeto "Aroona", trapasante kluzon survoje. Revenante al Adelajdo unu el la aŭtobusoj paneis pro la varmega vetero kaj krutaj deklivoj. Kvankam du bravaj samideaninoj serĉis akvon sitele, la pasaĝeroj devis resti malkomforte en la sunbrilo, ĝis la ŝoforo alvokis la alian aŭtobuson per radioaparato por savi nin. Kompreneble la LKK ne responsis pri tiu akcidento. Dume la pasaĝeroj el la savaaŭtobuso atendis nin en vilaĝa trinkejo.

Pro tio, duono de la kongresanoj ne atingis sufiĉe frue la Katedralon de Sankta Petro, por aŭskulti la laŭlegadon el la Sankta Biblio, de Ralph Harry, Isabel Gale kaj Robby Robertson, aŭ por kanti himnon en la internacia lingvo. Tamen la Di-Servo estis sukcesplena; Kanoniko W. R. Ray predikis, kaj sufiĉe ofte kaj afable aludis al Zamenhof kaj Esperanto.

En la kadro de la Arta Vespere, Beryl Randles montris al ni siajn belajn pentraĵojn. Les Scott deklamis poemojn de Zamenhof, kaj Ralph Harry deklamis tradukon de poemo verkita de T. S. Eliot. Trevor Steele lerte organizis Kvizon kaj kvar tripersonaj teamoj partoprenis; la teamo de Ralph Harry venkis."

### Prelegoj

Preskaŭ ĉiuj programoj inkludis interesajn prelegojn. Spaco ne sufiĉas por ĉe resumi ilin.

Lunde, 4/1, Jacqueline Walker, lerta, ankoraŭ ne 18-jara membro el Perto, celis malfermi niajn okulojn per sia prelego "**Aldonitaĵoj en la nutraĵoj**". Jacqueline studas medicinon ĉe la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Ni esperas represi ŝian prelegon en estonta numero. Tom Elliott ŝerce parolis pri "**Komputiloj**", kiujn li nomus "stultaj maŝincerboj". Arthur Cocking parolis pri "**Egaleco**". Laŭ li ni NE estas egalaj kaj li emfazis "Vivu la Malegaleco". Ni ĉoĵis renkonti denove eksprezidanton Ross Robbins, kiu prelegis pri "**Ekspedicio en Kenjo**" kaj montris belajn lumbildojn.

Tagon poste, Bill Leah gvidis nin al alia atrika lando, kiam li parolis pri **Zimbabve** kaj montris diapozitivojn, i.a. de la granda akvofalo "Victoria".

Posttagmeza serio de paroladetoj okazis vendrede, 8/1: Gemeinoj Pam Harris rakontis pri "**Instruado al Indigenoj en la Norda Teritorio**" kaj Rosemary Harris pri "**Kiel mi fariĝis Esperantistino**"; Mac Le Fevre parolis pri la proponita **diĝo ĉe rivero Franklin**, Kay Morrison (Manly) pri vojaĝo tra Ĉinio kaj Ken Linton legis poemon.

Vespere S-ro Ralph Harry donis erudician prelegon pri "**Geografiaj Nomoj**", D-ro A. Einihovici pri "**La movado en Hungario**". Trevor Steele prelegis pri "**Fenestro al pli vastaj perspektivoj**", en kiu li priskribis rimarkindan kuracadon per malstreĉiĝoj. Shirley Gradussov parolis pri "**Aventuroj en Esperantujo**", Fine Prof. R. Robertson prelegis pri "**Aliaj Internaciaj Lingvoj**".

Sabaton matene (9/1) okazis prelegaro "**Literaturaj Eroj**", organizita de S-ino Fay Koppel. D-ro A. Einihovici parolis pri Antoni Grabowski kaj la "Slava Epoko", Ruth McGrath pri Kolomano Kalocsay kaj la "Hungara Epoko". George Clarke parolis pri Sándor Szathmari, Herbert Koppel skizis la vivon kaj deklamis poemojn de la franca ŝerĉpoeto Raymond Schwartz. Sekvis Eunice Graham kun ekzemploj pri la diversflanka talento de Marjorie Boulton. Robbie Robertson deklamis poemojn de tri poetoj de la "Skota Skolo" inklude de traduko el la verkoj de Robbie Burns. Fay Koppel resumis la laboron de Len Newell, antaŭ kaj dum ties loĝado en Adelajdo.

### Aliaj Distraĵoj

Tre lertan pupteatran satiron prezentis la Brizbana grupo (5/1) pri la 16 Reguloj kaj la "Regulo de ZO-ZO". Aliaj ĉarman pupeton prezentis D-ro Ross Robbins antaŭ ol plurfoje mistifiki per diversaj magiaĵoj. Melburnanoj aktorin en amuzaj skeĉoj, aranĝitaj de Ann Hearn. S-ro Harry montris filmojn pri E-kongresoj en Islando kaj Sidnejo.

Krom la ekskurso al Goolwa okazis duontaga ekskurso ĉirkaŭ la urbo kaj alia al Mount Lofty. Tuttaga ekskurso al la "Barossa" Valo okazis merkrede (6/1). Ekskursanoj havis la eblecon viziti la vinfarejon "Orlando" kaj gustumi ties produktojn.

### Aliaj Aranĝoj

S-ro Arthur Cocking gvidis lecionojn por komencantoj en amuza maniero. S-ro Trevor Steele respondecis pri daŭriga kurso kaj S-ro Ken Linton gvidis altgradan seminarion.

### La Fermo

Sabate (9/1) okazis la oficiala fermo de la kongreso. S-ro Ralph Harry parolis pri la taskoj de AEA en la venontaj 2 jaroj. Li diris, ke la kongreso estis grandega sukceso. Li transdonis libro-donacon al S-ro Bob Felby. S-ro George Clarke transdonis la flagon al Brenda Birkitt (Canberra) por la venonta kongreso.

**La Bankedo** okazis en memserva maniero; manĝaĵoj estis abundaj kaj bongustaj. F-ino Sian Hall proponis la toston al la Reĝino, George Clarke al AEA kaj Prof. Robertson al la Loka Kongresa Komitato. S-ro Ralph Harry anoncis decidon nomi **S-ron Chandler "Fratulo" de AEA**. Sekvis vigla aŭkcio, gvidita de Trevor Steele. Temis pri moderna skulptaĵo donacita de Ges-roj Einihovici. Pli ol \$160 estis la rezulto de la aŭkcio kaj tiu sumo estis transdonita al la Stipendia Fonduso.

### La Neformala Vespero

Tiu lasta ero de la kongreso okazis sabate (9/1). S-ro Harry legis siajn "Analojn por 1981", kiujn ni esperas publikigi en venonta numero. La E-Ligo de Perto prezentis amuzan skeĉon "Cindrulino", D-ro Ross Robbins de nove prezentis magiaĵojn, Les Scott ludis buŝharmonikon kaj Geoffrey Warren rave pian-ludis.

Jack Kawks, nome de la Perto Ligo, prezentis premiojn de literaturaj konkursoj. Trevor Steele gajnis la prozan parton, Ruth Morrison la poezian kaj Jean Lehane la dramatan parton.

Plianstrebplaraĵo faris Ann Hearn, kiu parolis pri sia vojaĝo tra Ĉinio.

La kongreso estis ĝuinda kaj sukcesa. Eble estontaj kongres-aranĝantoj atenton, ke la vesperaj aranĝoj finiĝu je la 10-a vespere. Pluraj kongresanoj forlasis la kongresejon je tiu horo, ĉar ili sentis sin tro lacaj pro la varmega vetero.

### Dankesprimoj

La Redakcio deziras danki al **S-roj Chandler, Harry kaj Robertson** pro kontribuoj al la kongresraporto.

Speciala danko iras al **S-ino Ruth McGrath**, kiu provizis la 2 fotografiaĵojn por nia raporto kaj al **S-ro Linton**, kiu havigis al ni la necesajn kliŝojn.

### KONGRESA REZOLUCIO

- I La Kongreso dankas al la Federacia Registaro pro ĝia subteno per la ĉeesto de la Aŭstralia Ambasadoro en Brasilia je la inaŭguro de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto.
- II La Kongreso dankas al la Aŭstralia Turista Komisiono pro ĝia eldono de la faldfolio "Invito el Aŭstralio"
- III La Kongreso petas al la Federacia Registaro, ke ĝi pripensu aŭ subtenu, en la venonta Generala Konferenco de UNESKO, rekomendojn ke la instruado de Esperanto estu enkondukita en la lernejojn de la mondo.
- IV La Kongreso petas al la Federacia Registaro, ke, sekve de la rekomendoj de la neregistaraj organizaĵoj, pasintan decembron, al la Aŭstralia Komisiono pri UNESKO, ĝi subtenu proponojn por programoj, kiuj antaŭenigus internacian kulturon kaj interkomunikadon.
- V La Kongreso petas al la edukadaj instancoj de la Federacia Registaro kaj de la apartaj aŭstraliaj ŝtatoj, ke ili enkonduku Esperanton en la instruoplanojn de instruistaj kolegioj.

### RAPORTO DE LA SEKRETARIO

Kvankam ni perdis kelkajn A.E.A.-membrojn en la pasintaj du jaroj, pro morto kaj eksigo, ni gajnis preskaŭ la saman nombron da novaj anoj.

En 1980 ni elsendis 8 numerojn de la gazeto "Australian Esperantist", el kiuj unu havis 16 paĝojn kaj en 1981 ni eldonis 9 numerojn. Nia gazeto estas altetaksata ankaŭ en aliaj landoj, kaj ĝi estas la sola organo kiun ni havas en Aŭstralio por kunligi la membrojn de la foraj ŝtatoj. Ni ŝuldas al nia Redaktoro, Herbert Koppel, varman dankon tiurilate.

Grava afero, kiu meritas specialan mencion estas la starigo de la Nacia Esperanto-Biblioteko en Kanbero, dank' al la iniciatemo de S-ro Ralph Harry. Tia Biblioteko certigas, ke Esperanta Literaturo estas kaj estos ĉiam havebla al Esperantistoj en nia lando.

Alia bonega entreprenado estas la Esperanto-muzeo de Kvinslando, malfermita en oktobro, 1981. Pri tiu Muzeo respondecis la Brizbanaj membroj. Estontaj generacioj de Esperantistoj povos profiti pro la valoraj libroj kaj analoj en la Muzeo.

La Korespondkursa Servo ankoraŭ bone funkcias. En 1980 la Estraro de A.E.A. decidis transigi al la K. K.



Servo la kapitalon, kiu estis tenita en la generala konto speciale por tiu servo. Per tio ni ŝparas tempon kaj evitas nenecesan kontadon. Antaŭnelonge S-ro John Moore, kiu administras la K. K. Servon, suferis gravan malsanon. Malgraŭ tio, li, kun helpanto, daŭrigis la laboron. Li ankaŭ verkas lecionetojn por la skoltina gazeto "Guiding in Australia". Ni multe dankas al John kaj liaj kursgvidantoj.

Alia valorega ano estas Tom Elliott. Krom sia grava deĵoro kiel Libro-Peranto, li kompilas kaj presigas la Adresaron kaj Librokatalogon. La katalogo provizas ne nur libro-prezojn, sed ankaŭ multan informon pri la Asocio.

Frue en la jaro Ges-roj Gerald kaj Ruth Tumman preparis kaj aranĝis bonegajn Esperanto-ekspoziciojn en Melburno kaj antaŭurboj. Poste, farinte persistajn petojn al la aŭtoritatoj, Gerald respondecis pri Esperanto-kurso ĉe la Prahran Kolegio de Supera Edukado. Gratulon, S-ro Tumman!

Troviĝas en ĉiu ŝtato multaj lojalaj kunlaborantoj, sed bedaŭrinde oni ne povas mencii ĉiujn.

Al niaj vokoj por donacoj al la Fondusoj "A.E." kaj "Esperanto-Stipendio" venis tre kontentiga respondo. La etato de la Kasisto montras la finan rezulton. Sincere ni dankas al ĉiuj, kiuj sendis donacojn.

Eksigante el la Estraro, mia edzino kaj mi deziras esprimi koran dankon al tiuj, kiuj donis al ni konsilon kaj helpon, precipe Sinjoroj Ralph Harry, Herbert Koppel kaj Ken Linton.

JACK FALLU (Hon. Sekretario)

## AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Spezokonto 30-11-79 - 30-11-81

### ENSPEZOJ

Kreditsaldo 30-11-79	\$8520.54
Kotizoj 1980/1981 + antaŭpagitaj 1982	5319.60
Profito el Sidneja Kongreso	598.84
Ekzamenoj	106.00
Korespondkursoj	1396.45
Bankinterezo	514.00
Donacoj	546.00
F. R. Banham Fonduso	736.97
Repago de Junulara Asocio	75.95
"A.E." Subtena Fonduso (nete de presado)	1306.10
"Esperanto-Stipendio" Fonduso	2722.00
T. G. Memoriga Fonduso	30.00
Reklamoj en "A.E." (El Popola Ĉinio)	25.50
Diversaĵoj	6.08
	<hr/>
	\$21904.03

### ELSPEZOJ

Revuo "A.E." Presado & Afranko	\$5403.26
Kotizoj al U.E.A. (Asociaj membroj)	169.40
Adresmaŝino	168.40
Presado & Papero	483.51
Afranko & Kurtaĝo	104.35
Manly Poŝtkesto	52.00
Diversaĵoj	93.31
Memorigaĵo al S-ro Maddern	20.00
Korespondkursoj transigitaj al K. K. Servo	1396.45
Korespondkursoj el antaŭa periodo	30.00
Donaco al W. A. Ligo ("Stipendio")	100.00
Donaco al R. Springer (Kasedoj)	100.00
Donaco al U.E.A. Novjorka Oficejo	50.00
Libro-donaco: N.S.W. Biblioteko	1.80
Libro-donaco: Indonezia Grupo	61.60
F. R. Banham Fonduso	357.00
El Fonduso Simpkins, al Statgrupoj	315.00
Investaĵoj: "A.E." Subtena Fonduso	1300.00
Investaĵoj: "Stipendio"—Fonduso	1500.00
Investaĵoj: Fonduso Simpkins	1500.00
Kreditsaldo 30-11-81	8697.95
	<hr/>
	\$21904.03

### FONDUSOJ, 30-11-81

"A.E." Subtena Fonduso:	
Savings Investment	
+ Interezo	\$1441.13
Generala Konto	20.10
"Esperanto-Stipendio"	1461.23
Term Deposit	
+ Interezo	1517.13
Generala Konto	1222.00
	2739.13

—IVY FALLU, Kasisto

KEN LINTON, Kaskontrolisto.

## BILANCO

<b>Aktivoj:</b>	
Statewide Building Society (Dumviva)	\$1212.96
State Savings Term Deposit (Stipendio)	1517.13
Commonwealth Savings Investment Acct. (Subtena)	1441.13
Australian General Credit (Simpkins)	1747.96
Credit Balance Commonwealth Savings Bank	8697.95
	<hr/>
	\$14617.13

**Pasivoj:**

Bonhavo je 30-11-1979:

Banham Fonduso ..	\$433.02	
Dumviva Fonduso ..	1055.25	
Korespondaj		
Kursoj ..	738.15	
T. G. Memoriga		
Fonduso ..	653.98	
Simpkins Fonduso ..	1500.00	
Generala Kaso ..	5195.39	
		\$9575.79

**Gajnoj:**

Dumviva Fonduso ..	\$157.71	
Stipendia Fonduso ..	3239.13	
Banham Fonduso ..	379.97	
Subtena Fonduso ..	1441.13	
T. G. Memoriga		
Fonduso ..	30.00	
Generala Kaso ..	628.59	
		\$5876.53

\$15452.32

**Perdoj:**

Simpkins Fonduso ..	\$67.04	
Korespondaj Kursoj	768.15	
		835.19

\$14617.13

**Kontrolita kaj trovita ĝusta:**

K. G. Linton  
(Kaskontrolisto)  
I. M. Fallu  
(Kasistino)

**KOMISIITO PRI ESPERANTO EN LERNEJOJ, 1982-83**

Dum la 23-a Aŭstralia E-Kongreso, A.E.A. nomis S-ron Jock Campbell de Dorrigo "Komisiito pri Esperanto en lernejoj" kun la jenaj taskoj:

- (1) Trovi, kontakti kaj interkomunikigi lerneajn E-instruistojn ĉie en Aŭstralio.
  - (2) Kolekti statistikojn pri la klasoj kaj disdoni ilin — unue al la kernaj lernejoj mem, due al novaj-medioj (precipe Esperantlingvaj).
  - (3) Fari liston de taŭgaj programoj, kaj lerniloj kvante haveblaj en Aŭstralio, unuavice por helpi al instruistoj, duavice por povi — se iam oportuno venos — doni utilan konsilon al edukaj instancoj.
  - (4) establi kontakton kun fakorganizoj de fremdlingvaj instruistoj (Modern Language Teachers Associations) proponi al ili informojn pri Esperanto kaj la Esperanto-Movado, kaj, se eble, aranĝi, ke kompetentuloj parolu pri Esperanto al tiaj fakorganizoj kaj/aŭ kontribuu artikolojn al ties revuoj.
- (Akceptita de A.E.A. — Jan. 1982)

**REZOLUCIO PRI FONDUSO "STIPENDIO"**

La Asocio,

**Rememorante** sian rezolucion dum la 22-a Kongreso (AE Jan.-Feb. 1980, P. 268) sekve de la malavara oferto de la Esperanto-Klubo de Launceston donaci \$1,500 al fonduso por Esperanto-Stipendioj.

**Rememorante** la inviton de la Prezidanto al la membroj donaci al tia fonduso (Australian Esperantist, Septembro 1980 p. 314).

**Notante** ke pli ol \$3,000 estas jam kolektita kaj varme dankante al ĉiuj donacintoj.

**Decidas** (1) ke estu starigita konstanta fonduso nomota "La Aŭstralia Fonduso por Esperanto-Stipendioj";

(2) ke la Fonduso estu administrata de speciala komitato (La Stipendia Komitato), kiu konsistu el la Estraro de AEA kun la aldono de reprezentanto de la Esperanto-Klubo de Launceston, se tiu Klubo tion deziras, tiam kiam ne estas membro de tiu Klubo en la Estraro;

(3) ke la fonduso estu investita laŭ la bontrovo de la Stipendia Komitato, sed celante la maksimuman enspezon konforman al la bezono protekti la investitan monon;

(4) ke nur la interezo aŭ alia nekapitala enspezo estu uzita provizi stipendiojn, kaj ke la enspezo estu uzata nur por tiu celo;

(5) ke la Stipendia Komitato aljuĝu stipendiojn kiam ajn ĝi konsideras, ke tio plej bone antaŭenigus Esperanton en Aŭstralio, sed ke stipendioj estu donitaj ĉefe al aŭstraliaj Esperantistoj por fari studvizitojn al aliaj landoj kaj al eksterlandaj Esperantistoj por viziti Aŭstralion.

**Invitas** la membraron daŭre donaci al la fonduso.

(Akceptita de A.E.A. — Jan. 1982)

## FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita .....	\$2782
S-ino J. S. Douma, Deventer (Nederlando) .....	40
Waverley Esperanto Group .....	10
F-ino I. Gale, Melbourne .....	10
<b>A. P. &amp; S. B., Melbourne</b> .....	<b>100</b>
S-ino Jean Lehane, Toowoomba .....	20
S-ro H. Peddie, Sydney .....	10
<b>A. P., Melbourne</b> .....	<b>100</b>
<b>S-ro Adam Cokljjet, Perth</b> .....	<b>50</b>
S-ro G. Tumman, Healesville, Vik .....	15
<b>S-ro Les Scott, Manly</b> .....	<b>200</b>
Aŭkcio ĉe Kongreso .....	163
	<hr/>
	\$3500

Specialan dankon al S-ino J. S. Douma, el Deventer, Nederlando, kiu post nur mallonga vizito al Aŭstralio faris malavaran donacon al nia fonduso.

## LA "A.E." SUBTEN-FONDUSO

Dum la kongresoj en Launceston kaj Sidnejo, 2-3 fidelaj membroj esprimis la timon, ke okfoja eldono de presita gazeto eble bankrotigos la financojn de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Por kvietigi ilin, la redakcio lanĉis en 1980, kun la aprobo de nia Prezidanto, specialan "Subten-Fonduson" por nia gazeto. Nia espero estis kolekti \$1000 en 2 jaroj, sed jam post nur 10 monatoj niaj malavaraĵ legantoj kontribuis la sumon de \$1079. Ĝis la fino de 1981 la fonduso kreskis ĝis \$1325.

Nia speciala danko iras al niaj amikoj en Nova Sub-Kimrujo, kiuj kontribuis la plej altan sumon, nome \$553. Sekvas Viktorio per \$425.40, Kvinlando \$180.60, Okcidenta Aŭstralio \$81, Kanbero \$30, Tasmanio \$30 kaj Suda Aŭstralio \$25.

Inflacio daŭras, sed niaj malavaraĵ kontribuantoj pruvis, ke spite de inflacio ni kapablas eĉ pilmultiigi la eldonon de nia gazeto. Pro tio ni fidis, ke ankaŭ en 1982/83 niaj legantoj same subtenos la "Subten-Fonduson" de nia gazeto.

—Herbert Koppel, Redaktoro

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

S-ino S. Fanos, Sydney .....	\$2
S-ro Les Scott, Manly .....	10
S-ro Volo Gueltling, Sydney .....	5
S-ro A. Towsey, Tahmoor, NSW .....	5
Ges-roj S. Ellyard, Canberra .....	10
	<hr/>
	\$32

## RAPORTO DE LA REDAKTORO

Dum la pasintaj 2 jaroj, depost nia lasta kongreso en Sidnejo, ni eldonis 17 numerojn de nia gazeto "Australian Esperantist". En 1980 ni eldonis 8 numerojn, sed la decembra numero havis 16 paĝojn, pro la malavaraĵ donacoj de legantoj al nia "Subten-Fonduso". En 1981 ni eldonis 9 numerojn, ankaŭ pro la donacoj de niaj legantoj.

Denove, elstaraj, internacie konataj esperantistoj, kontribuis al nia gazeto, kiel ekzemple William Auld, Prezidanto de la Akademio, Marjorie Boulton, Akademiano, D-ro Arthur Baur (Svisa Kurtonda Radio) D-ro Karl Beckmann (Esperanto-elsendo de Radio Vieno) kaj la eminenta Esperanto-jurnalisto Bernard Golden (Hungaruj).

Transmaraj gazetoj ofte mencias nian organon per laŭdaj vortoj, kiel ekzemple "Esperanto" de U.E.A., kiu en marto 1980 diris i.a. "The Australian Esperantist" delonge viciĝas inter la plej bonaj landaj E-periodaĵoj.

Kvankam nia gazeto estas nur malgranda, ni povis ĉeesti per specialaj raportistoj, la Universalajn Kongresojn en Stockholmo kaj Brazilia, la internacian fervojistan kongreson en Regensburg kaj la 2-an Pacifikan Kongreson en Vancouver.

Arthur Cocking daŭrigis sian serion pri "Kiu estas Kiu en Aŭstralia Esperanto" kaj niaj fidelaj ŝtataj raportistoj regule kontribuis al nia "Aŭstralia Kroniko".

Kio plej gravas estas la fakto, ke ŝajne niaj legantoj tre ŝatis nian gazeton kaj pruvis tion per malavaraĵ donacoj al

nia Subten-Fonduso. Ni esperas, ke ankaŭ dum la venontaj 2 jaroj niaj legantoj subtenos nin same kiel dum la du pasintaj.

Fine, mi deziras esprimi mian specialan dankon al Ivy kaj Jack Fallu. Konstanta kunlaboro inter la Sekretario kaj Kasisto kun la Redaktoro de nia asocia organo, estas nepre necesa.

Tiurilate, Ges-roj Fallu bonege kunlaboris dum la pasintaj 2 jaroj kaj mi kore dankas al ili.

—HERBERT KOPPEL, Redaktoro.

### 23rd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

#### Late Supplementary List:

128. Val. Fotheringham, Melbourne
  129. Les Scott, Manly
  130. Bess Scott, Manly
  131. Rex Hanney, Adelaide (now England).
  132. Sally Knowles, Perth
  133. Kitty Gassner, Sydney
  134. Sian Hall, Bundarra, NSW
  135. Geoffrey Warren, Canberra
  136. Vera Payne, Perth
  137. Audrey Bruton, Castlemaine, Vic.
  138. Konstantin Stanev, Adelaide
  139. Kam Lee, Hobart
  140. Marge Parkes, Perth
  141. Anjo Acton, Manchester, England
- Final State Distribution: NSW 47; Vic. 26; Q'ld.23; W.A. 21; S.A. 10; A.C.T. 7; Tas. 4; N.T. 2; England 1.

### INVITO EL AŬSTRALIO

La Aŭstralia Turista Komisiono, sekve de rezolucio de la internacia konferenco en Manila, pasintan decembron, eldonis faldfoliojn en plena koloro: "Invito el Aŭstralia".

Individuoj bonvolu peti ekzempleron ĉe la oficejoj de la Komisiono:

#### Australian Tourist Commission

- P.O. Box A-1, Addison IL, 60101, Usono
- Sankaido Building 7f, 9-13, Akasaka 1-chrome Minato-ku, Tokio 107, Japanio.
- Neue Mainzerstrasse 22, 6000 Frankfurt/Main 1, Fed. Resp. Germanio.
- 44 Old Bond Street, London W1X 4PL, Britio
- Suite 1009, Orchard Towers, 400 Orchard Road, Singapore, 0923.
- P.O. Box 1666, Auckland 1, Nov-Zelando.

En aliaj landoj bv. sin turni al la "Australian Information Service" ĉe aŭstraliaj ambasadejoj, altkomisionoj, konsulejoj kaj aliaj oficejoj.

Landaj Asocioj kaj fakaj organizoj de UEA, kiuj deziras provizon por kongresoj k.s. bonvolu informi Aŭstralian Esperanto-Asociacion.

Membroj de AEA, kiuj ne ricevis ekzemplerojn dum la kongreso en Adelajdo aŭ pere de siaj lokaj organizoj, bv. peti ekzemplerojn ĉe la Sekretario, AEA.

## CORRECTION and APOLOGY

I have received a courteous note from Mr. "Mac" Le Fevre, whose biography appeared recently. Though he endorses my statement about the "warmth and depth of feeling" he experienced in a Siberian hospital, he denies, with embarrassment and (albiet restrained and polite) indignation my remarks about physical conditions and medical practices—remarks which I wrongly attributed to him.

I try to ensure that "Who's Who" is authentic in spirit and in fact so that I hasten to state that Mr. Le Fevre did **not** speak so critically of the hospital and to express my sincere apology that I have misrepresented him in putting into his mouth words which were never in it, but came out of another's.

Some of my article about "Mac" was based on a (now proved to be faulty) recollection of interesting conversations

I had with him at the Sydney Congress more than a year before. I have also had many interesting conversations with various people who have, like me, had enjoyable holidays in Russia. Obviously, I have "telescoped" some things which "Mac" **did** say with anecdotes told by other people who, though having a high opinion of present-day medicine in USSR had seen or heard of crude methods in a far distant time and place.

I do hope that he — and you — can "out of your charity" forgive "an absent-minded non-professor", who genuinely regrets any inconvenience occasioned. —Arthur Cocking.

**FONTO:** La nova literatura revuo, plena de interesaj rakontoj kaj noveloj, aperas ĉiumonate, mendebla ĉe Ken G. Linton, \$13.50.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 195 (275)

MELBOURNE

Marto, 1982

## MALVARMA aŭ FRIDA ?

Precipe por tiuj, kiuj ne konas la lingvojn, el kiuj Esperanto ĉerpas sian vortostokon, la prefikso **mal** estas tre tempoŝpara elpensajo. Sed ekde la komenco la esperantistoj kaj speciale la poetoj emis trovi radikvortojn por anstataŭi **mal**-vortojn, ekz. **strikta** por **malvasta**, **frida** por **malvarma**, **aperti** por **malfermi**. En sia **Lingvo kaj Vivo** (p. 247) Gaston Waringhien opiniis tiun eviton de **mal**-vortoj unu el la tri ĉefaj fontoj de neologismoj.

Unu tre evidenta kialo, almenaŭ ĉe poetoj, estas, ke preskaŭ ĉiam la anstataŭa vorto estas je unu aŭ du silaboj malpli longa ol la **mal**-vorto, kio plifaciligas la metrikan de nia multsilaba lingvo. Sed pli grava motivo por limigi la uzon de **mal** estas, ke la menso atingas la signifon de **mal**-vorto nur laŭ ĉirkaŭvojo. Oni devas unue nur registri, ke temas pri "malajo" sen semantika enhavo; tiam venas la radikoj, kiuj plenigas la semantikan kategorion, sed fine oni devas maligi ties enhavon. La signifoplena parto de **malvarma** lasas sur la menso ĝuste tiun impreson, kiun la tuta vorto neas; dum la signifo de **frida** impresas sin rekte kaj klare (kondiĉe ke oni jam konas la vorton!). Pro tio multaj plendas, ke la **mal**-vortoj estas psihologie palaj, eĉ netaŭgaj. Tia argumentado estas certe atentinda, sed ĉi ne devas konsenti kun Kaloĉaj en lia aserto, ke **malmola** impresas pli mola ol **mola** mem! Tiu opinio fontas el la

hungara prononcmalmaniero; la hungara **á** tre similas al nia **a**, sed ilia **a** sen super-signo tre proksimiĝas al nia **o**. Sekve hungaro ja emus diri **molmola** . . . sed oni ne atendus tian pekon el la buŝo de tia giganto de la internaci-lingva literaturo!

La nederlandano Faulhaber, kies edzino estas el Ĉeĥoslovakio kaj kies hejma lingvo estas Esperanto, rifuzas akcepti la argumenton pri la nerekteco de la **mal**-vortoj. Se oni konstante diras **malvarma**, la menso kutimiĝas ricevi la impreson de la tuta vorto, kvazaŭ **malvarm**-estus mem radikoj; oni ne analizas ĝin kiel **mal+varma**. Faulhaber prave aldonis, ke tiaj vortoj ekzistas en la naciaj lingvoj. Ekzemple, la angla vorto **impossible** rekte efikas kiel tutaĵo sur leganto aŭ aŭskultanto anglalingva. Ĝuste, sed ankaŭ la respondo de Faulhaber nur iommezure validas, ĉar kompare kun Esperanto la naciaj lingvoj havas limigitan nombron de tiaj **mal**-vortoj, kaj ĝuste ilia relativa malforteco reliefigas ilian tutvortan signifon.

Estas interese kompari la sorton de **mal**-kaj **ino**. La funkcio de ambaŭ afiksoj estas duonigi la lernendan vortostokon sur iuj kampoj. Neniu plu protestas pri la **ino**-vortoj; ekzemple, kvankam la radikoj de **patrino** senambigue elvokas "masklan" signifon por la parolantoj de tre multaj lingvoj, neniam oni aŭdas pri projekto por forigi tiel gravan vorton kaj anstataŭigi ĝin per

**matro** aŭ io simila. Kial tiu malsama reago al du afiksoj, kiuj unuavide havas tre similajn funkciojn?

Verŝajne pro tio, ke ino aldoniĝas nur al tre specifa vortkategorio, nome vivajoj, kies membroj konsistas el du seksoj. La originala decido de Zamenhof doni al la radikvorto "masklan" signifon kaj derivi la inan eble spegulisian "vircentrismon", sed gramatike la derivregulo estas ege facila kaj neniel arbitra. Aliflanke, **mal** povas aldoniĝi al multe pli vasta gamo da vortoj, sed ofte la decido, kiu vorto estu radika kaj kiu estu la **mal**-vorto, devas esti arbitra.

Kial ne **frida** kaj **malfrida** anstataŭ **varma** kaj **malvarma**? Aŭ **aperti** kaj **malaperti** anstataŭ **fermi** kaj **malfermi**? Aŭ **post** kaj **malpost** anstataŭ **antaŭ** kaj **malantaŭ**? Krome oni teorie povus elimini ekzistantajn vortojn per apliko de **mal** al iliaj malajoj; ekz. **malkun** povus anstataŭ **sen**, eĉ **malne** povus igi **jes** superflua — ŝerco oni parolas pri **malmaŭgi** kaj **maltrinki** . . . La ebla listo de tiaj groteskajoj estas senfina. Alivorte, la elekto de radikvortoj, al kiuj oni alroĉu **mal**, ne baziĝas sur io nature donita, sed sur konvencio; do la tento spiti al tiu konvencio estas multe pli forta, ol estus la emo defii la sekse determinitan uzon de **ino**.

Alian faceton de la problemo de la **mal**-vortoj Claude Piron sprite pritraktis en **Esperanto** de julio-aŭgusto 1977. Iu estis proponinta, por eviti la plumpecon de la frazo

**La malbela maljunulino mallaŭte malfermis la pordon al sia kelo kaj malrapide malsupreniris la ŝtuparon** alternativon, kiu ŝajnis al sia verkinto multe pli eleganta:

**La turpa oldulino softe apertis la pordon al sia kelo kaj lante descendis la ŝtuparon.**

Piron kondamnis la lingvon de tiu "solvo" kaj nomis ĝin iu "okcidenta dialekto" — kaj prave! Li mem proponis version en "tutmonda Esperanto":

**La malbela grandaĝulino kviete malfermis la pordon alkelan kaj trunkvilpaŝe desupris laŝtupare.**

Anstataŭ ses **mal**-vortojn li uzis du. Sed Piron estas lertulo; verŝajne granda plimulto el niaj samlingvanoj, se ili devus esprimi la ideojn en la citita frazo, produktus ion tre similan al la teda kaj peza unua citaĵo.

Resume do: la prefikso **mal** estas utila kaj havenda; sed ekzistas motivoj diversgrade validaj por popaŝe anstataŭigi **mal**-vortojn per neologismoj kun pozitiva semantika enhavo. Aliflanke kaj paradokse, se Esperanto iĝos multe pli parolata en la ĉiutaga vivo, estas eble, ke la **mal**-vortoj alprenos rektan impresivon sendependan de la "ĉirkaŭvoja" kompreno pere de **mal**+radiko; tion decidus nur postaj generacioj. Ĉiukaze la apudmeto de multaj **mal**-vortoj grave pekas kontraŭ bona stilo.

—TREVOR STEELE.

## PENTRAJOJ DE AŬSTRALIAJ INDIĜENOJ SUR ARBOTRUNKAJ ŜELOJ. EKSPOZICIO EN LA VIENA ETNOLOGIA MUZEO.

Ĝis la fino de marto la viena Etnologia Muzeo gastigas rondvojaĝantan ekspozicion de strange unikaj ekzotikaj kulturdokumentoj, nome de figuraĵoj pentritaj de aŭstraliaj indiĝenoj sur tiucele lerte preparitaj, glatigitaj pecoj da arbotrunka ŝelo. Jam la plurkolora afiŝo invitanta al vizito ĉe la enirejo kaj montranta troige proporciitan kangaŭon, per lanco ĉasitan de viro alu-metforme skemigita, ekkonigas, kias-tilaj tiuj pentraĵoj aspektas. La reproduktita specimeno povus sambone inviti al ekspozicio pri modernisma arto. Certe, tio ne estas hazardo, ĉar iu aŭ alia modernisma skolo ja tutintence imitas — laŭ sia doktrino — la primitivulojn.

Sed la surŝelaj originalaĵoj de la aŭstraliaj indiĝenoj fontas, kompreneble, el motivoj multe aliaj ol tiuj de imiteme sterila modernisto. Informas nin tiurilate interesa folio disponigita al ni de la

Aŭstra-aŭstral'a Societo, kun kiu la vienaj Esperantistoj jam delonge interrilatas amike.

Laŭ tiu informilo, la arto, pentri sur ŝelpecoj, devenas de la mitologiaj bildoj, kiujn la indiĝenaj prapatroj desegnadis ekde antaŭ 30 000 jaroj sur la rokaj muroj de malfacile alireblaj kavernoj. Same kiel tiuj rok-desegnaĵoj ili suplementas la sakrajn buŝajn tradiciojn kaj estas, sekve, esenca parto de la triba religia vivo. Sed tute ne ĉiu tribano rajtas fari pentraĵon. Tio estas, kontraŭe, privilegio de malmultaj, heredigata de patro al filo, rilate al k a j la arta tekniko k a j la sampene lernataj signifoj de ĉiuj unuopaj signoj. La pentraĵoj mem havas misteran karakteron, kies sekreteco estas jaluze gardata. Ekvidu ilin neniu profana, vulgara okulo! Rompojntojn de tiu malpermeso trafas severaj punoj, fojfoje eĉ la morto.

La ekspoziciataj ŝel-pentraĵoj venis el

porindigena rezervejo nomata O e n - p e l l i, kie vivas nun 600 homoj. Oni komencis tie, kvazaŭ en renesanca aspiro, revivigi kaj ilustru per ŝelpentradado la elpratempajn mitojn, reaktivigante ankaŭ la malnovajn kultajn ritojn, por savi el forgeso la kulturajn valorojn de la triboj.

**D-ro Karl Beckmann** en la Esperanto-Elsendo de Radio Vieno.

### KOSMA FENOMENO

Kia spektakla vidaĵo! Mi ĵus revenis de "Skeleton Point", unu el la plej orientaj duoninsuloj de Tasmanio, kien mi iris por pli bone vidi la stelbrilan ĉielon. Ankaŭ por vidi speciale la ĉi-periodan fenomenon de la planedoj. Dum kelkaj semajnoj la naŭ planedoj aranĝiĝas ĉe la sama flanko de la suno.

Nuntempe videblaj per la nuda okulo estas: Marso, Saturno kaj Jupitero, proksimume sur la sama ĉiela loko, kaj Venuso kaj Merkuro en alia loko.

La fenomeno konsistas en la fakto, ke je la 10-a de marto ĉiuj planedoj estos pli en rekta linio ol iam ajn dum la venontaj 500 jaroj.

En Tasmanio ĉe la longitudo de 148 gradoj eble la plej bona horo por vidi ĉiujn videblajn planedojn estos je 30 minutoj antaŭ la 6-a matene, tio estas proksimume je tri kvaronoj de horo antaŭ tagiĝo. Je ĉi tiu horo Marso, Saturno kaj Jupitero troviĝis iomete okcidente de la norda meridiano kaj iomete oriente de la brila stelo 'Spica'. 'Spica' troviĝos meze inter la bonkonataj steloj 'Regulus' (en la konstelacio

'Leo', aŭ en la pli bona parto de la konstelacio konata kiel 'La Serpo') kaj 'Antares' (la plej brila stelo en la konstelacio 'Skorpio').

Je la sama horo malproksime oriente troviĝos la brilega planedo 'Venuso' aspektante kiel granda lanterno pendigata sur la ĉielo — oni ja ne povos maltrafi ĝin. Eta 'Merkuro' troviĝos iomete malsupre de granda "Venuso" kaj iomete pli oriente. Estos facile konfuzi proksimajn stelojn kontraŭ 'Merkuro', do, por pli bone identigi la etan planedon oni povos kontroli sian elekton dum la ĉielfo pli lumigis pro la alproksimiĝo de la sunleviĝo: 'Merkuro' estos (esceptinte 'Venuso'n) la lasta brilaĵo kiu malaperos en tiu regiono de la ĉielo.

Do, kvin el la naŭ planedoj estos nudokule videblaj dum la pasonta fenomeno. Oni devas ankaŭ kalkuli nian teron — por vidi ankaŭ ĝin necesas nur rigardi ĉe la piedoj, ĉar ni staras sur nia propra tero.

La planedoj Urano, Neptuno kaj Plutono estas tiel malgrandaj kaj tiel malproksimaj de la suno, ke ili ne estas videblaj sen altpotenca teleskopo. Sed rimardinde ankaŭ ili estos en la sama linio kiel la aliaj planedoj videblaj.

Kun mezpotenca teleskopo oni povas vidi kvar el la lunoj de Jupitero ankaŭ la spektaklajn ringojn de Saturno, kiuj estas en bona pozicio (geometrie) nuntempe.

Do, ĉiuflanke je ĉi tiu momento en 1982 ekzistas rimarkinda planeda fenomeno por ĉiuj facile videblaj (Tasmanio, 28-2-82). — Mac Le Fevre.

### EDWIN WREFORD CHANDLER, F.A.E.A.



Naskiĝis 7-6-1905 ĉe Mooroolbark, en Viktorio, Majo, 1917 li trovis hazarde Esperanto-lerolibron. Instruis sin mem. Kiel instruisto, li interesiĝis pri "Esperanto en la lernejoj". Li aliĝis al Internacia Ligo de E-Instruistoj. En 1951, li fondis "Aŭstralia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"n kaj fondis "Klerigo"n, oficialan organon de A.L.E.I. Samjare li organizis kaj surmurigis en la Urbdomo de Sidnejo, la unuan mondskalan Ekspozicion de Infanaj Artverkoj en Aŭstralio.

En 1955, li kaj S-ino Grace Barlow, prezentis antaŭ la "Secondary Education Survey", la "Argumentaron por la Instruado de Esperanto en Duagradaj Lernejoj". Li fondis, kune kun kolegoj en aliaj landoj, la unuan Internacian Lernejan Familion, kiu fariĝis "Grajnoj en Vento", oficiala fakdo de UEA.

Li dufoje gajnis la Premion Simondetti per tezoj pri "Aŭstraliaj Birdoj", la unua duobla laŭreato de tiu Premio. En

1974 li estis elektita Prezidanto de Ornitologia Rondo Esperantlingva, kaj tenis tiun oficon sep jarojn. En 1981, li estis elektita Honora Dumviva Prezidanto de O.R.E. En 1975 li prezidis ĉe la Fak-kunsido de O.R.E. ĉe la Universala Kongreso en Kopenhago, la unua aŭstraliano, kiu iam ajn prezidis ĉe kunsido en la kadro de U.K. En 1977, li prezidis ĉe la fak-kunsido de Veterana Esperantista Klubo, en Rejkjaviko.

Kiel sekretario de la Esperanto-Federacio de N.S.K., li fondis kaj dum 5 jaroj redaktis "Telepeo"n, la oficialan organon de E.F.N.S.K. Li estas fak-

delegito en UEA por Arto kaj Abelbredado. Kiel emeritulo, li daŭre laboradas por Esperanto.

## LA HISTORIO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTISTA ORGANO.

Ĉe la Unua Aŭstralia Esperantista Kongreso en Adelajdo en la jaro 1911 oni aspiris al Aŭstralia Esperantista gazeto, sed tiu ambicio ne efektiviĝis ĝis 1920, kiam la unua numero eldoniĝis en julio. Nia unua organo, "La Suda Kruco" estis la rekta sekvo de la kongreso en Sidnejo en tiu jaro, kiam elektigis komitato por eldoni tiun gazeton, kaj, aldone, disponis la restaĵoj de siaj enspezoj por fondi ĝin.

La unua redaktanto estis Arthur Maurice Hyde, pri kiu la Enciklopedio de Esperanto raportis: "Li estis anglo, kiu adoptis la pseŭdonimon "Antoni Delsudo", ŝtatoficisto, kiu naskiĝis la 5-an de aprilo, 1891, en Melburno. Li fariĝis prezidanto de A.E.A. en 1921, starigis Esperanto-kurson inter ĉinoj en Novgvineo, estis aŭtoro de lernolibro en 1918, verkis kunlabore kun Lauri Laiho, finno, "Aŭstralia, Lando kaj Popolo" en 1927, kaj estis la unua redaktanto de "La Suda Kruco".

Dum kelka tempo "La Suda Kruco" estis kompostata per ordinaraj preslitteroj, sed en januaro, 1921, la administrantaro akiris provizon de Esperantaj preslitteroj. Kiam Maurice Hyde translokiĝis al Novgvineo en 1921, surpris la redaktadon Charles William Ballard, pri kiu la Enciklopedio raportis: "Angla kontisto, kiu naskiĝis la 12-an de junio, 1867, en Edgware apud Londono. En lia kvina jaro lia familio translokiĝis al Novzelando. Li estis pioniro de stenografio; dum dudek jaroj li dediĉis unu vesperon ĉiusemajne al la instruado de Esperanto; estis prezidanto de Komerca Esperanto Klubo en Melburno, kaj estis redaktanto de "La Suda Kruco" dum kelkaj jaroj". Li partoprenis la Unuan Esperanto-Kongreson en Adelajdo, prezidis la Kvaran en Sidnejo en 1923, kaj en 1924 li transdonis la redaktadon de la gazeto al Percy T. B. Hudson, la tria redaktanto, kiu, tamen, je la fino de 1925 devis iri al Sudafriko kaj Sudameriko, kiam Ballard denove transprenis la redaktadon. Tamen, lia sano tiel malboniĝis, ke li devis redoni la redaktadon al Percy Hudson, kiu ne nur redaktis, sed finance subtenis la gazeton ĝis 1929, kiam li devis vojaĝi al Hindio.

La kvara redaktanto estis Frank Reginald Banham. Se la membroj de tiu

tempo esperis, ke la konstanta ŝanĝiĝado pri redaktado ĉesos, ilia espero ja plenumiĝis, ĉar li redaktis tiun gazeton ĝis sia morto en aŭgusto, 1974, periodo de 45 jaroj. Kiel raportis Enciklopedio de Esperanto: "Frank Reginald Banham estas anglo, korektisto, kiu naskiĝis la 11-an de aprilo, 1898 en Lowestoft. Li alvenis al Aŭstralio en decembro, 1914, tuj post la komenco de la Unua Mondmilito. Li akiris la diplomon de B.E.A. en 1926, kaj fariĝis redaktanto de "La Suda Kruco" en 1929. Li edbiĝis kun Hilda Dawes, esperantistino kaj ankaŭ diplomito de B.E.A. en februaro, 1931. Li estis kunlaboranto de la Enciklopedio". Li ne nur redaktis, sed altigis la nivelon de nia organo ĝis tiu grado, ke ĝi meritis kaj ankoraŭ ĝuas la altan estimon de la cetera Esperantista mondo.

En tiu stato mi trovis ĝin, kiam mi esperantiĝis en majo, 1931. Tamen tiu ondo de sukceso trafiĝis en malprospero en la sekvinta jaro, kiam ĝi ĉesis aperi, kaj ne reaperis ĝis la jaro 1941, sed tio markis novan etapon en ĝia historio.

Tiu najbara silento finiĝis en la jaro 1941, kiam la aŭstralia movado vidis la aperon de nova organo. Dum la Dua Mondmilito e tiŝ tre malfacile akiri la necesajn materialojn por aperi gazeton, sed tion la movado sukcesis fari sub la redaktado de Reg Banham kaj la helpo de du fraŭlinoj en Adelajdo, F-ino Win Addis kaj Fraŭlino Bailey, kiuj prizorgis la tajpadon, mimeografion, pingladon kaj ekspedadon dum la ceteraj mondmlitaj jaroj sub la nomo de "La Rondo".

En la jaro 1947, kiam la Mondmilito estis jam finiĝinta, nia organo reviviĝis, ankoraŭ sub la nomo "La Rondo", sed nun ĝi estis bone presita kaj akiris la aspekton kaj formaton, kiun ĝi retenis ĝis hodiaŭ.

En la jaro 1958 ĉe la Dekunua Esperanto-Kongreso en Melburno la nomo ŝanĝiĝis al la nuna "Australian Esperantist", sed en la jaro 1974, la movado suferis la fortan baton de la morto de Reg. Banham. Herbert Koppel, aŭstro, kiu alvenis al Melburno en 1948, kaj tuj vigle partoprenis la movadon en sia adoptita lando, surpris la gravan rolon de redaktanto, kaj ni povas fiere diri, ke ĝia nivelo neniam



estis pli alta. Sub sia kvina redaktanto ĝi atingis sian sesdekan datrevenon en julio, 1980. Ankaŭ lia edzino estas esperantistino. Li renkontis F-inon Fay Andres ĉe la 7-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en 1950, edziĝis kun ŝi en la sekvinta jaro, kaj al li ni ĉiam estos dankaj, ke li instigis niajn dujarajn esperantistajn kongresojn. Lia edzino nun estas Aŭstralia Norma Klereca Diplomatino. — Ken G. Linton.

**“FONTO”:** La peranto, Ken Linton, nun disponas provizon da specimenoj de la nova beletra revuo. Ili estas haveblaj kontraŭ pago de la afranko, 45 c.

## EL NOV-ZELANDO

La 47-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazis de la 6-a ĝis la 10-a de januaro, 1982 en la loĝdomo ‘Te Kaihanga’ en Christchurch. Ĉeestis 34 personoj, inkluzive de S-ino C. Thornton el Ipswich, Anglujo.

Malfermis la kongreson S-ro Alan Dingwall, konata pro sia agado en ekleziaj kaj edukaj cirkloj. Kvankam ne esperantisto, S-ro Dingwall dum multaj jaroj simpatiis kun la celoj de la Esperanto-movado.

S-ino Rita Aagaard (Auckland) parolis pri la Universala Kongreso en Brazilia kaj montris belajn lumbildojn. S-ro Fred Wood (Auckland) raportis, ke S-ino Yvon Canty, kiu mortis en 1981, postlasis \$10.000 al la Esperanto-movado, sed ke oni ankoraŭ ne decidis kiamaniere uzi la testamentaĵon.

Okazis 3 lingvaj sesioj; i.a. Prof. C. J. Adcock parolis erudicie pri la eterna ‘ata/ita’ demando. En la distra parto de la programo okazis legado de poezio, vortludoj, kantadoj kaj la grupoj de Auckland kaj Masterton prezentis teatraĵojn.

Oni elektis la jenan estraron: Prez: S-ro J. T. Allan; Vic.-Prez: S-ro Ralph Dearnley; Gen. Sekretario: S-ino M. Richardson; Kasisto: S-ino M. Wansbrough; Redaktoro kaj Libro-Peranto: Majoro H. W. R. Petersen; Eduka Oficisto: Prof. C. J. Adcock; Konstanta Kongresa Sekretario: S-ro Fred Wood (Auckland).

La venonta kongreso okazos en januaro, 1983 en Masterton (Norda Insulo).

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun’iči Išizaki)

En multaj urboj de Japanio okazis Zamenhofaj Festoj kaj spaco permesas menciigi nur kunvenojn en la pli grandaj urboj.

En la ĉef-urbo **Tokio** kunvenis 80 esperantistoj. La kurso de la Esperanto-Rondo de oficistoj de la Metropola Gubernio kantis, F-ino Tosima prelegis kun diapozitivaj pri sia vojaĝo tra Aŭstralio kaj la junulara teatra trupo OJJ prezentis “La Eta Princo”n.

En **Yokohama** 65 esperantistoj el la gubernio Kanagawa kunvenis en la Universitato. Proksimume 40% de la ĉeestantoj estis junaj studentoj. Oni prezentis filmon pri “Bonzo Ikkyu” kaj okazis vigla diskuto kiel vekigi intereson al Esperanto inter la ĝenerala publiko. Ĉeestantoj aĉetis librojn de la bona Libro-stando je valoro de 120.000 enoj (proks. \$500).

En **Nagoja** kunvenis 76 esperantistoj en la Centro de Laborista Kulturo kaj aŭskultis al prelego de S-ro Wakao, kiu parolis pri ‘Humanismo de Verda Majo’ (S-ino Hasegawa Teru), kiu aktivis antaŭmilite en “batalanta Ĉinio”. Okazis vasta programo de distraĵoj kaj manĝoj kaj la ĉeestantoj aĉetis librojn de la Libro-stando por 130.000 enoj (proks. \$510).

Popularaj aranĝoj inter japanaj esperantistoj estas la t.n. “Kunloĝadoj”, speco de seminarioj por plibonigi en la lingvo kaj historio de Esperanto. Lastatempe okazis kunloĝadoj (tri-tagaj) en la urbo Kumamoto en suda Japanio kaj en la urbo Yokosuka. La lastnomitan organizis la ligo de E-grupoj en Tokio.

# AŬSTRALIA- =KRONIKO

Pro la longa kongres-raporto ni ne havis spacon por publikigi la multajn novaĵojn de la kluboj. Ili nun sekvas telegramstile:

● **PERTH:** Preskaŭ 50 ĉeestantoj partoprenis je 15-a de dec., 1981 la Zamenhofan Feston en la ‘Nedlands College of Advanced Education’. Post la memserva ĉefmanĝo S-ino Vera Payne faris la festparoladon. F-ino J. Walker prezentis paroladon kaj Chris. Dean kaj Rene Smeets estris loterion. Membroj de la ‘Lunda Grupo’ prezentis la amuzajn teatraĵojn ‘Cindrulino’.

La Ĝenerala Kunveno elektis la saman komitaton kiel en 1981. D-o Prezidanto estas denove Jack Hawks, Vic-Prezidantoj Rene Smeets kaj Rafaele Alvaro, Sekretario Chris Dean (207 Brisbane St., Perth), Kasisto S-ro O. Toneragan kaj Bibliotekisto S-ino Dolly Dean.

La Ligo partoprenis ankaŭ en 1982 en la t.n. "Hyde Park Festivalo". Laŭ linanca vidpunkto la Festivalo estis tre sukcesa. Ni gajnis monprofiton de \$600, per vendo de plantoj, diversaj varoj kaj trinkaĵoj. Centoj da vizitantoj vizitis la tendon de la Ligo, rigardis la multajn Esperanto-librojn kaj afiŝojn, aŭ aĉetis ekzemplerojn de "Esperanto for Beginners". Ni esperas, ke almenaŭ kelkaj interesitoj aliĝos al kurso.

Je 24/2 ĉeestis 13 anoj. S-ro Smeets parolis pri poetoj kaj poezio. Je 10/3 Vera Payne legis artikolon de Marjorie Boulton el "Monato" kaj D-ro Einihovici el "Heroldo de Esperanto".

● **ADELAJDO:** Je 17/2 okazis nia unua kunveno por 1982 en la Universitato. Estis nia Ĝenerala Kunveno kaj ni elektis la sekvantan estraron: Prez: George Clarke; Sekretario kaj Bibliotekisto: Bob Felby; Kasisto: Beryl Randles; Libro-Peranto: Audrey Felby; Komitatanoj: Thea v.d. Boogaard, Audrey Felby kaj Bert Onn. Estis decidite, ke la kotizo restu la sama kiel dum la pasintaj 2 jaroj.

Ni decidis pli ofte reklami kaj kiel sekvon de la reklamo ni komencis kurson en la vesperlernejo.

Je 8-a de marto ni denove kunvenis en la Universitato. Bonvena gasto estis Shirley Fanos el Sidnejo, kiu vizitis Adelajdon por partopreni la "Semajnon de Verkistoj". Ni decidis aranĝi vesperkurson ankaŭ je merkredo, do ni nun instruas merkrede, vendrede kaj dimanĉe.

Shirley Fanos faris paroladon pri la agado de la klubo en Sydney kaj ni ĉiuj legis partetojn el libro de Raymond Schwartz "Kun Siaspeca Spico". Tio vekis eksplodojn de rido.

—Bob Felby.

● **MELBURNO:** Ĉe la Zamenhofa Festo je 12-a de decembro, 1981 en la halo de la skoltinoj, ĉeestis nur 32 personoj. La kaŭzo estis striko de poŝtistoj, kiu malebligis la ĝustatempan avizon al ĉiuj esperantistoj en la Melburna regiono. Okazis varia programo. La grupoj de Malvern, Oakleigh kaj Waverley prezentis muzikon, kantadon kaj skeĉojn. S-ino Fay Koppel prezentis "mini-biografion" pri Marjorie Boulton kaj S-ro H. Koppel legis ŝerpeojn de Raymond Schwartz S-ro Jan Makowski, nove alveninta esperantisto el Pollando, faris paroladon pri la temo "D-ro Zamenhof kaj lia verko." David Rockell, krom prezenti nekutiman muzikon, skizis la Federacian agadon dum 1981.

Unike interesajn vesperojn spertis la anoj de la Melburna E-Societo je 15-a kaj 22-a de marto, 1982. Du interesaj

eksterlandaj vizitantoj vizitis nin kaj prelegis. S-ro Christian BERTIN, juna komputera inĝeniero el Rennes (Francio), vizitis Aŭstralion por partopreni internacian konferencon de komputera inĝenieroj. Li parolis pri la E-movado en sia hejmurbo Rennes, kie li estas la loka UEA-delegito, kaj pri la historio kaj nuna stato de la "Kultura Esperanto-kastelo" en Gresillon.

El la batal-plena Meza Oriento vizitis nin S-ro Jera miel GILADI, kiu naskiĝis en Pollando, sed nun vivas en Kfar-Saba, urbo 25 kilometrojn norde de Tel-Aviv. Li estas la landa sekretario de ELI, la Esperanto-Ligo de Israelo, kaj li prelegis pri siaj variaj travivaĵoj kaj pri la E-Movado en Israelo.

● **KANBERO:** La Ĝenerala Kunveno okazis la 1-an de marto, 1982 en la Instituto pri Internaciaj Aferoj. La raporto de la Prezidanto kaj de la kasisto estis akceptitaj kaj la kunveno elektis la sekvantan Estraron: Prez: Ralph Harry; Vic-Prez: Patti Anson; Sekretario: Marjorie Ellyard; Kasisto: Brenda Birkett; Bibliotekisto: Katherine Lewis; Redaktoro: (KEK Kuriero) Marjorie Allnutt.

● **MANLY:** Niaj membroj partoprenis 12-12-81 en la Zamenhofa Vespero, aranĝita de la N.S.K.-Federacio en la E-Domo en Redfern. Les Scott faris la festparoladon, Marjorie Duncan gvidis la programon kaj aliaj distris la ĉeestantojn per kantoj kaj skeĉoj.

La postan tagon 40 membroj kaj vizitantoj kunvenis por Kristnaskfestoj en la hejmo de Marjorie Duncan. Post naĝado ĉe la apuda marbordo, ĉiuj ĝuis bongustan lunĉon — preskaŭ bankedon — kaj sekvis kantado de Kristnaskkantoj.

Ni estas feliĉaj raporti, ke nia maristo, Ann Cash, sekure revenis al Aŭstralio post sia longa sola vojaĝo trans la Pacifiko.

Post la feria periodo ni re-kunvenis je 2-a de februaro por la 22-a jar-kunveno. Elektiĝis: Prez: Robbie Robertson, Vic-Prez: Frank Preacher kaj Judith Hannah; Sekretario: Betty Cleminson; Kasisto: Frank Mangan; Bibliotekisto kaj Libro Agento: Helen Stone.

La Ora Insigno por dumviva membreco de la klubo estis prezentita al Robbie Robertson pro lia sukcesa kaj bonhumora laboro kiel Prezidanto kaj instruisto dum multaj jaroj.

Ĉe la Vespera Lernejo la 9-an de februaro komenciĝis kvin kursoj inkluzive klason de komencantoj.

Finfine la partoprenintoj de la 23-a Aŭstralia Kongreso en bela Adelajdo

deziras kapti la okazon por esprimi dankon al la LKK pro treege ĝuinda sperto en Esperantujo. —Eunice GRAHAM

● **SIDNEJO:** Je 8/2 diversaj anoj parolis pri la Adelajda Kongreso. Ĉiuj ĝuis ĝin. La ekskursoj, la seriozaj kaj distraj kunvenoj kaj la amikeco restos longe en la menso de la partoprenintoj. Ni bonvenigis S-inon Schwerin kaj S-ron K. Smith de la Manlia grupo.

Semajnon poste okazis la jarkunveno. La Societo havas sufiĉan monon en la banko kaj aliaj financaj instancoj kaj la nombro de membroj restas simila al la pasintjara. Elektigiis: Prezidanto, Sekretario kaj Raportistino: M. Chaldecott; Vic-Prez: T. Elliott kaj J. Harwood; Kasisto: S. Fanos; Bibliotekisto: J. Harwood; Kaskontrolo: B. Hart kaj D. Gould. Wre Chandler restas nia Dojeno.

Je 22/2 membroj rakontis pri "Feriaj Agadoj". Je 1/3 M. Chaldecott prezentis kelkajn "Falsajn Amikojn", ĉefe tiujn kiuj estas falsaj por francoj. La temo de la 8-a de marto estis: "Ferie mi legis . . .", sed ŝajne nur 3 legis ion interesan. W. Chandler menciis la Esperanto-tradukon de 'Kon-Tiki', kiun li legis lastatempe.

—M. Chaldecott

● **BRIZBANO:** La 1-an de februaro la Societo denove kunvenis kaj la 5 klasoj ĉium lundvesperon denove stas starigitaj. Bedaŭrinde ni ne gajnis plensukcesan respondon al nia reklamado pri komencantoj, do ni daŭre propagandiĝ per antaŭ-urbaj gazetoj por plibonigi tiun situacion. Brizbananoj, kiuj ĉeestis la 23-an Kongreson en Adelajdo, esprimas

sincerajn dankojn kaj gratulojn pro la tre ĝuinda kaj sukcesa kongreso.

—R.R.

● **TOOWOOMBA:** 15/10/81: Ekspozicio de libroj, poŝtkartoj, revuoj, k.s. estis aranĝita en la urba biblioteko, kie ĝi restis dum unu monato.

5/12/81: La Zamenhofa Festo, sperte organizita de sekretariĝo Sandra Connors, estis ĝuplena societa okazo.

19-21-22/2/82: Ekspozicio de Esperantaĵoj en la kadro de 'Hobby 'n' Craft Spectacular', organizita de Rotaria Klubo de Suda Toowoomba. Estis 150 budoj, kaj centoj da spektantoj malgraŭ sufoke varmega vetero.

Kvin progresantoj daŭre studas la lingvon (parte per la revuo "MON-ATO"), kaj kvin komencantoj ekstudis. Ankaŭ kelkaj petis informon pri korespondanta kurso, kaj kelkaj senlaborulinoj eklernas ĉe kunveno por ĝejujuloj senlaboraj. —Jean Lehane.

● **HOBARTO:** La 26-an de januaro AEA-Prezidanto Ralph Harry oratoris ĉe Bankedo de Aŭstralia Tago. La Guberniestro, Ĉefministro, Urbestro kaj 100 urbanoj ĉeestis. La temo de la prelego estis: 'Unu Nacio, Unu Estonteco'. S-ro Harry substrekis la neceson de komuna nacia lingvo, kun rekono tamen de etnaj lingvoj. En multkultura mondo oni ne povas havi egalecon se ne ekzistas komuna lingvo. Kvankam multaj personoj revas pri la angla, S-ro Harry esprimis sian firman kredon, ke la neŭtrala lingvo Esperanto estas la plej bona solvo de tiu problemo.

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 16 — RAY ROSS OF GOOD PIONEER STOCK

Preamble: This is an experiment. I am indebted to Roger Springer, who has used this method so effectively in the bilingual plays he has presented on radio.

Me: So you were born in Rossville.

Ray: Ne ekzistas Rossville, laŭ mia scio. En la jaro 1863 mia avo rajdis surĉevalo 40 kilometrojn al la oficejo de mineraloj ĉe Warwick, portane sakon da "peza, nigra sablo". La rezulto estis la stanaj kampoj de Stanhope.

Me: So the "bagful of heavy, black sand" which your grandfather had taken by horseback, 40 miles to the assay office in Warwick, was tin ore. Your grandfather had discovered tin!

Ray: Mi naskiĝis en Stanthorpe ne Rossville.

Me: A pity that the town which mushroomed was not called Rossville, but Stanthorpe. However, Stanthorpe (Stannum — tin; Thorpe — town) wasn't a bad name.

Ray: Ne, bona ideo kaj bela loko. Mi naskiĝis en Stanthorpe kiu, tiam, estis regiono jam bone konata por fruktoj —ekzemple pomoj. Mi loĝis en fruktarbaro ĝis kaj dum la Granda Ekonomia Depriimo ĉirkaŭ 1930-34.

Me: You enlisted very early in World War 11, didn't you?

Ray: Jes, dum 1939 en la dua A.I.F. Mi estis sendita al Redbank, Brisbane.

Me: Anything interesting happen there?

Ray: Jes, tre interesa. Mi renkontis Peggy Poole.

Me: Did you marry her?

Ray: Ne tuj. Sed mi ja edziĝis kun ŝi dum 1942.

Me: Had you been sent abroad in the meantime?

Ray: Ho, jes! Dum majo, 1940 mi foriris sur la "Queen Mary" al Palestino. Sed, ĉar Italujo eniris la militon, ni ne atingis nian celon.

Me: Oh, because Italy had come into the war, you were diverted. Where did you go?

Ray: Al Britujo.

Me: I know it's a strange question, but did you enjoy Britain?

Ray: Strange, jes. La vetero, strange, estis tre agrabla. La pejzaĝo estis bela: mi tre ŝatis la urbetojn kaj vilaĝojn. Speciale mi estimis la spiriton de la homoj. Estis tempo de krizo. La foriro de Dunkirk estis ĵus okazinta.

Mi preskaŭ ĝuis mian sperton en la Meza Oriento, ankaŭ. En 1941 mi estis en Beirut. Kia bela urbo, tiam! Arboj kaj floroj laŭlonge de la stratoj. Kia kontrasto al la tragedio de hodiaŭ.

Me: Yes, what a contrast to the chaos of to-day. It's hard to think of Beirut as beautiful. But you were fighting, not holidaying in Lebanon. Didn't anything happen to you there?

Ray: Nu, jes. Mi ricevis malarion kaj mi estis tro proksima al kontaktmino; kiu forblovis min aeren, sed mi eskapis seriozan vundon. Mi estis bonŝanca!

Me: Yes only caught malaria and lost a bout with a landmine, but you were fortunate. That's certainly making molehills out of mountains!

Ray: Nu, tuj post mia reveno al Aŭstralio en 1941 mi edziĝis kun Peggy.

Me: And what family did you have?

Ray: Tri filojn. Bedaŭrinde, ni perdis nian plej maljunan filon en Vietnam. Grant, kiu estis licenciito de la Akademio "Dunroon" kaj oficisto de la Konstanta Armeo.

Me: You already knew something of the sadness of war, but the death of your eldest son must certainly have personalised it for you.

Ray: Ja, jes. Korŝire.

Me: Yes, heartrendering indeed. To get back to your war service. I suppose it continued after your marriage.

Ray: Ja. Mi estis en Novgvineo kaj Borneo dum tri kampaĵoj kaj post la Milito, fakte ĉis 1972, mi estis infanteria instruisto en la Konstanta

Armeo, ofte en Kvinslando. Ni loĝis kaj loĝas) en Sunnybank.

Me: Now somewhere along the line, you joined the ranks of the Esperanto Movement. I've seen and heard how confidently and fluently you have chaired Esperanto gatherings and I've been delighted by your acting in Esperanto plays. Tell me about that.

Ray: En 1961 oni sendis min al Rockhampton kaj dum la sekvanta jaro mi kaj Peggy, kiu estas bona kaj entuziasma Esperantisto — aliĝis al klaso por komencantoj. Heber Petley kaj poste John Moore estis niaj instruistoj. Poste, ni mem, iĝis instruistoj.

Me: So, in due course, you both became teachers, eh? You are now prominent in the Queensland Esperanto Federation's affairs. You also go to the Toowoomba Summer Schools, I believe.

Ray: Ho, mi petas! Ni ne estas gravuloj! Sed ni ŝatas helpi. Esperanto estas tre grava kaj tre ĝuinda parto de niaj vivoj.

—Arthur Cocking.

---

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita .....	\$32
S-ro W. Jaeger, Saratogo, NSW .....	90
S-ino Vera Payne, Perth .....	10
S-ro V. J. Timmins, Sydney .....	5
	\$137

---

## FONDUSO POR ESPERANTO-STIPENDIO

Antaŭe raportita .....	\$3500
S-ro L. M. Drummond, Melb. ....	5
S-ro W. Jaeger, Saratoga, NSW .....	100
Launceston Esperanto Club .....	1500
	\$5105

**Donacoj al Nov-Jorka Oficejo de UEA:**  
Manly Esperanto Club: \$100. Magdalena Rozsa, Orange, N.S.K. \$10.

**Aŭstrala Norma Elementa Diplomo:**  
Sukcesis kun honoro: William Leah, N.S.K.

**Nova Dumviva Membro de A.E.A.:**  
F-ino Cathy Sullivan, Brizbano.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 196 (276)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1982

## ROTARY CONFERENCE ON WORLD UNDERSTANDING AEA President Recommends Esperanto

On 28th March, in Albany, Western Australia, nearly 1,000 Rotarians and their wives applauded the suggestion by former Ambassador, Ralph Harry, that Rotary Clubs in Western Australia give Esperanto a boost.

The theme of the Conference was "World Understanding and Peace through Rotary" and at the invitation of the President of District 946, Ron Sloan, Mr. Harry included in his address "Beyond the Nation or Sovereign State" a section on the International Language. He said:

"A major barrier to international understanding and to efficient international organisation is the multiplicity of languages, with every country fiercely proud of its own. English is widely used in business, tourism and science, but is not acceptable as the sole official *lingua franca*. It is a language of an old colonial empire and of a newly-arrived super-power. In the United Nations there are already 6 official languages — Arabic, Chinese, English, French, Russian and Spanish with German given partial recognition and Hindi, Japanese, Malay, Portuguese, Swahili and others knocking on the door. It is

already costing the taxpayer of the United Nations, like Australia, about \$25,000,000 annually for interpretation and translation. And communication between delegates is probably less effective than when English and French were the languages of the League in Geneva.

Fortunately there is another option. Some years ago UNESCO recognised the value of *Esperanto*, the neutral language specially devised as a common international language. Recently UNESCO has been publishing some of its documents in Esperanto. I myself have thoroughly tested Esperanto and have seen it in action in many countries of all continents. It is a 'masterpiece of logic and simplicity', capable of expressing the whole range of human thought from the needs of a tourist to scientific and legal writing. Among its hundreds of thousands of advocates are many Rotarians. I hope Clubs in Western Australia will give Esperanto a boost this year, as a practical step towards international understanding and peace."

Thanks to a generous donation from Mr. L. V. Scott, of Manly, former Secretary of the Australian Esperanto

Association and a keen Rotarian, Mr. Harry was able to present each participant in the Albany Conference with a brochure answering the question: "Why Learn Esperanto?", giving "Esperanto at a Glance", and making the following suggestion:

"Rotarians have always been sympathetic towards the idea of a common world auxiliary language, the international language Esperanto, as an aid to the achievement of the Fourth Object of Rotary.

Some members have learned Esperanto and have formed the Rotarian Association of Esperantists (RADE) to facilitate their international links. They have found that, after a few months of part-time study they can readily communicate without interpreters.

The year 1982, when Clubs are looking for special projects to promote 'World Understanding and Peace through Rotary' the following action would be appropriate:

- (a) Secure a speaker to talk about Esperanto,
- (b) Form a group to learn the language,
- (c) Sponsor a local Esperanto society and help it get Esperanto into a school,
- (d) Support an Esperanto library and make sure there are also books in your Public Library,
- (e) Encourage young persons selected for Rotary exchange in non-English speaking countries to learn Esperanto,
- (f) Sponsor a student to study Esperanto at an overseas Educational institution,
- (g) Support efforts to get Esperanto into the State education system,
- (h) Encourage the Australian Government to work in UNESCO for international recognition and use of Esperanto."

A number of Clubs indicated that they would like to hear more about Esperanto. The President, Mr. Sloan, wrote as follows:

"I have been thinking about Esperanto quite a bit and am toying with an idea of trying to get groups of Rotarians in each Rotary District around the world (nearly 400 of them each consisting of 50 clubs and 2000

Rotarians) to learn and correspond in Esperanto and then to set up visiting groups between countries.

Rotary has what it calls International Fellowship Groups covering a wide range of activities, including golfing, flying, yachting, stamp collecting and it may well be we could reasonably quickly establish Esperanto fellowship from the many Rotarians world wide who no doubt are already well acquainted with Esperanto.

In other words, the base may already exist.

Such a proposal needs real objectives and strong sales argument to gain speedy movement and you may be prepared to guide me in these areas so that I can put together a major project to attract Rotary world wide to act.

In just 75 days the present theme, "World Understanding and Peace Through Rotary" will change to a new focus and a new administration and so I would like to come out now with something our present World President would feel to be a very meaningful contribution and attract his very substantial immediate support.

While the programme for our International Convention in Dallas USA in early June has been decided, I believe any really spectacular item could still gain entry. It could well be from our interest over many years, your astute knowledge and appraisal of world affairs and your thoughtful concern for the future of this planet you may have ideas Rotary as a vehicle could effectively pursue particularly regarding Esperanto. If you do, I would be happy to consider ways that may help to bring them to pass."

Mr. Harry has sent to Mr. Sloan, more information about RADE, and a list of 13 Delegates of the World Esperanto Association (UEA) in Australia, Brazil, Britain, Finland, France, Italy, Japan, Netherlands and Norway, whose speciality is Rotary.

He has suggested that Rotary International should join with UEA in advocating adoption of Esperanto as one of the projects in UN's Year of International Communication in 1983.

—RLH.



D-ro Arthur Baur en "Svisa Radio Internacia"

## LA BANKOJ EN SVISLANDO

Svisaj vojaĝantoj en Usono ofte devis observi, ke la usonanoj sciis nur du aferojn pri Svislando, unue ke ĝi ne havas virinan voĉdonrajton kaj due, ke la banka sekreto estas tre strikte observata. Mi ne scias ĉu ili intertempe lernis, ke la svisaj virinoj posedas ĉiujn politikajn rajtojn, sed mi scias, ke la banka sekreto estas io, kio daŭre ĉagrenas ilin, ĉar ili pensas, ke usonaj civitanoj, precipe usonaj krimuloj, profitas de ĝi.

Ankaŭ en aliaj landoj la svisaj bankoj ofte estas en la fokuso de la kritiko. Post la ĵuraj naciigoj de francaj bankoj kaj aliaj entreprenoj, oni rakontis en Francujo, ke multaj francaj kapitalistoj transigis sian monon al Svislando — la pruvoj de tiu aserto mankas —, en Londono oni nomas la svisajn bankistojn gnomoj kaj riproĉas, ke ili spekulaciis kontraŭ la puĉo — la pruvoj mankas —, kaj en Italujo oni riproĉas, ke svisaj bankistoj helpas italojn transigi sian monon al Svislando. Fakte okazis, ke unu svisa banka direktoro antaŭ nelonge estis kondamnita de roma tribunalo ĝuste pro tiu akuzo.

La svisaj grandaj financoj certe same ne estas anĝeloj, kiel tiuj de aliaj landoj, sed mi tre timas, ke la fonto de tiuj riproĉoj estas la envio. La svisa banka sistemo estas unu el la plej efikaj de la mondo, kaj pro tio svisaj bankistoj regule ricevas komisionojn por prizorgi transakciojn de eksterlandaj klientoj en eksterlando. La plej ofta riproĉo estas la sekreto de la svisaj bankoj. Pri tio mi do devas iom pli detale paroli, sed antaŭe ankoraŭ kelkaj vortoj pri la bankoj ĝenerale.

Kio estas banko? Tio estas peranto de mono. Ĝi akceptas monon de tiuj personoj, kiuj posedas pli ol ili bezonas, kaj donas ĝin al tiuj, kiuj bezonas pli ol ili havas. La diferenco de la nterezo, kiun ili donas al la unuaj kaj postulas de la duaj, estas la profito, el kiu la banko vivas, samkiel iu ajn komercisto vivas el la diferenco de tio, kion li pagas por varo kaj kion li postulas de la aĉetanto.

En Svislando ekzistas kvin tiel nomataj grandaj bankoj, kiuj havas filiojn en la tuta lando kaj kiuj ankaŭ okupiĝas pri negocoj translimaj. La kvin kune faras 48% de ĉiuj bankaj negocoj.

25% aŭ kvarono estas farataj de la kantonaj bankoj, kiuj do apartenas al la ŝtato. Il'n oni ne povu naciigi, ĉar ili jam estas publikaj proprajoj. La resto estas negocata de multaj, parte eĉ tre malgrandaj, bankoj, ofte nomataj ŝparkasoj. Ili precipe okupiĝas pri la hipoteka negoco, t.e. pruntante monon por la konstruado de domoj. Tiu hipoteka rentumo ĝuste nun estas multe diskutata temo en Svislando, ĉar la unuan de marto la interezo por unuaj hipotekoj estis altigita je kvarona procento kaj nun atingis 6 procentojn. Tiu altigo havas tre sentebajn konsekvencojn por la luantoj de loĝejoj kaj domoj kaj pro tio kaŭzis multajn kritikojn, sed la bankoj deklaris, ke ili ne povas ekzisti sen tiu altigo, ĉar ili devis ankaŭ altigi la interezon de siaj kreditoroj, resp. de la tiel nomataj ŝparlibretoj.

La altigo devas esti vidata sur la fono de la inflacio, kiu en Svislando estas ĉirkaŭ 6 procentoj, tio estas pli ol la ŝparantoj ricevas sur normala ŝparlibreto aŭ ŝparkonto. En aliaj landoj la inflacio kaj la rentumoj estas multe pli altaj. Spari monon en Svislando ne estas tre promesiga afero, sed malgraŭ tio multaj eksterlandanoj ŝatas meti sian monon en svisajn bankojn, ĉar ili aprezas la politikan stabilecon en Svislando, la fidindecon de la bankistoj kaj la renommon de la svisa franko.

Kaj nun ni revenas al la banka sekreto. En si mem tio ne estas io speciala. Bankoj ĉiam traktis la negocojn de siaj klientoj tre diskrete kaj en neniu lando vi povas tutsimple iri al la banka ĝiĉeto kaj informiĝi pri la konto de sinjoro X. En multaj landoj aliflanke la ŝtato, tio estas la impostaj komisaroj, rajtas postuli, ke la bankoj deklaru la financajn aferojn de siaj klientoj. Tion en Svislando la ŝtato ne povas fari, kaj krome la banka sekreto ne nur estas nobla kutimo de la bankistoj, sed ĝi estas leĝo deviga. Kiam la svisa banka leĝo estis reviziita la lastan fojon, tio okazis en la jaro 1934, tiu leĝo estis striktigita, kaj la konkreta kaŭzo tiam estis la deziro de faŝistaj ŝtatoj, precipe de Germanujo, havigi al si informojn pri eventualaj posedaĵoj de la germanaj judoj en svisaj bankoj. La banka sekreto tiam savis la posedaĵojn al multaj rifuĝintoj. Kompreneble validas la sama leĝo por svisaj civit-

anoj kaj la impostaj komisaroj estas senpovaj en la bankoj.

Kiel la ŝtato tamen ricevas sian monon? Por tio oni eltrovis tre simplan rimedon, cetere ne svisa monopolo, tio estas la anticipa imposto. De ĉiu rentumo ĉu de ŝparkonto, ĉu obligacio, ĉu akcio la bankoj devas pagi 35% al la ŝtato. Poste la posedanto ricevas tiun monon, se li korekte deklaras sian posedaĵon. Se li tion ne faras, li perdas la 35%. Nun oni tre eraras, se oni kredas, ke la svisa banka sekreto permesas al krimuloj tute diskrete kaŝi sian

monon en svisaj bankoj, en krimaj aferoj, ankaŭ en kazoj de bankrotaj, la bankoj devas plene informi laŭ postulo de juĝisto. Tio validas ankaŭ por eksterlandanoj, kaj se usona tribunalo esploras la kazon de iu gangstero pri kiu oni suspektas, ke li kaŝis monon en Svislando, la svisaj aŭtoritatoj certigas plenan helpon, sed tio nur validas por krimoj, kiujn ankaŭ Svislando konsideras krimoj kaj ne por kapricoj de iu diktatoro.

## LETERO AL LA REDAKTORO

S-ro Trevor Steele skribis en sia artikolo "Malvarma aŭ Frida" (A.E., marto 1982) "Neniu protestas pri la ino-vortoj; ekzemple, kvankam la radikoj de 'patrino' senambigue elvokas 'masklan' signifon, neniam oni aŭdas pri projekto por forigi tiel gravan vorton kaj anstataŭigi ĝin per 'matro' aŭ io simila". Nu, jen novaĵo! Ofte la plej inteligentaj kaj lernemaj el miaj lernantinoj plendas pri la fakto, ke radikoj kiel patro, onklo, frato, eĉ vidvo, estas masklaj. Kredeble tio devenas de la tiutempa sinteno de Zamenhof kaj aliaj kiel Sigmundo Gojo (germane Freud) kiu postulatis, ke virino estas nur viro sen kelkaj aldonaĵoj.

Nuntempe ni devas agnoski male, ke inoj estas necesaj por daŭrigi la homan rason, sed la viroj, kun aldonaĵoj, estas nur akcesoraĵoj. Do, venas la horo por proponi kelkajn bazajn ŝanĝojn, ekzemple:-

Malnovajn formojn		Anstataŭaĵojn	
Inajn	Masklajn	Inajn	Masklajn
Patrino	Patro	Matro	Virmatro
Fratino	Frato	Sororo	Virsororo
Vidvino	Vidvo	Vidvo	Virvidvo
Onklino	Onklo	Tanto	Virtanto
Sinjorino	Sinjoro	Fraŭno	Virfraŭo

Kompreneble "tanto" devenas de la franca kaj iom rilatas al la angla. Same kiel "fraŭlino" kaj "fraŭlo" devenis de la germana "fraulein", oni esperantigos "frau" kiel "fraŭo". Mirinde zamenhofa, ĉu ne? Cetere, oni povos eviti pseŭdosufiksojn kiel en la vortoj benzino, disciplino, semajnfino ktp. se la ina sufikso ne estos uzata.

Kelkaj titoloj estas neŭtrala, kiel prezidanto, profesoro, ĉefministro ktp. sed oni rajtas supozi, ke la fraŭoj plu kaj plu plenumos tiujn, rolojn do ni skribu Virprezidinto Mao kaj Prezidanto Chaldecott, Virĉefministro Frazer kaj Ĉefministro Thatcher, Virdoktoro Lapenna kaj Doktoro Boulton. Ĉu vi konsentas?

**Virprofesoro Robert G. Robertson**

## KOREKTOJ

Estis neeviteble, ke enŝteliĝis malgrandaj "preskboldaĵoj" en nian 12-paĝan kongres-raporton. ("A.E." N-ro 194, Jan.-Feb., 1982) Jen estas la korektoj:

Paĝo 79 (Kol. 1, Di-Servo): F-ino Isabel Gale **ne** legis el la Sankta Biblio, sed ŝi **preĝis**.

Paĝo 79 (Kol. 1, Arta Vespero): S-ro Ralph Harry **ne** deklamis poemon de T. S. Eliot, sed de la aŭstralia

poeto, Geoffrey Dutton.


Paĝo 80 (Kol. 1, Daŭrigaj Kursoj): Krome S-ro Towsey gvidis daŭrigan kurson.

Paĝo 80 (Kol. 1, Neformala Vespero): S-ro Jack Hawks prezentis premiojn nome de la "Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio" (anstataŭ "Perta Ligo")

Paĝo 81 (Kol. 2, Bilanco): La 'Simpkins Fonduso' estas investita en la "Australian Guarantee Corporation", **ne** en "Australian General Credit".



## LA FRITZ MUELLER-SORAŬ MUZIKA TROFEO



La amikoj de nia forpasinta samideano Fritz Mueller-Soraŭ proponas novan konkurson en la kadro de la Aŭstraliaj landaj kongresoj:-

1e. Kiel memorigaĵo de tiu sindonema, nelacigebla, kuraĝega kaj ĉiam aminda amiko, al kiu multaj el ni ŝuldas la fundamenton de nia scio pri Esperanto,

2e. Por kuraĝigi en la lokaj grupoj kunagadon similan al la laŭdinda aktiveco de la dramaj grupoj, kiuj tiel vikle konkursas por gajni la "Herbert Koppel Draman Trofeon".

La detalan regularon oni decidis kiel eble plej frue, sed principe la konkurso okazos dum ĉiu Aŭstralia landa kongreso, inter horaj grupoj. Tiamaniere ni celebros la memoron de nia kara amiko, kiu amis plenkore kaj Esperanton kaj muzikon. Dume responsas pri la afero Prof-o R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge NSW 2063.

### 73-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Laŭ la decido de AEA en la 23-a Kongreso en Adelajdo, la Estraro esploras la eblecon inviti UEA okazigi sian 73-an Universalan Kongreson de Esperanto en Brizbano.

La Ĉefministro de Aŭstralio, S-ro Malcolm (melkm) Fraser (freza) en letero al la Prezidanto de AEA deziris al AEA plenan sukceson en ties aspiro rilate la UK. La Ĉefministro kaj la Ministro pri Turismo de Kvinlando informis nian Vic-prezidanton, Ray Ross, ke ili dezirus partopreni en la inaŭguro de la Kongreso, por ĝin bonvenigi al Brizbano!

Ni atendas la necesan respondon de

la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj rilate la vizojn por partoprenantoj en la UK antaŭ ol sendi la formalan inviton al UEA. Dumtempe la Estraro de UEA aprobis la disdonadon en Antverpeno, kune kun la dokumentoj de la 67-a UK, de la faldfolio "Invito el Aŭstralio" eldonita de la Aŭstralia Nacia Turisma Komisiono.

La estraro de la Brizbana Esperanto-Societo akceptis la rolon de provizora Loka Kongresa Komitato. La Prezidanto, Ray Ross, estas Komisiito de AEA por tiu gravega afero.

Mi ŝatus ricevi oferojn de membroj de nia Asocio, el ĉiuj ŝtatoj kaj teritorioj, kiuj pretus partopreni per promesoj en garantifonduso se UEA tion postulus. Ni bezonas garantion de unu du miloj da dolaroj por provizi "reton" sub la kongreso kontraŭ la neverŝajna ebleco, ke estus financa perdo. Kompreneble se la Kongreso gajnus profiton AEA ricevus parton de tiu profito kaj la garantiuloj pagus nenion! Por komenci mi persone promesas \$200. Kiu sekvos? —RALPH HARRY.

### FONDUSO MATASIN

La Asocio ricevis, en marto, donacon de Eve Matasin, memore al la mortinta edzo, nia kara amiko, John. Eve petis, ke la heredajo (\$2,000) estu uzata por celo elektota de la Prezidanto kaj Estraro de AEA.

Post diskutado la Estraro decidis starigi Fonduson Matasin, por helpi pri nia eldonado de libroj aŭ broŝuroj, aŭ por la subteno per promesoj de aĉeto aŭ aĉetoj de jam eldonitaj libroj. La detala sistemo de administrado de la Fonduso estas ellaborata de la Estraro en konsulto kun nia Komisiito pri la Libro-Servo.

Ni tute dankas al Eve pro tiu malavara donaco, kiu multe faciligos la laboron de la Asocio, kaj antaŭenigos nian aferon, kiun John dum sia vivo tiel fidele kaj efike subtenis.

### VIRINA ORGANIZATO SUBTENIS ESPERANTON

En 1981 la Tutaŭstralia Kongreso de la Virina Kristana Unio por Sobrero (W.C.T.U.) akceptis la sekvantan rezolucion:

"Ni subtenas Unuiĝintajn Naciojn, forte rekomendante ĉiujn landojn enkonduki aŭ pliiĝi la instruadon de Esperanto kiel internacia lingvo".

La Aŭstralia filio de V.K.S.U. eble prononos la akcepton de simila rezolucio al la tutmonda organizo, kies Prezidanto estas F-no Millicent Harry de Tasmanio.

# AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Ni havis la bonŝancon gastigi A.E.A.-Prezidanton Ralph Harry inter ni. Je 28-a de marto S-ro Harry alparolis 1000 "Rotarianoj"n ĉe ties konferenco en Albany. Reveninte al Perto, li vizitis, kune kun Ruth McGrath, la bibliotekon de la Universitato 'Murdoch', kie troviĝas la libroj de la E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio. Li havis oportunun interŝanĝi ideojn kun la ĉef-bibliotekisto de la Universitato 'Murdoch'.

S-ro Harry estis gasto en la hejmo de Ges-roj C. Dean, kie okazis kunveno de 33 lokaj esperantistoj kaj amikoj. F-ino Jacqueline Walker ricevis el la manoj de AEA-Prezidanto Harry la Norman Elementan Diplomon, kiun ŝi ĵus gajnis.

Dum la tago S-ro Harry estis intervjuita ĉe la ABC-Radio.

● **ADELAJDO:** Je 19-a de aprilo ni kunvenis en la Universitato. Ĉeestis i.a. pola samideano, Zbigniew Wybraniec, rifuĝinto el Pollando, kiu intencas resti en Adelajdo kaj helpi nin en nia laboro. Li parolis pri la E-movado en Pollando ĝenerale kaj speciale pri la movado en Krakovo. En Krakovo troviĝas 1700 registritaj esperantistoj kaj krome pli ol 1000 neregistritaj.

Ni havis intervjumon kun la estro de Radio-Stacio 5 EBI-FM, kaj ricevis la permeson ĉiusemajne disaŭdigi dum 15 minutoj Esperanto-kurson. La unuajn 3 semajnojn George Clarke prelegos pri tio, kio estas Esperanto, ĝia historio kaj kiel ĝi povas utili. La stacio tradukos nian enkondukon en la danan, germanan, norvegan hispanan, italan, serban, nederlandan polan kaj rusan lingvojn.

Alia kunveno okazis je 11-a de majo. Estis prezentita "Tamen Plu", la nova organo de nia societo, kiun ni provos eldoni ĉiumonate. S-ino Beryl Randles faris interesan prelegeton pri la prepozicio "je" kaj poste S-ro Felby parolis pri la 41-a Universala Kongreso. La kunveno finiĝis per ludado, kiun gvidis S-ino Beryl Randles. —R. Felby.

● **MELBURNO:** Je 29-a de marto, S-ro Ken Linton prelegis kun diapozitivaj pri veturado tra la Montaro "Rocky" kaj vizito en la urbo "Victoria" sur la

insulo Vankuvero, inklude la Gardenon "Butchard".

La ĝenerala kunveno okazis je 5/4. La sekretario (H. Koppel) raportis, ke la societo havis en 1981, 28 membrojn kaj 1 lernanton (1980: 26 membrojn). Pro malsano de la kasisto (E. Chick) la sekretario legis la kasraporton, laŭ kiu la societo havis malgrandan deficiton de \$6.44. La kunveno decidis altigi la kotizon de \$10 al \$12 kaj por pensiuloj de \$5 al \$6, kaj akceptis proponon de la kasisto transigi investon de \$1500 al alia pli profitdona ŝparkonto, el kiu rezultos ekstraj \$100.

Elektiĝis la jena estraro: Prez: S. Kanaĉki; Vic-Prez: Harry Beechey. Sekretario: H. Koppel; Kasisto: Errol Chick; Bibliokisto: Fay Koppel; Inform-oficisto kaj kas-kontrolo: Ken Linton.

Je 26/4 Ken Linton parolis pri diversaj gramatikaj kaj poste pri pensigaj antaŭdiroj.

● **KANBERO:** Dum la "Anzac"-semajnfino 15 esperantistoj el Sidnejo kaj Manly vizitis Kanberon. Nia klubo gastigis ilin sabaton vespere (24/4), per distraĵoj. Ralph Harry montris filmon pri la Adelajda Kongreso, Margaret Chaldecott legis el siaj teatraĵoj kaj Ges-roj Ellyard prezentis skeĉon. La vespero finiĝis per manĝeto. Dimanĉon (25/4) ni ĉiuj ĝuis "rostfeston" en Weston Park. La vetero estis bona kaj ĉirkaŭ 30 personoj ĉeestis. La vizitantoj tre ĝuis la semajnfinojn kaj sugestis, ke tia renkontiĝo devos fariĝi ĉiujara afero.

Por ke la "Aŭstralia Nacia E-Biblioteko" havu hejmon en "Instituto de Internaciaj Aferoj", kaj por ke ni havu lokon por nia klubo por kunveni, ni kontraktis paki kaj ekspedis la revuon de la Instituto. Dek membroj ĉeestis dum 3-4 horoj kaj pakis la revuojn kaj preparis ilin por enpoŝtigo. Tiamaniere la "Instituto" ŝparos ĉ. \$600 jare, sumon kiun antaŭe postulis komerca organizo.

—Marjorie Ellyard.

● **SIDNEJO:** Je 15/3 okazis debato "Ĉu ekstra horo da sunlumo estas beno". S-ino M. Chaldecott ne ŝatis la ideon, dum la aliaj ĉeestantoj tre ĝuas la t.n. ekstran horon da sunlumo. Semajnon poste membroj montris "Feriajn Lum-bildojn". Wre Chandler montris bildojn pri Venecio, James Harwood pri Adelajdo, Volo Gueltling pri la Adelajda kongreso kaj pri la luno, faritajn per tre granda lenso.

Je 29/3 M. Chaldecott prezentis recenzon pri la libro "Ĉu vi kuiras ĉine?" de 'Johano Valano'. Je 19/4 W. Chandler parolis pri siaj fruaj jaroj, kiam pro alies stulteco lia patro perdis grandan monsumon kaj Wre ne povis viziti universitaton kiel studento de medicino. Li fariĝis instruisto, ofte en kamparaj lernejoj, kie li komencis sian studadon pri aferoj de la naturo.

Dum la semajnfino multaj membroj vizitis Kanberon kaj ĝuis la gastamon de lokaj esperantistoj (vidu sub 'Kanbero') Pri Japanujo parolis s-ino M. Chaldecott je 3/5 kaj Joan Green parolis pri la 'teatro'. Je 10/5 Bettie Hart prezentis leterojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn ricevitajn de multaj plumamikoj en eŭropaj kaj aziaj landoj.

— M. Chaldecott.

● **MANLY:** La 5 klasoj ĉe la vespera lernejo kontentige progresas kun mez-nombre 30 ĉeestantoj. Ĉiuj kuniĝas post la lecionoj por klubanonoj kaj kantoj.

La 6-an de marto, ĉe la hejmo de Edna Giles, 25 anoj ĝuis programon de lumbildoj pri Ĉinio kun komentario de Arthur Cocking, kaj postan vespermanĝeton.

— EUNICE GRAHAM.

● **KAPRIKORNA MARBORDO:** Ĉi-jare lecionvesperoj provizore "dormas". Ni ankoraŭ renkontiĝas sabate kun Rockhampton-anoj por konversacio, teo kaj ĝuo.

**SKOLTA ESPERANTO-LIGO:** La aŭstralia sekcio vivas. Jarkotizo \$5. Membroj ricevas la revuon "La Skolta Mondo" kvarfoje jare. Se vi interesiĝas pri Skoltoj kaj Skoltinoj, skribu tuj al John Moore, 7 Pelican St., Emu Park, Q'ld., 4702. Arkoraŭ aperas ĉiumonate en "Guiding in Australia" lecioneto pri Esperanto, speciale verkita por tiu gazeto. (petu specimenon ĉe Girl Guides Assn., 82 Elizabeth St., Sydney). Jam aperis 12 lecionoj, kaj la serio daŭras.

"URANIO NE, DANKON" en Esperanto, antaŭis veturilon de C.A.N.P. (kampanjo kontraŭ nuklea energio) en la Maj-taga procesio en Rockhampton, 3-5-82. Ne temis pri esperantista iniciato; la sekretario de CANP mem petis la tradukon, ĉar "por internacia kampanjo taŭgas internacia lingvo".

## RECENZOJ

### REDAKTA KRAJONO APLIKENDA

**ALMANAKO LORENZ 1982**, eld. Spiritita Eldona Societo F. V. Lorenz, Rio de Janeiro, 193.

La anglo Guy Lyon Playfair skribis, ke Brazilo prezentas "kulturan ŝokon" al ĉiu scivola vizitanto, kaj tion li atribuis al tio, ke "plejparte la brazila loĝantaro . . . kredas, aŭ almenaŭ akceptas ian formon de spiritismo".

Mi plene konsentas. Kun intereso do mi malfermis **Almanako Lorenz 1982**, des pli, ĉar nia movado en Brazilo ege multon ŝuldas al la spiritistoj. La libro celas prezenti la spiritisman mondkoncepton al eksteruloj pere de kolekto da plejparte mallongaj artikoloj. Kelkaj eroj temas pri "flugantaj teleroj" (nun nomataj "nifoj"), aŭ kredoj kun tendencoj similaj al tiuj de spiritismo (kiaj budhismo kaj oomoto) aŭ pri elstaraj religiuloj. Kelkaj eroj de d-ro Beckmann de Radio Vieno aperas ĉi tie presitaj.

Ĉu la libro kontribuos forte al disvastigo de la tre interesa religio de la eldonistoj? Kun bedaŭro mi devas tion pridubi: la aktuala st ilo de preskaŭ ĉiuj aŭtoroj estas tro emociema, tro malskeptikema por logi eksterulojn. Kaj la lingvonevelo (kontraste kun tiu de la tradukaĵoj de la elstara spiritisto L. C. Porto Carreiro Neto) tre varias. Tro da artikoloj estas evidentaj tradukoj: foje mankas necesa pronomo, kaj foje oni imitas la portugalan "participon absolutan" (ekz: **Rimarkita la demando laŭ ekonomia vidpunkto, reliefiĝas la avantaĝo de la kremacio kontraŭ la entombigo**), foje la frazo estas nekomprenbla. Aliflanke multaj artikoloj legiĝas flue.

La preseraroj estas maloftaj, kaj la libro bone aspektas. Neniu prezo estas indikita, sed ĉiuj aliaj libroj el la sama eldonejo estas tre malaltkostaj. Mi esperas, ke la 1983-a **Almanako Lorenz** montros la influon de postulema redaktanto, ĉar la iniciato estas bonveniginda.

—Trevor Steele.

### ESPERANTO - SOMERLERNEJO 1983

La Somerlernejo okazos en Armidale, N.S.K., la 2-an ĝis la 14-a de januaro, 1983. Dum la lasta Somerlernejo en

Toowoomba, en 1981, oni decidis elekti pli centran lokon por starigi venontajn somerlernejojn. Samtempe ni gratulas kaj tre dankas S-inon Jean Lehane, Toowoomba, kiu pioniris tiun somerlernejon en 1977 kaj la aliajn du plensukcesajn en 1979, 1981.

Carson Thomas, Toowoomba, vizitis la Universitaton de Nova Anglio, Armidale, kaj plenzorge raportis pri speciala Kolegio "Duval", la Konferenca Centro, tie. La Kolegio enhavas instruĉambrojn, loĝejon, unulitajn ĉambrojn, manĝoĉambrojn, salonojn ktp. Oni rajtas uzi naĝejojn, saŭnon kaj aliajn sportejojn dum la lerneja periodo, laŭplaĉe.

Oni anticipas, ke la tuta kosto estos inter \$280 kaj \$300, inkluzive de ĉiuj manĝoj, unulita ĉambro kaj administraraj kostoj, depende de la nombro de studentoj. La Komitato de la Somerlernejo estas: Prez: Ray Ross, Sek/Kas. Joan Greene; Anoj: Shirley Fanos, Carson Thomas. Klasoj estos jene: Literatura Kurso, Kursoj por Progresintoj kaj Postkomencantoj, kaj, se estos sufiĉe da anoj, kiuj deziras, Belartoj-Grupo. Bonvolu registriĝi kiel eble plej baldaŭ. Sendu nomon, adreson kaj antaŭpagon de \$20 al la Sek/Kas. S-ino Joan Green, 146 Coal Point Road, Coal Point, NSW 2283. (Indiku la preferatan kurson).

—RAY ROSS.

## NEKROLOGOJ

La Esperanto-movado de Okcidenta Aŭstralio suferis lastatempe dolorigajn perdojn. S-ro David Miller mortis je 6-a nov., 1981, S-ino Doreen Owen (nask. Buckingham) je 9-a de feb., 1982, s-ino Edith Palmer je 16-a de feb., 1982, kaj s-ino Amelia Sedgley je 20-a de feb., 1982.

**David C. Miller** (1909-1981) naskiĝis en Glasgovo (Skotlando) kaj baldaŭ post lia naskiĝo liaj gepatroj elmigris al Aŭstralio. Li ekinteresiĝis pri Esperanto en 1921/22 kaj en 1929 aliĝis al la "Westralian E-Societo, en kiu li oficis dum kelkaj jaroj kiel sekretario. Li estis profesia instruisto de lingvoj kaj ankaŭ instruis Esperanton en la Perta Teknika Kolegio en 1945. Pro sia kono de kelkaj lingvoj li fariĝis estro de la restadejo por enmigrintoj en Bonegilla. De 1956

ĝis 1970 li estris, en Germanujo kaj poste en Genevo, la instruistaron, kiu preparis migrantojn por la vivo en angleparolantaj landoj. Post reveno al Aŭstralio kaj speciale post sia emeritiĝo li ofte gastigis esperantistojn en sia bela hejmo.

**Edith L. Palmer** (1900 - 1982) naskiĝis en Londono kaj kiel juna knabino alvenis en 1911 kun siaj gepatroj en Aŭstralio. Ŝi aliĝis al la E-movado en 1943. Kune kun s-inoj Gertrude Pollard kaj Milly Sedgley ŝi kunlaboris en la eldonado de la "Nigra Cigno" en la jaro 1961. De 1970 ĝis 1979 ŝi estis la redaktoro de tiu organo de la E-Ligo en Perth. Partoprenintoj de la aŭstralia kongreso en 1970 bone memoras la agrablan "rostfeston" en ŝia bela ĝardeno dum varmega vespero.

**Amelia Sedgley** aliĝis al E-kurso de S-ino Ruth McGrath en la jaro 1950. Ŝi gajnis la diplomon de la Brita Asocio en 1956 kaj sukcesis, kun honoro, en la Supera Diplomo de A.E.A. en 1960. Ŝi partoprenis en kelkaj A.E.A.-Kongresoj kaj estis dum pluraj jaroj komitatano de la E-Ligo en Perto.

En Sidnejo mortis je 4-a dec., 1981 s-ro **Walter GASSNER**. Li naskiĝis la 17-an de marto, 1912 en Aŭstrio kaj alvenis kiel enmigrinto en Aŭstralio en septembro 1939. Li fariĝis membro de la Sidneja E-Societo kaj instruis en "Wesley Centre" Esperanton kaj Ĝeneralan Lingvistikon. Al lia edzino Kitty (ankaŭ esperantistino) iras niaj sinceraj kondolencoj.

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita .....	\$137
S-ro C. Dunstan, Scarborough .....	2
Melbourne Esperanto-Society .....	10
S-ino E. Ryding, Melbourne .....	10
S-ino S. Keser, Melbourne .....	2
S-ro H. Koppel, Melbourne .....	5
S-ino F. Koppel, Melbourne .....	5
	<hr/>
	\$171

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 197 (277)

MELBOURNE

Junio, 1982

## ŜERCAJ ANALOJ DE 1981

### DE ROLO

La novaĵoj de la jaro 1981 estis tiel amuzaj kaj bagatelaj, ke estas iomete malfacile trovi ion seriozan por raportoj al la Esperantistoj de la mondo.

Sed, se oni klare pripensas kaj analizas la ŝajne efemerajn absurdaĵojn oni povas ek trovi du klarajn tendencojn.

Unue tiu jaro estis, laŭ **leĝo-dekreto** de Unuiĝintaj Nacioj (mi ne scias kial ĝi estis leĝo de Kreto, tiu bela insulo) . . . mi ripetas, ke UN dekretis, ke 1981 estu la jaro de la handikapuloj. Komprenible nia mondfama gazeto "Monato" post longa diskutado decidis, ke nur angloj, aŭ anglaj ĉevaloj povas esti handikapitaj kaj por eviti avantaĝon por la londonanoj insistas, ke tra la mondo oni devas paroli pri malavantaĝuloj. Tamen "Esperanto" kaj aliaj konservativaj rondoj komprenas la universalecon de la handikapo, almenaŭ en golfludoj kaj mi daŭre uzos tiun terminon. Handikapuloj, kiel mi montros, ampleksas ne nur handikapitajn, sed ankaŭ handikapatojn kaj eĉ handikapotojn.

Due, 1981 estis jaro de la Savarmeo, aŭ pli precize, de la Savarmeoj.

### La Handikapuloj

Ni donu antaŭecon al la kampanjo lanĉita de UN por handikapuloj.

La intenco de la diplomatoj en Nov-Jorko—tio estas de la nuraj nomadoj kiuj posedas diplomojn—estis, ke dum unu jaro oni klopodu plibonigi la situacion de jam kripligitaj personoj. Sed, ĉar oni ne havas komunan lingvon en UN oni devis interpreti kaj traduki la vorton "handikapulo". Klare ĝi ampleksas, ne nur fizike handikapitojn, sed ankaŭ la mense handikapitojn, tio estas preskaŭ ĉiuj politikistoj kaj aliaj istoj, ne ekskludante la Esperantistojn.

Tio ne gravis, sed la tragika afero estis, ke en kelkaj landoj oni tute miskomprenis la celon, kaj entuziasmuloj komencis **celi lice** aŭ eĉ nelice, la handikapotojn, kaj kelkfoje decidis pligrandigi la nombron de handikapuloj.

Ekzemple en Usono fanatika por-handikapulito decidis handikapi per kuglo Prezidenton Reagan (pseŝdonime Reganto) ekster hotelo en la ĉefurbo, Vaŝingtono. Feliĉe, kvankam poste la Prezidento havis **hidan kopan**, tio ne estis konstanta aŭ longdaŭra. Sed nun el liaj helpantoj fariĝis eble konstanta

handikapito aŭ **hinda-kapulo**. La povra troentuziasmulo ricevos **reagan** punon.

Simila atenco okazis en Romo laŭ nekutima **moro**. Entuziasmulo turka, ne tro **kurta**, decidis, en la spirito de la jaro, fari handikapulon el Lia Sankta Mosto la Papo. Oni ankoraŭ debatas ĉu iu sekreta servo stimulis tiun eventon, kaj, se **kreta** servo tion faris, kial? Oni debatas ankaŭ ĉu la Vatikano mem havas sekretan servon aŭ nur diskretan diservon. Do, la Papo fariĝis elektebla por la handikap-konkurso de poloo. Lia famo etendiĝis de unu poluso al la alia. Oni povus diri ke li fariĝis ne nur polo sed polusano. Mi parolas nun pri polusano; pri la sano de la poloj mi parolas poste. La afero certe donis al la jaro de la handikapuloj publicon, kvankam la Papo kompreneble ne deziris **publicon**, eĉ **policon**!

En Irano, dum la jaro, la entuziasmuloj forte kaj fidele subtenis la celon pliiigi la rangojn de la handikapitoj, handikapataj kaj handikapotoj. Je unu punkto de tempo kaj loko oni handikapis per bombeksplodoj la Prezidenton, la Ĉefministron kaj la Ĉefon de la Polico. Bedaŭrinde, ne **ridinde**, la handikapoj estis por ĉiam kaj ne kuraceblaj, tial ne tute en la spirito de la jaro. Pro tiu tutampleksa karaktero de la kampanjo en sia lando, la antaŭa ĉefministro, S-ro Bani Sadr, decidis transloĝiĝi al Parizo, urbo kiun li taksis pli **ripoza** por **bani**! Oni povus resumi (resumo estas mus-ero) la situation en Irano per citaĵo el la persaj poetoj Omar kaj Jam, (la poeto Omar estas evidente roma poeto kun anagrama pseŭdonimo). Omar kaj Jam diris: "En la tago oni jetis bombojn en la rozbovlon kaj nokte oni fuĝigas la ŝtelistojn". Do Bani Sadr preferis manĝi francan panon sub pariza arbo, kun kruĉo da ruĝa ol esti manĝita sub franĝipano kun ruĝa kruĉo!

(Daŭrigota)

## LA KAZO POST OL

BERNARD GOLDEN

En la traduko de poemo publikigita en la nova literatura revuo FONTO, mi legis tiun ĉi frazon: **Ĉiu tie oni ne sentas al'ol ol la bona varmo**. Mia opinio oni devas diri **ol la bonan varmon**. Kion diras gramatikistoj pri la demando de akuzativa akordo post **ol**?

Mi unue turnis min al la verko **Lingvaj Anguloj**, kolekto da lingvaj demandoj kaj respondoj kompilita de F.

Baronnet kaj eldonita en 1979. Sur p. 58 la aŭtoro pritraktas la ĝustecon de simila frazo: . . . **kiam ĉi estas dezranta nenion alian ol tio, kion ĉi havas**. Li malpravigas la uzon de **ol tion**, argumentante, ke en tiu frazo **ol** funkcias same kiel **krom**, kaj citas kiel ilustraĵon la sekvan zamenhofan frazon: **La kongreso ne povos elekti ian alian lingvon krom lingvo arta**. Substituante **ol** al **krom**, li ricevas jenan frazon kun la sama signifo: **La kongreso ne povos elekti ian alian lingvon ol lingvo arta**. Baronnet apogas sin sur la rimarko en **Plena Vortaro** (PV) ĉe la kapvorto **alia**: "Se **alia** estas akompanata de negacio, oni povas post ĝi uzi indiferente **ol** aŭ **krom**. Baronnet opinias, ke malgraŭ la teorio de la gramatika karaktero de Esperantaj vortoj (vortaroj indikas, ke **krom** estas prepozicio kaj **ol** estas konjunkcio), en la cititaj ekzemploj ambau vortoj estas uzataj prepozicie. Pro tio la uzo de la nominativo post **ol** estas ĝusta. La aŭtoro de **Lingvaj Anguloj** marteladas sian vidpunkton pri la "hibrideco" de Esperantaj vortoj skribante: "Se paroli nur pri logiko, ĉiu esperanto-vorto devus havi nur unu gramatikan karakteron. Tamen la lingvouzo donis al kelkaj vortoj karakteron respektive jen adverban jen subjunkcian, jen adverban jen prepozician, ktp (p. 57).

PV en la artikolo pri **ol** informas, ke kiam temas pri kunkomparitaĵoj, tiu, kiu sekvas **ol** devas havi ĉiam la saman formon kiel tiu, kiu ĝin antaŭas (substantivo, adjektivo, infinitivo, ke), kaj konsekvence ĝi havas la saman kazon.

Plua precizigo venas de **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV), ne citita de s-ro Baronnet. Rimarko 1 ĉe la kapvorto **alia** komence tekstas preskaŭ same kiel la rimarko en la pli frua PV, sed la interkrampe aldonitaj vortoj estas tre gravaj: "Se **alia** estas akompanata de negacio, oni povas uzi indiferente **ol** aŭ **krom** (atentante, ke post la prepozicio **krom** oni ne uzas akuzativon)." El tio estas konkludeble, ke post **ol** oni ja uzas akuzativon, kiam akordo estas bezonata. PIV pruvas tion per unu el la ekzemplifrazoj: **ne scii alian lingvon krom sia propra** (sed: **ol sian propran**). Akuzativa akordo estas ilustrita ankaŭ en frazo uzata en **Plena Gramatiko de Esperanto** (3-a eldono, §199, p. 273): **mi diris al vi nenton alian ol la plej puran veron**.

Kio okazis dum la tri jardekoj inter la eldono de PV (1934) kaj PIV (1970)? Kial tiu gramatikaĵo montris sin tiel

malstabla? Ankorau unu ekzemplo ilustras la malakordon inter tiuj du aŭtoritataj vortaroj.

La difino de metaforo en PV estas: "esprimmaniero, laŭ kiu oni donas al iu vorto signifon alian ol ĝia propra, klarigeblan per subkomprenita komparo." La adjektivo "klarigeblan" akordas kun "signifon alian", sed ne "ĝia propra". Nun komparu la difinon de metaforo en PIV: "vortfiguro, per kiu oni donas al vorto signifon alian ol ĝian propran kaj klarigeblan nur per subkomprenata komparo." En tiu ĉi frazo, ĉiuj vortoj rilatantaj al "signifon" akordas laŭ kazo. Kial. Ĉu la gramatika karaktero de ol ŝanĝiĝis? Ne, ĉar en ambaŭ vortaroj ĝi estas konjunkcio. Ĉu eble la logiko ŝanĝiĝis?

Gramatika ŝanĝebleco prezentigas aliloke en PV kaj PIV por eĉ pli konfuzi jam perpleksigitajn lernantojn. Sub la

kapvorto **preferi** en PV troviĝas jenaj ekzemplofrazoj: (1) **preferi supon ol viandon, poezion ol prozon**, (2) **vi prenu la aŭtomobilon prefere ol la kaleŝon**. Ĉio estas en ordo kaj akordo! Sed en PIV tiu akordo forvaporigiĝis, ĉar oni ŝanĝis la vortspecon inter la du ekvivalentaj komparataj aferoj: (1) **preferi fiŝon al viando, poezion al prozo**, (2) **uzi aviadilon prefere al ŝipo**. La rimarko ĉe la fino de la artikolo tekstas: "Kiel oni vidas, oni post **prefer** uzas **al** antaŭ substantivo kaj **ol** antaŭ infinitivo". Kial? En 1934 **ol** taŭgis por ambaŭ vortspecoj, substantivoj kaj infinitivoj, sed en 1970 la regulo komplikigiĝis, kaj lernanto devas streĉi sian memoron por ne intermiksi **ol** kaj **al**.

Jes, Esperanto ja estas facila lingvo, sed ĝi havas kelkajn malfacilajn gramatikajn.

## KUNORDIGITA LINGVO-POLITIKO POR AŬSTRALIO

La 25-an de marto Senatoro Teague (pron. tig) proponis en la Senato, ke la Konstanta Komitato pri Edukado kaj la Belartoj estu komisiita por studi la temon: "Evoluigo kaj Plenumo de Kunordigita Lingvo-Politiko por Aŭstralio". Li sugestis, ke la Komitato studu la sekvantajn aspektojn:

- (a) Ĉiujn aspektojn, inkluzive gvidliniojn, de nacia lingvo-politiko;
- (b) la rolon de la angla kiel unua aŭ dua lingvo kaj ĝian rilaton kun aliaj lingvoj en Aŭstralio;
- (c) la nunan uzadon de lingvoj en Aŭstralio inkluzive uzadon en la komunumo (socio), en la informomedioj —inkl. gazetojn, etnan radion kaj multkulturan televidon — kaj en la artoj kaj por plietendi egalecon de aliro al servoj kaj al la institucioj de aŭstralia socio;
- (ĉ) la apartajn bezonojn, kiuj fontas el la uzado de indiĝenaj lingvoj en edukado kaj la komunumo;
- (d) la nunan staton kaj tendencojn en lingvoinstruado kaj lernado en primaraj kaj mezgradaj lernejoj, triagrada edukado kaj aliaj formalaj kaj neformalaj programoj en la komunumo;
- (e) la gradon je kiu ekzistantaj politikoj, praktikoj, sintenoj, asigno

de riĉaĵoj kaj programoj estas adekvataj provizi taŭgan evoluigon de la lingvaj riĉaĵoj de Aŭstralio;

- (f) la lingvajn bezonojn en Aŭstralio por komercio, diplomatio, defendado, turismo kaj kulturaj intersanĝoj, precipe konsiderante la regionajn kaj aliajn internaciajn rilatojn de Aŭstralio;
- (g) la specialajn lingvo-bezonojn de mutuloj kaj aliaj personoj kun malkapabloj;
- (ĝ) la metodojn kaj rimedojn por stimuli daŭran publikan konscion de, kaj intereso pri, la evoluigo de la lingvo-riĉaĵoj de Aŭstralio;
- (h) aranĝojn por la daŭranta plenumado de nacia lingvopolitiko, inkluzive la indentigon de prioritatoj kaj la asignon de monrimedoj.

La Komitato nun konsistas el 5 membroj, aldone al la Prezidanto (Senatano B. C. Teague, S.A.). Ili estas Senatanoj Patricia Giles, Okc. A., Jean Hearn, Tas, M. E. Lajovic, N.S.K., Robert Ray, Vik., Margaret Reid, A.Ĉ.T. Laŭ la Sekretario, S-ro C. H. Ducker, (062) 726557, oni verŝajne ne invitos informojn antaŭ la fino de julio, kaj eble ne komencos aŭskulti atestantojn antaŭ la komenco de septembro.

Tamen, la Estraro de A.E.A., kiu ricevis kelkajn sugestojn de individuoj kaj organizaĵoj, ĉefe el Kvinlando, jam finpreparis dosieron, kiun mi subskribis kiel Prezidanto. Tio restos en Kanbero por esti donita al la Komitato tuj kiam ĝi anoncos, ke ĝi estas preta ricevi dokumentojn. Espereble Marj. Ellyard kaj mi povos atesti buŝe post nia reveno

el Antverpen.

La Estraro de A.E.A. bonvenigas la iniciatemon de la membraro, kiu kompreneble deziras kapti tiun gravan okazon. Ĝi ne deziras malkuraĝigi individuajn membrojn, kiuj deziras tuj skribi al Senatanoj, kiujn ili persone konas.  
—Ralph Harry.

## LA FERVOJISTOJ KONGRESIS EN HUNGARIO

La 34-a kongreso de la Internacia Fervojistara E-Federacio (IFEF) okazis inter la 2-a kaj 8-a de majo, 1982 en la hungara urbo Balatonfured, kiu situas apud la plej granda hungara lago, Lago Balaton.

Sabate la 1-an kaj dimanĉe la 2-an de majo alvenis 605 kongresanoj el 22 landoj. Kiel kongresejonoj oni elektis novan, tre belan konstruaĵon "SZOT Furedhotel", la Instrua Centro de la Hungaraj Sindikatoj. La granda salono povis enteni nur 300 personojn. La ceteraj devis uzi du apudajn pli malgrandajn salonojn, aŭ povis helpe de televidaparatoj sekvi la aranĝojn en diversaj konversaciejoj.

Je 2-a de majo 450 kongresanoj veturis per speciala trajno, kun la IFEF emblemo sur la lokomotivo, de Budapeŝto al Balatonfured. Estis senpaga vojaĝo, donaco de la hungaraj ŝtataj fervojoj.

Post Ekumena Diservo je 3/5, en kiu partoprenis 300 personoj, okazis la inaŭgura ceremonio. 25 fervojistoj en uniformoj de 17 landoj okupis la lokon sur la podio. Ĉarmaj knabinoj, vestitaj en blua ĵupo, blanka bluzo kaj ruĝa kravato, enkuris la salondon kaj transdonis florbukedojn al la prezidantaro.

S-ro Sandor Urban, Vic-ĝeneral-direktoro de la hungaraj fervojoj alparolis la ĉestantaron kaj emfazis la gravan signifon de Esperanto por fervojistoj, kiuj ricevas daŭran apogon de la hungaraj ŝtataj fervojoj. S-ino D-rino Flora Szabo, ĉefsekretariino de UEA substrekis, ke la fervojistoj estas la plej aktivaj membroj de la E-movado, kiuj plej efike apogas la laboron de UEA. Dum la inaŭguro la "Pechan Arc-Kvinteto" trifoje ege bone ludis kaj kontribuis al la sukceso de la inaŭgura ceremonio.

Landaj delegitoj, en alfabeto vico, salutis la kongreson, kaj kelkaj transdonis donacojn al la prezidanto Istvan Gulyas. Sekvis la festparolado de S-ro J. Giessner, prezidanto de IFEF, kiu parolis pri la statuo donacita de Sovetunio. Ĝi staras antaŭ la sidejo de UN en Nov-Jorko kaj montras forĝiston, kiu faras plugilon el glavo.

En la kadro de la kongreso okazis lingvokurso, kunsido de la terminara komisiono, kunsido de la historia komisiono kaj kunsido de la fakprelega komisiono. Vespere okazis ŝipekskurso sur la Lago Balaton.

Marde (4/5) S-ro Bernard Golden prezentis tre interesan prelegon pri la regiono de Balaton kun diapozitivaj. S-ro Halasz parolis pri la modernigo kaj precipe pri la defendo de la vivo kaj sano de la laborantoj. Posttagmeze la prezidanto de la urba konsilio akceptis en la urba domo la IFEF-estraron, la LKK-n kaj la delegitojn de la landaj fervojistaj asocioj. Vespere la hungara televido disradiis longan kolor-raporton pri la kongreso.

Merkrede (5/5) la salono estis plenumita por aŭskulti la plenkunsidon. Oni elektis unuanime la novan estraron: Prez. J. Giessner; Vic-Prez: Per Eugen; Sekretario. Otto Roesemann; Kasisto Henning Hauge, Redaktoro: Henning Olsen. Posttagmeze okazis la fakprelego de Inĝeniero I. Gulyas pri "La estonto de la eŭropaj fervojoj kaj la rolo de la hungaraj ŝtataj fervojoj." S-ro Lucien de Sutter (Belgio) montris belegajn bildojn pri la lando de la venonta IFEF-kongreso. Vespere okazis trihora distra kulturprogramo. Ni ĝuis folkloran programon, belajn hungarajn dancojn, grupkantojn, cigan-muzikon.

Ĵaŭde (6/5) okazis tuttaga ekskurso al la Pionir-urbo en Zanka kaj al Keszthely, kie ni vizitis la faman



kastelon, la bibliotekon "Helikon" kaj agrokulturan muzeon. Vespere okazis internacia balo, kiun per ĉardaŝ-danco malfermis la danc-ensemblo de la fervojista sindikato.

Vendrede (7/5) okazis dua publika plenkunido, kunsido de la terminara komisiono kaj dum la solena fermo oni transdonis la flagon al la prezidanto

de la belga fervojista asocio (S-ro L. de Sutter). Post la fermo oni plantis memor-tilian arbon en la parko de la kongresejo.

Venontaj IFEF-kongresoj okazos en Belgio (1983), Bulgario (1984) Skandinavio (1985), Jugoslavio (1986).

—ELFRIEDE ERNST — BRUSELO.

## LETERO AL LA REDAKTORO

Kun intereso mi legis la artikolon de Trevor Steele, rilatan al la "mal"-vortoj. Estas tiuj esperantistoj, kiuj konstruas "turon" anstataŭ "ponton". Tiuj interesiĝas pri la "aspekto", ne pri la "uzado" de la lingvo. Ili similas al la skolopendro en la poemeto:

Skolopendro kontentigis,  
ĝis ŝerce diris bufo,  
"Kiu kruro sekvas kiun?"

Skolopendro mem ne sciis,  
do, kontroli ĝi komencis;  
baldaŭ tute interplektis  
siajn nun tro multajn krurojn.

Fine en la koto sternis,  
nesciante marŝi".

Iu ajn lingvo devas esti ponto, super kiu povas pasi ideoj. Tamen, por multaj esperantistoj, nia lingvo estas turo. Same kiel ĉe Babelo, la homoj strebis konstrui turon, kiu atingus la ĉielon, multaj esperantistoj strebas konstrui lingvon filologie perfektan. La Eternulo punis la turkonstruantojn per diversigo de lingvoj. Kredeble, la sama sorto atendas la turkonstruantojn esperantistajn. Se la Akademio malfermus la pardonon al iu ajn "reformo", tio montrus la "verdan

lumon" al senlimaj reformoj, kaj Esperanto pereus en labirinto de dialektoj.

Leginte la artikolon de Trevor, mi kontrolis la nombron da "mal"-vortoj en la restaĵo de "AE". Mi trovis dek du. Dek du sur preskaŭ sep paĝoj ne estas granda proporcio de la uzataj vortoj.

Simile, venas el Hungario sugesto, ke ni forlasu la akuzativan "n". En konversacio, kredeble, la plimulto el ni, de tempo al tempo, ellasas la "n". Tio ne estas grava peko. Kondiĉe ke la aŭskultanto komprenas nin, la eraro estas pardoninda. Tamen, tute alia afero estas la ellaso de la "n" en skribita Esperanto, en kiu ni povas kontroli la vortojn. Povas esti neniam senkulpiĝo se ni ellasas la "n" en skribajo.

Kredeble, Esperanto estas iom neperfekta, eĉ malperfekta. Tamen, se ni — en maleleganta angla esprimo — "bugger about" kun la lingvo, ĝi baldaŭ pereos en miloj da dialektoj, kaj neniu komprenos unu la alian aŭ konversacie aŭ skribe.

For la reformemuloj! Ni ne ŝanĝu Esperanton! Esperanto, kun ĉiuj viaj malperfektaĵoj, mi ankoraŭ amas vin.

—Wre Chandler.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Je 14-a de aprilo 3 grupoj diskutis: "Kio estas pli grava, feliĉo en ĉi tiu vivo, aŭ feliĉo en estonta vivo?" "Kiu estis pli nobla, Churchill aŭ Ghandi?" kaj "Ĉu oni povas prognozi la estontecon?" Krome, S-ro Illingworth parolis pri vojaĝo ĉirkaŭ pacifikaj insuloj.

Je 26-a de aprilo la "Lunda Grupo" festis la 83-an datrevenon de sia membro Alice Longson. Je 28/4 ni bonvenigis S-ron H. Malcolm, kiu laboras en la

biblioteko ĉe Universitato Murdoch kaj lia tasko estas klasifi E-librojn. Ni diskutis "Kiu estas plej konata al vi: Norman Lindsay, Frank Hardy, Dame Nellie Melba aŭ Colleen McCulloch?"

● **MELBURNO:** Je 3-a de majo S-ro H. Koppel prezentis "Novajojn el Esperantujo" kaj semajnon poste S-ro S. Kanaĉki montris memfaritan filmon pri la Adelajda kongreso. S-ro Jan Makowski, 24/5, priskribis la evoluon kaj grandskalan utilon de komputiloj, pri kies estonteco oni ne antaŭvidas limojn.

En taggazeto "AGE" aperis, 25/5, bonega, longa artikolo kun la titolo "Unika lingva oportuno por Aŭstralio", verkita de Rosaline Germov, instruasistento ĉe Universitato "Monash". La

verkistino forte pledis pri la instruado de Esperanto en lernejoj kaj televido.

● **SIDNEJO:** La 17-a de majo estas la Nacia Tago de Norvegio kaj ni parolis pri tiu bela lando dum nia kunveno. Lumbildoj faritaj de M. Chaldecott kaj S. Fanos estis montritaj kaj la Norvega Konsulo pruntis belajn afiŝojn. Semajnon poste ni laŭlegis teatraĵeton "La ĝemoj de ĝemeloj", verkitan de M. Chaldecott.

Literatura vespero okazis je 31/5, ni diskutis diversajn librojn. Je 7-a de junio Tom Elliott prezentis lumbildojn pri trafik-kontrol-sistemoj en Anglujo, Francujo, Svislando kaj Belgio. Sajnas ke tute mankas kontroloj en Parizo, sed la bildo el la "Eiffel-Turo" montris kiel bonŝancaj estas aŭtomobilistoj, kiuj havas lumojn je preskaŭ ĉiu angulo.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** La 1-an de majo okazis afer-kunveno kaj societa renkontiĝo en la hejmo de Elsa kaj Harry Peddie. 26 membroj ĉeestis kaj ĝuis programon de komuna kantado kun Peg Ford-Lewis ĉe la piano, hora kantado gvidita de Arthur Cocking, du-lingvaj skeĉoj verkita kaj aranĝita de Margaret Liston kaj lumbildoj pri marvojaĝoj montritaj de Ann Gash.

La 29-an de majo Betty Cleminson sukcese organizis budon en la Corso de Manly. La vendado de donacoj gajnis \$157 por la klub-kaso.

La 1-an de junio komenciĝis la 2-a trimestro en la Vespera Lernejo kun 5 klasoj, komenca, daŭriga, progesa, konversacia kaj literatura. Ni adiaŭis Marjorie Duncan, kiu flugis al Anglujo por resti kun la patrino ĝis septembro.

La 12-an de junio 15 Manly-anoj kunvenis en la hejmo de Frank Mangan por afer-kunveno kaj poste amuz-vespero kaj vesper-manĝeto. Bonvena vizitanto estis Fujiyo TANAKA el Fukuoka, Japanio. Ŝi kontaktis Kay Morrison, kiu lastjare renkontis ŝian Einstruiston, unu el grupo de japanaj esperantistoj sur trajno en Ĉinio. Ni adiaŭis Betty Cleminson, kiu partoprenis en la Universala Kongreso en Antverpeno, Bess kaj Les Scott kaj Arthur Cocking sekvos.

—Eunice Graham.

● **BRIZBANO:** La kvin klasoj okazis kiel kutime ĉiun lundon en la klub-ĉambroj. Dum la monata kunveno oni decidis subteni la ekspozicion ĉe la Skolta Jamboreo januare, 1983 apud

Brizbano. Cliff Bailey raportis pri aranĝoj ĝisdate. Ray Ross raportis pri la estonta Somerlernejo en Armidale. Trevor Steele prezentos paroladon al la Aŭstralia Asocio pri Anglo-Instruistoj je la fino de junio, kiam okazos Seminario en Brizbano. Ray Ross partoprenis eron en la Televida Programo "Earl Bailey Show" la 20-an de majo. —R.R.

## EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** La 1-a Konferenco en 1982 okazis en la "Youth & Recreation Centre" de Margate je 15-16-a de majo. 25 membroj tre ĝuis la semajnfinojn dum agrabla vetero. Vizitis nin tri bone konataj virinoj, kiuj loĝas en Redcliffe: S-ino Doris Styles, la unua sekretario de la Federacio; s-ino Veronica Clarke, ano de EFK dum la dekjara periodo, kaj s-ino Hilda Banham, kies edzo Reg Banham multe laboris por AEA dum pli ol 40 jaroj

Sabaton posttagmeze okazis la Ĝenerala Kunveno. Oni akceptis proponon de la Toowoomba Societo okazigi konferencon en majo, 1983. La kunveno decidis subteni la Somerlernejojn en Armidale per donaco de \$100. Oni ankaŭ decidis donaci \$60 por helpi pri aranĝoj rilate al la Mondjamboreo Skolta, januare, 1983, en Brizbano. Cliff Bailey prizorgos Esperantan Budon tie. S-ino Banham ankaŭ donacis malavare \$40 al tiu celo.

Sandra Connors raportis, ke Esperanto-Ekspozicio en la Publika Biblioteko en **Toowoomba** kreis intereson kaj rezulte kelkaj komencantoj nun studas sub la gvidado de Jean Lehane. Tom O'Grady raportis pri la kvin klasoj, kiuj okazas en la klubĉambroj en **Brizbano**. Ruth Morrison raportis, ke dek anoj studas en **St. Lucia** sub la gvidado de Winsome Greenhalgh.

Post tre ĝuinda Konferenca Vespermanĝo okazis distraĵoj: Jean Lehane kaj Sandra Connors prezentis skeĉon. Tom O'Grady rakontis ŝercojn. Beryl Hilsdon kaj Ray Ross prezentis skeĉon. Cliff kaj Margaret Bailey organizis lumbildkvizon. Annie Spencer deklamis siajn proprajn poemojn kaj la Brizbana Kantgrupo kantis.

Dimanĉmatene okazis Trezorserĉado kaj post bongusta rostfestiĝo finiĝis sukcesplena konferenco. La venonta konferenco okazos en oktobro en Kingaroy.

—R. R.

● **N.S.K.:** La estraro kunvenas monate, je la 3-a dimanĉo en la Esperanto-Domo en Redfern. Samtage kunvenas konversacia grupo sub gvidado de Marjorie Duncan. Nia komitato kunlaboras kun la Kvinlanda Federacio pri la venonta Somerlernejo en Armidale dum januaro, 1983.

Ni deziras fari kelkajn ŝanĝojn pri la Esperanto-Domo, por ke ni havu pli da ĉambroj interne, sed ni devas atendi ĝis la konsilantaro donas la necesan permeson.

—M. Chaldecott.

● **VIKTORIO:** La ĝenerala kunveno okazis en la Esperanto-Domo en Richmond je 5-a de februaro. Laŭ la kasista raporto la Federacio havis malgrandan denciton de \$11.27, sed la kredito en la bank-kontoj estas \$527.08.

La ĝisnuna sekretariino (Barbara Podmore) ne deziris daŭrigi en la posteno kaj la kunveno elektis la jenan estraron: Prez: David Rockell, Vic-Prez: R. Reed; Sekretario: Loretto Jackson; Kasisto: Eva Trainor; Redaktoro: Herbert Koppel.

La unua aranĝo por 1982 estis pikniko en Berwick, je 20-a de februaro. 17 membroj partoprenis. Post esplorado de la loka butikcentro, membroj kolektiĝis en la loka piknikejo por la lunĉo. Malfeliĉe pluvo komenciĝis antaŭ la fino de la lunĉo kaj la partoprenantoj akceptis inviton de Ges-roj Leereveld daŭrigi la kunvenon en ties ne tro malproksima domo. La gastigantoj distris la ĉestantojn per lumbildoj pri vojaĝoj tra Indonezio kaj Sarawak kaj refreŝigan manĝeton.

### “LA SUDA KRUCO”

En sia bonega “Historio de la Aŭstralia Esperantista Organo” (“A.E.” Marto 1982), nia alte estimata kolego Ken Linton supozigas, ke “La Suda Krucro” ĉesis aperi en 1932 kaj ke naŭjara silento sekvis ĝis 1941.

Tamen mi ankoraŭ havas en mia posedo du numerojn de “La Suda Krucro” portantajn la datojn “5 MAJO 1933 No. 151 (13th Year)” kaj “23 AŪGUSTO 1933 — No. 154 (14th Year)” (tiel!). Ambaŭ portas sub la titolo la vortojn “Nova Serio”.

(Mi konservis ilin precize pro tio, ke ili ĉiu enhavas artikoleton verkitan de mi mem, kiam mi estis ankoraŭ gimnaziano!)

Kaj laŭ mia memoro, tiu de 23 Aŭgusto certe ne estis la lasta de tiu serio. Ĉu iu nekontesteble scias, precize kiam tiu serio efektive finiĝis?

—ALAN TOWSEY.

Jes, S-ro Towsey pravas. Post aŭgusto, 1932 aperis ankoraŭ 21 numeroj de “La Suda Krucro” en la t.n. “Nova Serio”. Tri numeroj aperis en 1932 (N-roj 145-147), dek numeroj en la jaro 1933 (N-roj 148-157) kaj ok numeroj en la jaro 1934. La lasta eldono (N-ro 165) portis la daton 12-a okt., 1934.

(—Red.)

**Aŭstralia Norma Elementa Diplomo:**  
Sukcesis S-ro R. K. Brittain, Nedlands, Okc. Aŭstralio.

### ĜIM KAJ ĜENI EN ROTTERDAM

La 29-an de majo, 1982, Ĝim kaj Ĝeni Dimo lerte kaj distre prezentis al esperantistoj en Rotterdam facetojn de sia vivo en la aŭstralia dezerto.

Tiun plezuron preskaŭ ne havis la roterdamanoj, ĉar semajnon antaŭe Ĝim devis eniri malsanulejon en Britio por kontroli sian korfunkcion, kaj timis necese nuligi siajn planojn viziti Nederlandon. Feliĉe la afero kontentige evoluis, kaj la aŭstraliaj mondvagadantoj sukcesis remeti ĉi tiun landeton en sian longan liston de landoj, en kiuj ili prelegas kaj varbadas por Esperanto.

Profitante la ŝancon gastis dum unu vespero la ge D'imo-ojn, ni ĝuis, krom amuza kaj interesa konversacio, improvizan muzikadon far tiuj du spertaj muzikistoj.

Post kvintaga turismado en nekutime sunbrila vetero, kaj entuziasma akcepto en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam, Ĝim kaj Ĝeni forlasis Nederlandon por daŭrigi sian eŭropan vojaĝon. Laŭplane ili prelegos al esperantistoj en FR Germanio kaj Francio, antaŭ ol reiri, fine de julio, al Britio.

Estis tre plezure renkontiĝi kun tiu vigle lerta kaj tre afabla paro, kaj ni esperas, ke ili trovos tempon nin ree renkonti en Gresillon dum julio survoje al Britio.

—Audrey C. M. CHILDS-MEE.

### LA “A.E.” SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita .....	\$171
F-ino Eva Trainor, Melbourne	6
S-ro Herbert Koppel, Melbourne	10
S-ro Mac Le Fevre, Launceston ..	10
	<hr/>
	\$197

**KIU SEKVOS ?**

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

## 17 — JEAN LEHANE (nee Matuschka)

## THE RESILIENT.

For Jean, life began at 50! Esperanto has given it direction and purpose. Her mailbox is constantly overflowing and her heart "runneth over with joy".

It was not ever thus! At one stage she was even denied her hobby—gardening, for an acute case of persistent dermatitis forced her to avoid water, soil dust, perspiration and sunlight. The death of her husband left her a widow with three small children and a recently acquired "farm", mostly scrub and swamp.

But Jean has always had the ability to "bounce back". She had always had a hard life, so she was used to work and adversity.

Back to the beginning. Forebears: Lutheran immigrants from Germany and Poland (parental), with English, Scots and a dash of Italian on the other side. Father and grandfather on a farm 50 miles from both Albury and Wagga. Corrugated, rutted link with the "outside" world. Jean started correspondence schooling at 7, under the strict eye of her ex-teacher mother. Chronic nightmares caused cessation for some months. No problem. Jean later "sailed" through four classes in two years.

The beginning of the depression saw Jean at boarding school in Wagga. A galling experience! She had never sat in a schoolroom before. Her chief solace was the school library in which, by guile, she managed to evade and exceed the limit of one book only per week. A special problem was the fact that she often fainted in assembly lines or in church services.

The ill wind of the depression blew her back to the happier life on the farm, when her learning was continued in the local school of 20 pupils in 6 classes, with one teacher for all. It was a mere horseshed away, and Jean has always loved horses.

At 14, a dairymaid. At 15, then a Junior Farmer, she first learned about Esperanto, but had no idea that there were Esperantists in Australia. At that time Jean was trying to learn German from a book.

In 1941 the prize for her winning an essay competition was a 4-year scholarship in needlecraft at East Sydney Tech. College. Reluctantly, the family let her

go. A daughter's duty was to help at home—teacing poddy calves to drink from a bucket—building 100-ton haystacks and other jobs for which there were no men. Rationing through clothing coupons limited her course. Bondi was shelled and Jean lived close by—too close for quietude. The war seemed as though it would be lost unless she helped, so Jean joined the A.W.A.S. and was stationed in Sydney for the duration. She met and married Jack Lehane, a Tobruk "rat" invalided home from New Guinea.

Meanwhile, where were the Esperantists? Jean never heard of them during her years in Sydney. (Maybe they, too, were caught up by the war effort.)

Some years later, she moved to Too-woomba where her brief career at Tech. enabled her to do some professional dressmaking and, later, to teach in a secondary school.

German. On again. Off again.

The dermatitis mentioned earlier, forced Jean back to books, but you can't read **all** the time, so for mental stimulation (she was no longer teaching), she joined the Embroiderers' Guild, and the Adult Education German class. Third time lucky. Then Italian. Then, Jean started Esperanto — a term after her classmates — but soon caught up.

At a "Zamenhof-Festo", Jean met H. V. Petley. An Esperanto Society was formed with the hostess (Mrs. Wyn Harvey, blind since her seventh year) as President, and Jean (who had a textbook and a dictionary) as Librarian.

Mr. Petley guided and encouraged Jean to write a "newsletter". When he could not continue, Jean took over as tutor.

In due course our budding tutor persuaded the Head of the local Summer School to introduce Esperanto at three levels. Alternate years found Jean at the Australian Congress and at the Too-woomba Summer School. The former improved her standing as an Esperantist and the latter—with experienced, skilled teachers as guides—her skill as a tutor. Since then, she's been very heavily committed (and dedicated) as organizer and tutor to the Summer School.

Why not go up and see her some time?  
—Arthur Cocking.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 198 (278)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1982

## TELEGRAMO AL NIA REDAKCIO

Antverpeno, 29-an de julio, 1982.

1844 esperantistoj el 50 landoj partoprenas la 67-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiun eksambasadoro Masmoudi malfermis. Universala Kongreso en Aŭstralio estas konsiderata. — Les SCOTT.



## — LA 67-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

kiu okazis de la 24-a julio ĝis la 31-a julio, 1982 en Antverpeno, ĉefurbo de Flandrio, kolektigis la partoprenantojn en la Kongresejo apud la fama Zoologia Ĝardeno. La temo de la Kongreso estis

## — GENERACIAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

Inter la kongresanoj troviĝis la Prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, Ralph Harry, antaŭa ambasadoro de Aŭstralio en Bruselo, la sekretario kaj kasisto de AEA—Marj kaj Sam Ellyard, kaj 7 aliaj membroj, nome Betty Cleminson, Arthur Cocking, Les kaj Bess Scott (N.S.K.), D-ro kaj S-ino Einihoviĉi kaj Gordon Gregson (el Okcidenta Aŭstralio).

Les Scott reprezentis Ken Linton en la Komitato de UEA, kiu komencis sian laboron la 24-an de julio kaj laboris ĝis la fina tago de la kongreso la 31-a. Ralph Harry ĉeestis en la kunsidoj de la Komitato kiel observanto. En bone organizita akceptejo la antverpenanoj donis al ĉiu sian dokumentaron, kiu inkluzivis la faldfolion "Invito el Aŭstralio".

Vespere, la 24-an, okazis la Interkona Vespere, dum kiu Claude Piron muzikis kaj kelkaj kongresanoj komune kantis. Aliaj preferis trinki kaj babilu en la restoracioj de la Zoologia Ĝardeno.

La 25-a estis la tago de la Solena Inaŭguro. La Prezidanto de AEA helpis pri la akcepto, en la tropika ĝardeno, de la diplomaciaj reprezentantoj kaj la gastparolanto, Ambasadoro Mustapha Masmoudi el Tuniso. S-ro Harry, kun la Prezidanto de UEA kaj aliaj instancoj, salutis la gastparolanton, kaj konsulojn, inter kiuj la konsulojn de Sud-Afriko kaj de Portugalio.

La Inaŭguro okazis en la Salonego de la Ĝardenoj, kie multaj mondfamaj artistoj, inkluzive Joan Sutherland, prezentis koncertojn. Post muzika enkonduko de la kvinteto "Helikon", UEA-

Prezidanto Gregoire Maertens malfermis la kunvenon. Ambasadoro Mustapha Masmoudi parolis france (la partoprenantoj ricevis esperantan tradukon) kaj poste parolis la diversaj diplomatoj. La usona reprezentanto, kiu lernis Esperanton en sia juneco, paroladis en la internacia lingvo. La aŭstralia registaro sendis skriban mesaĝon. Post la Inaŭguro, grupo, inkluzive la Prezidanton de la Akademio, Magistron Auld, kaj S-ron Harry, daŭrigis la edukadon de Ambasadoro Masmoudi dum lunĉo. Post la lunĉo okazis la Malfermo de la Kongreso. S-ino Ellyard salutis nome de AEA.

En la vespero la belgoj prezentis sian kulturon. La horo "Rundadinella" kantis flandrajn kantojn. Trio de hobojo, klavikeno kaj violonĉelo ludis Handel kaj Telemann, kaj post flagsvingado la popolartgrupo "Drieske Nijpers" dancis flandrajn dancojn.

London, la 26-an komenciĝis riĉa programo. En la Internacia Kongresa Universitato, Tibor Sekelj, kiu vizitis Aŭstralion antaŭ kelkaj jaroj, prelegis pri "Novaj konceptoj en Muzeologio". La temo de Margrete Landmark estis "Krizo en infana vivo". Prof Carl Stop-Bowitz en prelego pri "Bestoj en Folkloro kaj Arto", menciis la aŭstralian "Bunjipon", sed ne la pentradon kaj legendojn de niaj indiĝenoj.

Posttagmeze, en la Unua Generala Kunsido, la Prezidanto de AEA gratulis la Estraron pri ties raporto, kiu antaŭvidis pli da kongresoj ekster Eŭropo. Tiun vesperon, post akcepto de membroj de la Societo Zamenhof, okazis en Hotelo "Eurotel" la Kongresa Bankedo.

Mardon, la 27-an komenciĝis diskutado de la kongresa temo "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-Movado", kun apartaj kunsidoj pri la problemoj de la junuloj, mezaĝuloj kaj maljunuloj. En IKU prelegis De Kat kaj Marjorie Boulton. Dum la posttagmezo okazis la Belartaj Konkursoj; kunveno pri sporta agado kaj Turisma Foiro. La unuajn premiojn de la Belareta Konkurso gajnis: Johan H. Rosbach (Poezio), Bernard Golden (Prozo), Bernard Golden kaj Martin Haase (Teatraĵo) kaj Bertil Danielsson (Fotobranĉo).

Tiun vesperon, en la interesa, antikva urbodomo, la edzino de la urbestro akceptis reprezentantojn de la Kongreso. Ŝi substrekis la kulturajn tradiciojn de Antverpeno. La Prezidanto de UEA en sia respondo menciis la tradiciojn de la rifuĝinto-presisto Plantin kaj la rolon de la Grafika Centro de UEA.

nun instalita en la Esperanto-Domo en Antverpeno. Inter la gastoj estis veteranoj Gaston Waringhien, Roger Bernard kaj Madelein Stakien de Svislando. Post la akcepto sekvis la Kongresa Balo kun kabaredo "La Ruza kruco".

Merkredon, la 28-an, kiel kutime, la kongresanoj partoprenis en tuttagaj ekskursoj. En la vespero bulgara profesia trupo prezentis en Teatro Arenborg, la dramon "Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto", pri la libereco en socio.

Ĵaŭdon, la 29-an, la laboro rekomenciĝis — denove diskutado pri la kongresa temo, denove kunsido de la UEA-Komitato.

Ekde la komenco ĉiuj aŭstralianoj parolis al estraranoj, komitatoj kaj aliaj partoprenantoj pri la aŭstralia invito al UEA okazigi sian U.K. en Brizbano en 1988. La reago estis preskaŭ unuanime pozitiva, sed la komisiono pri kongresoj, en kiu neniu AEA-ano partoprenis, sugestis al la Komitato, ke ĝi rekomendu al la Estraro, ke, post kongreso ekster Eŭropo, devas sekvi almenaŭ du kongresoj en Eŭropo. S-roj Scott kaj Harry devis atentigi ne-Eŭropajn Komitatojn, ke tia principo povus malebligi, ne nur kongreson en Aŭstralio en 1988, sed ankaŭ kongreson en Ĉinio en 1986. Ili sugestis al ĉiuj alparoleblaj Komitatoj, ke la elekto de loko por UK devas esti lasata al la Estraro por decido laŭ ties saĝa bontrovo!

La Estraro fiksas tagordon laŭ kiu la decido pri la invito de Ĉinio kaj Aŭstralio estos faritaj post la Kongreso.

Posttagmeze okazis diskutado, enkondukita per analizo de R. L. Harry, pri agado ĉe UN kaj UNESKO. En la vespero post la akcepto de la Provincestro kaj la Aŭkto, okazis la Muzika Vespero. Kvarteto Arriaga de Belgio ludis trion de J. C. de Arriaga; Qui Zimin, ĉina kantistino, kantis 5 kantojn en Esperanto kaj Veselin Damjanov, la konata bulgara baritono, kantis popularajn ariojn el operoj kaj operetoj. Post la paŭzo pianludis Françoise Chevrier kaj kantis la Ĉambra Miksita Koruso de Bulgario.

La 30-an de julio, post la 3-a kunsido de la Komitato, okazis la 2-a Generala Kunsido, pri la Kongresa Temo. Oni decidis registri la konkludojn de la diskutado, sed ne prezenti rezolucion. Tamen oni notis, ke la temo estos menciita en rezolucio pri konferenco de UN en Vieno pri Maljunuloj.

Posttagmeze la lando de la venonta kongreso, Hungario, prezentis sin al la Kongreso. Aŭstralio ne povis tion fari oficiale, ĉar la Estraro ne konsideris ĝian inviton. Vespere oni oficiale malfermis la "Esperanto-Domon" en Antverpeno, sidejon de la antverpena societo "La Verda Stelo", de la "Flandra Esperanto-Asocio" kaj de la Grafika Centro de UEA. Helpis pri la financo kapitalo de la Fonduso Hodler. Kelkaj malavaraĵoj esperantistoj (inter ili Elfriede Ernst, kiu vizitis Melbourne por la 1-a Pacifika Kongreso) donacis almenaŭ Fl. 10.000 kaj donis nomojn al ĉambroj. ("Salono Ernst", "Salono Van Dalsem" ktp.)

Sabaton, la 31-an de Julio, la Kongreso finiĝis per solena fermo, kiam la granda verda flago, kun la nomoj de ĉiuj kongresoj post la Dua Mondmilito, estis transdonita al reprezentantoj el Budapeŝto, kie okazos la 68-a U.K. en 1983.

Ĉar la Kongresejo estis en la centro de la metropolo, la loĝantoj konsciis, ke rilatis al Esperanto. La Organiza Komitato provizis al partoprenantoj flugfoliojn en la nederlanda lingvo, kiuj klarigis kio estas Esperanto. Kelkaj eminentuloj, inkluzive 12 parlamentanojn, vizitis la Kongreson. La flandraj ĵurnaloj raportis pri la Kongreso kaj antverpena radio-stacio ĉiutage dissendis novaĵojn en Esperanto.

Nia ŝatata "Heroldo" ankaŭ aperis kvin fojojn dum la kongreso kun special-

aj artikoloj, eroj de novaĵo tutmonda, la veterprognozo, kaj la "Konferenca Kuriero". Tiel ĝi plenumis, dum iom da tempo, la aspiron de la fondinto, la ĉiamverda Teo Jung, ke "Heroldo" fariĝu ĉiutaga ĵurnalo.

—R.L.H.

#### Aldonaj sciigoj ricevitaj de S-ino Elfriede Ernst (Bruselo):

Nepre menciinda estas la vizito de 2 germanaj parlamentanoj de la Eŭropa Parlamento, nome Senatano D-ro Hans Joachim Seeler kaj S-ro Prezidinto de tutfederacio sindikataro Heinz Oskar Vetter. Post akcepto en la vintra ĝardeno, la parlamentanoj vizitis la libroservon, kie S-ro Maertens atentigis pri la eblecoj de la internacia lingvo. Ili ĉeestis publikan kunsidon de la Int. Scienca Asocio E-ista. D-ro Seeler alparolis nin en la nomo de la socialista frakcio de la Eŭropa Parlamento.

Venontaj kongresoj okazos 1983 en Budapeŝto, 1984 en Vancouver kaj 1985 en Augsburg. La aŭkcio, prezentita de D-ro Tonkin, alportis profiton de 46 050 Belgaj Frankoj. La speciala poŝticejo en la kongresejo bone funkciis kaj amaso da 12-frankaj "Esperanto"-poŝtmarkoj vendiĝis.

31 infanoj el 10 landoj partoprenis en la plenŝtopita programo de la Infana Kongreseto en Keerbergen.

Dum la ferma kunsido oni anoncis, ke partoprenis la kongreson 1899 personoj el 51 landoj.

## A. De Salvo en la Esperanto-Programo de Radio Roma

### SAN MARINO MILITAS KONTRAŬ SVEDIO

Jen historia kuriozaĵo: teorie, malgranda Respubliko San Marino, kiu superregardas italan regionon Romanjo, ankoraŭ troviĝas en milita stato kontraŭ Svedio.

Fakte, dum la Tridekjara Milito, en kiu, antaŭ tri procentoj kaj duono, Katolikoj kaj Protestantoj interbatalis, San Marino alianciĝis kun la Katolikoj, dum Svedio kun la Protestantoj. Tio ne signifas, kompreneble, ke la armeoj de San Marino kaj Svedio efektive batalis unu kontraŭ la alia; eĉ pli, estas preskaŭ certe, ke neniu San-Marina soldato iam ajn kunpuŝiĝis kun Svedoj. Sed restas la fakto, ke la reprezentantoj de San

Marino ne partoprenis en la subskribo de la Vestfaliaj traktatoj (en la jaro 1648), kiuj fermis la Tridekjaran Militon, t'el ke ĉi tiu malgranda ŝtato, en kiun alfluas ĉiujare, centmiloj da turistoj, teorie ankoraŭ estas en militaj rilatoj kun multaj Nord-Eŭropaj landoj, inter kiuj Svedio.

Kompreneble, tio neniam zorgigis iun ajn. Sed por Svedoj la afero estas iom ĝena, ĉar, laŭ la Sveda konstitucio, Svedio estas neŭtrala kaj pacema (de 165 jaroj ĝi ne partoprenas en milito), kaj la Sveda registaro nepre devas zorgi, ke la lando estu en amikaj rilatoj kun la resto de la mondo.

## ŜERCAJ ANALOJ DE 1981

### DE ROLO

#### Parto 2

En aliaj landoj ankaŭ kelkaj personoj celebris la jaron ne saĝe sed tro entuziasme. Ekzemple en Norda Irlando — la lando de iro kaj veno — la malsatstrikantoj en la malliberejo daŭrigis siajn klopodojn memhandikapi. Sinjorino Thatcher (taĉe) anoncis, ke pro la fakto, ke estas la Jaro de la Handikapuloj ŝi devas subteni la leĝon kaj ordonojn de UN kaj ne povas akcepti la strikantojn kiel kun-politikistojn. Tiam la familioj de la strikantoj decidis konsili al siaj filoj forlasi sian memhandikapadon. Do en Norda Irlando oni rekomencis la kutiman sistemon — la protestantoj denove handikapis la katolikojn per bomboj, la katolikoj donas handikapojn al la protestantoj per bomboj, pafiloj kaj bastonoj, kaj ĉiuj kristanoj kreadis handikapulojn el la irlandaj policanoj kaj el la britaj soldatoj. Eĉ post sia sperto pri handikapoj Lia Sankta Meso (pardonu, Moŝto) la Papo ne sukcesis persvadi la fidelulojn en Belfasto (la urbo de la bela fasto) akcepti la latinan principon 'cuius regio elus religio' (esperante 'kies reĝino, ties geriloj')

En Britio mem estis simila situacio. Kiel publiko por la kampanjo de UN kelkaj entuziasmoj decidis aldoni spicon al la geprinca edzceremonio (de Karulo kaj D'anto) kaj elektis kelkajn handikapotojn. Komence estis bona tumulto en Londono kaj aliaj urboj kaj oni handikapis kelkajn policanojn kaj multajn aŭtomobilojn kaj magazenvitrojn. Ŝajnis, ke estos efika triangula handikapado simila al tiu de Ulstero (lando de lu-estroj) inter nigruloj, bankuloj kaj senkoleraj ĝendarmoj. Sed la demonstracioj ĉesis kiam la amasoj detruis ĉiujn aŭtomobilojn kaj kiam ĉiu familio akiris sian televidon por rigardi la edziceremonion. Tial kiam la grizaj eminentuloj alvenis el ĉiu lando (kun la escepto de Grekio kiu ne havas registaron) ili trovis Londonon plenan je

pacaj policanoj (en Esperanto "pacaj bastonantoj"). La plano subteni UN per novaj handikapuloj tiel malsukcesis, kaj la nura rezulto de la tumulto estis, ke pro la detruo de la aŭtomobiloj, la Princo kaj Princino, kaj aliaj membroj la la reĝa klaso devis iri al la katedralo en antikvaj ĉevaltiritaj kaleŝoj kun koĉeroj.

La ĝeneralguberniestro kaj ĝeneralguberniestredzino trovis post la reveno al Aŭstralio, ke la kampanjo por la Jaro de la Handikapuloj evoluas ankaŭ tie. Organizigis bando kiu serioze handikapis preskaŭ ĉiun aŭstralianon per razilo! La ĉefministro ne admonis tiujn krimulojn. Li eĉ stimulis ilian agadon, prepare al la kulmina tago en aŭgusto kiam oni anoncis la buĝeton en la parlamento

Pro tiu troentuziasma handikapado kelkaj enloĝantoj protestis. En Sidnejo viro insistis, ke Aŭstralio devas federacii kun norda Irlando kaj li fariĝis malsatano. Li diris, ke li ne drinkos bieron aŭ eĉ irlandan viskion, sed nur mineralakvon ĝis la ĉefministro estos persvadinta S-inon Taĉe transdoni la irlandan problemon al Aŭstralio.

Nov-Zelando donis brilan ekzemplon al la Mondo de lojaleco al la idealoj de la Jaro de la Handikapuloj. En tiu lando troviĝas tiom da ŝafajo, ke neniu povas malsatiĝi, kaj la polinezianoj (maorioj) feliĉe intermiksiĝas kaj banas en la samaj varmaj vezikbanoj. Sed, por subteni la kunvokon aŭ **novkukon** de Nov-Jorko la novzelandanoj decidis importi kelkajn antilopojn el Sud-Afriko. La ĉefministro kalkulis, ke la konservistoj en Nov-Zelando protestos, kaj se ĉio iros glate la policanoj aranĝos reagan marŝon kaj la rezulto estos bona rikolto de handikapitoj. La ruzo de la ĉefministro brile sukcesis, kaj Nov-Zelando fariĝis modela lando en la tutmonda kampanjo.

(Daŭrigota)

## LETERO AL LA REDAKTORO

Koran dankon pro la aerpoŝte sendita numero de "The Australian Esperantist", kaj via letero kun la petitaj informoj pri aerpoŝta afranko. Vi starigis la demandon, ĉu vere utilas elspezi tiom da afranko por la gazeto. Ke mi faris la decidon indikas kiom mi aprezas la

akuratan ricevon de la revuo.

Mi unue legas la rubrikon "Aŭstralia Kroniko", ĉar via 'modesta gazeteto', kiel vi nomas TEA, estas mia ĉefa ligilo kun la Esperanto-movado en Aŭstralio, kaj kun miaj geamikoj en la Movado tie. Mi konsterniĝis eksciante, ke 'iuj' volas, pro malfortaj financoj, ŝanĝi aŭ la eldonritmon aŭ la presmanieron de la gazeto! **Bonvolu eviti tion!**



Mi volas akurate kaj regule ricevi la gazeton pro mia deziro resti aktuale en kontakto kun Aŭstralio kaj ĝia Esperanto-movado. Same, certe, la relative izolitaj esperantistoj en Aŭstralio mem bezonas la revuon por resti en kontakto kun sialanda Movado.

Plie, tamen, ĉiu numero enhavas unu aŭ du longajn (sed ne tre) artikolojn pri aparte interesaj, ne ĉiam pri-Esperantaj, temoj. La verkintoj estas foje aŭstralianoj sed ofte ne. Evidente la verkantoj de la Movado tutmonda opinias la revuon inda je ilia kunlaboro, ĉar **ne mankas al la redaktoro kontribuoj lingve kaj stile altnivelaj**, kaj enhave interesaj —foje gravaj, foje distraj. Cetere maloftas preseraroj, kaj tion oni ne povas diri pri ĉiuj gravaj Esperano-gazetoj.

"The Australian Esperantist" estas landa gazeto, sed ne simple enlanda, insuleca bulteno. **Ĝi estas belaspekta, informplena, pensiga revueto**, kiu tamen restas amike intima. **Promenante 'kun reĝoj', por tiel diri, ĝi ne perdas la pleban kontakton.** Feliĉe ĝi ekde nun pli rapide kontaktos ĉi tiun plebanon.

Plibonigon de la revuo por mi estus la aperigo de pli da informoj pri la agado de la aŭstraliaj esperantistoj. Mankas ekzemple, en mia plej ŝatata rubriko, la 'Sunbrila Marbordo'. Ĉu la interesan serion "Who's who in Australian Esperanto?", lerte verkitan (sed kial nur angle?) de Arthur Cocking, povus sekvi simila serio "Kiu faras kion en aŭstralia Esperantujo?"

—Audrey C. E. CHILDS-MEE  
— Rotterdam

## AŬSTRALIA- =KRONIKO

● **PERTO:** 16 anoj ĉeestis la kunvenon de 9-a de junio. Prezidanto Jack Hawks bonvenigis vizitanton el Hispanio, S-ron Hector Puig. S-ino Vera Payne raportis ke ŝi havas 15 studentojn en klaso en la Teknika Lernejo. D-ro Einhovici legis el "Monato" kaj S-ro Puig parolis pri la Esperanto-movado en sia hejmurbo en Hispanio.

22 membroj partoprenis piknikon en la hejmo de S-ino Pianta (20/6). La suno brilis kaj ni povis pikniki en la bela ĝardeno, kaj promeni ĉirkaŭ lago Jackadder. Ni ludis "Bingo" kaj kantis per la helpo de sonbendo.

Je 23-a de junio S-ro Hawks montris diapozitivajn pri vojaĝo en norda Aŭstralio kaj S-ino McGrath montris lumbildojn pri vojaĝo tra Anglujo. Je 14-a de julio S-ro Hawks montris bildojn pri interesaj lokoj en Norda Aŭstralio.

● **Adelajdo:** Je 22-a de junio ni kunvenis en la Universitato. Inter multaj ŝercoj kaj amuzaj ludoj, Bert Onn trovis tempon por fari etan paroladon pri "ata-ita" kaj Beryl Randles parolis pri vizito al U.E.A. en Rotterdam en 1972, kiam ŝi vidis kaj admiris i.a. la "Aŭstralian Cambron".

Je 12-a de julio la ĉeestantoj festis per kafo kaj Esperanto kuko kun verda stelo, la 50-an naskiĝtagon de Bob Felby, kiu okazis la natanian tagon.

Ni prezentis "Vivan Gazeton" en kiu ses "jurnalistoj" parolis; pri "Vizito al Eŭropo" (Ges-roj Goodfellow), "Kiel nutri hundon" (B. Felby), "Koncerto de Johnny Chester" (Audrey Felby), "La Modo (B. Randles); "Historio de Esperanto" (G. Clarke).

● **MELBURNO:** S-ro Ken Linton, 31/5, montris bildojn kaj parolis pri vizitoj al la insulo Vankuvero, la rivero kaj markolo Pujet, kaj veturo al San Francisko. Semajnon poste, Harry Beechey parolis pri la "Historio kaj signifo de la ludkartaro por Taroko, antaŭaĵo de la moderna ludkartaro."

Henry Rosengren, 21/6, montris bildojn kaj parolis pri militaj kaptitejoj, kaptitoj kaj gardistoj.

Interkluba kaj Jarmeza Konkursvespero okazis la 28-an de junio F-ino Margaret Sanders (Oakleigh Grupo) prezidis kiel gastgvidanto. Pri la plej valora posedajo parolis Ruth Tumman "La Etruska Arto" (ŝi montris etan skulptaĵon); Eva Trainor parolis pri "La Insulo Iono" (montris kruceton); Errol Chick montris unu el siaj 17 ekzempleroj de la Biblio kaj Ann Hearn parolis pri "La bona sano". Premion por la plej interesa rakonto gajnis Ruth Tumman, por la plej bona Esperanto-lingvo gajnis Ann Hearn Sekvis gaja festmanĝo.

Je 5-a de julio ni bonvenigis internacian geedzan paron: Hermann Lerch (Aŭstriano) kun edzino Ricky (Nederlandano) el Harlem. S-ino Lerch rakontis pri siaj aventuroj en Aŭstralio kaj siaj Esperanto-agadoj en Nederlando.

● **KANBERO:** La 7-an de junio, nia membro, Ian Pollard, alportis sian "Pomo"-Komputeron al la kunveno, kaj distris kaj instruis nin per la vortludoj en Esperanto, kiujn li mem verkis kaj metis en la komputeron. Li intencas

verki serion da lecionoj, taŭgaj por la uzado de infanoj en lernejoj, kie oni jam instalas komputerojn.

La klubo ne kunvenos en julio, kaŭze de la foresto de la prezidanto, sekretariino kaj kasisto. La unua kunveno post la paŭzo estos je la 16-a de aŭgusto.

—M. Ellyard.

● **SIDNEJO:** Je 21-a de junio Sylvia Burkitt parolis pri la skulptaĵo, kiun ŝi gajnis dum la 23-a kongreso en Adelaide. Tiu skulptaĵo estis donacita de Ges-roj Enihovici kaj estis aŭkcita per la t.n. "Dutch"-aŭkcio. Multaj personoj pagis diversaltajn monerojn kaj je la fino, nur hazarde, Sylvia donis 20 centojn, per kiuj ŝi gajnis tiun unikan skulptaĵon.

Semajnon poste Margaret Chaldecott prezentis du vortludojn; unu per la pakajo 'Vortmozaiko', kaj la alia temis pri listoj da vortoj skribitaj sur la nigra tabulo.

"Kion konfuzas la spertulo?", estis la temo de prelego de Tom Elliott (5/7). Li trovis, ke ofte simpla metodo estas pli bona ol komplikaj tiel amataj de spertuloj. Kelkfoje li strebis foti fornegon ĉe ŝtalfabrika, sed la lenso konstante frakasigis, ĝis li metis antaŭ ĝi 2 pecojn da vitro. Dum la vespero ni havis la bonŝancon bonvenigi S-anon Stan Kulski, kiu nur antaŭ 2 semajnoj alvenis kun edzino el Polio.

Semajnon poste ni bonvenigis inter ni Ges-rojn Lerch el Nederlando, kiu pasigis longan ferion en Aŭstralio. (Vidu detalojn sub "Melburno"). Shirley Fanos prezentis belajn lumbildojn pri Indonezio. Ni vidis diversajn templojn de diversaj religioj. Poste, ĉe Malacca, Shirley renkontis portugal-devenan virinon, kiu gvidis ŝin tra la urbo, kie estas forta influo de la portugaloj. Alia serio da lumbildoj temis pri Aŭstralio—velŝipoj, historiaj lokoj, lokaj E-kongresoj kaj skiatio sur herbejoj.

—Margaret CHALDECOTT

● **MANLY:** Malgraŭ la vintra vetero kaj la sezona elmigrado de multaj membroj, la klasoj ĉe la Vespera Lernejo kontentige daŭras.

Ni ĝuis revidi Flora Thomas, kiu pasigis unu jaron en Anglio, kaj ĉestis la Britan Esperanto-Kongreson en Southampton. Ŝi renkontis multajn amikojn de Manly-anoj kaj transdonis iliajn salutojn.

—Eunice GRAHAM

● **BRIZBANO:** La estraro por 1982 estas: Prez: Trevor Steele; Vic-Prez: Ray Ross. Tom O'Grady; Sekretario: Cathv Sullivan; Kasisto: Sybil Martin; Redaktoro "Babilado": Peggy Ross;

Publikaj Rilatoj: Cliff Bailey.

La 2-a klaso por komencantoj estiĝis la 5-an de julio kaj samtempe la kvin aliaj grupoj studadas. La societo intencas eldoni kantlibreton enhavante ĉ. 30 aŭstraliajn popolkantojn antaŭ la fino de 1982. La Kvinlanda Kultura Fako donacis \$150 por subteni tiun projekton. La prizorgantinoj de la kantlibro estas Gaye Phillips (tradukado) kaj Kay Andersen (muziko).

Trevor Steele ricevis kelkajn respondojn al la peto al Kvinlandaj Senatanoj, ke ili subtenu la proponon pri Esperanto kiel 2-an lingvon, kiam speciala komitato konsideros tiun proponon. Cliff Bailey ankoraŭ multe laboras pri la E-montrajo dum la Skolta Mondjamboreo apud Brizbano, januaro, 1983.

La venonta konferenco de nia Federacio okazos 23-24an de okt. en Kingaroy, la hejmurbo de Senatanino Flo Bjelke-Petersen. Speciala invito al ŝi estas survoje por viziti la konferencon.

—Ray ROSS

#### A.E.A. Somerlernejo, Armidale (2-a ĝis 14-a jan., 1983)

Ĝis nun 20 anoj intencas partopreni. Jen la listo: Jean Lehane, kvinsl; Terry Metherall, NSK., W. Chandler, NSK., Mac Le Fevre, Tas, Joyce Turner, Ray Davis, Annie Spencer, ĉiuj Kvinsl.; Myrtle Straker, NSK., Carson Thomas, Kvinsl; Sylvia Burkett, Robby Robertson, Malcolm Ross, Adelaide Ross, Bill Leah, Sheila Leah, ĉiuj N.S.K.: Pam Harris, N.T.: M. Chaldecott, M. McLennan, Shirley Fanos, ĉiuj NSK.; Patty Anson, ACT.

Oni studos en 4 grupoj: Post-Komencantoj (instruos Alan Towsey). Oni uzos la "Studlibrojn" por la Elementa kaj Supera Diplomo. Progresantoj (instruos Ray Ross). Literatura Kurso (instruos Trevor Steele). Oni uzos "Ĉu li venis Trakosme?" La 4-a grupo estos "Belarta Grupo". Tiu grupo studos en formo de Seminario, anstataŭ kurso. Por detaloj skribu al Ray Ross, 41 Agnes St., Sunnybank, 4109 (aldonu reafrankon).

#### JACK FALLU — 75-jara

La 23-an de majo, 1982 la ekspedanto de "Australian Esperantist" Jack Fallu, festis sian 75-an naskiĝdaton kaj ĉiu membro de nia Asocio deziras gratuli sian ĉiam aktivan amikon.

En la jaro 1949 Jack komencis labori por la Aŭstralia Poŝta Departamento kaj ekde la jaro 1959 li estris la liveradon de poŝtaĵoj de la poŝtoŭficejo en Suda Oakleigh.

Li ekinteresiĝis pri Esperanto en 1968, inspirita de sia edzino Ivy, kiu fariĝis esperantisto en 1965. En 1971 ges-roj Fallu vojaĝis al Eŭropo por partopreni en la famaj Esperanto-lernejoj en Helsingoer (Danlando) kaj Gresillon (Francio). Sep jarojn poste, Jack partoprenis en la 63-a Univ. Kongreso en Varna kaj poste vizitis esperantistojn en Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio.

Kiam A.E.A. bezonis novan ekspedanton por sia gazeto, Jack transprenis tiun gravan postenon en julio, 1972. Ekde 1974 li estas Prezidanto de la Oakleigh E-Grupo. Li ankaŭ servis kiel AEA-sekretario dum 1980/81.

En sia junaĝo Jack estis halterlevisto\*; tio kaj lia multjara laboro en plena aero kaŭzis, ke Jack estas treege sana homo. Espereble li ĝuos multajn feliĉajn datrevenojn kaj daŭrigos sian gravan laboron por Esperanto.

—Herbert Koppel

\*Halterlevo: angle "Weightlifting"; "Esperanto, lingvo de la sporto" de Ralph L. Harry. Nuernberg, 1972.

kiel Esperanto-Centron de la granda Metropolo Londono kaj indan vizitejon por alinaciaj Esperantistoj. Ne mankis taŭgaj kaj fervoraj subtenantoj kaj antaŭ kaj post la prezido de la verkisto.

Fakte jen vera konstelacio de talentuloj kaj fervoruloj, granda parado de nomoj, el kiuj multaj jam konataj pro ties verkoj, aŭ pro verkoj pri ili, inkluzive jen kaj jen tiujn de klubanoj persone renkontitaj.

Ne mirinde, ke en tiel longan historion ankaŭ la preskoldo sukcesis sin trudi, sed ties trukoj malfacile percepteblas kaj neniel ĝenas.

Grupaj funkciuloj kaj organizantoj nepre profitos el tia kroniko pri klubo, kiu tiel grandskale travivis ĉiaspecajn malfacilojn alfrontitajn de kluboj ĉie. Ĝi prezentas ne nur trafan instigon, sed eble ankaŭ utilan konsilon aŭ ekzemplon.

Jen vere konvena jubilea memoraro por klubo, kiu rajtas priferi sian (jam pli ol) 75-jaran ekzistadon, kiu daŭrigis sian agadon eĉ dum plej malfacilaj jaroj de milito.

—FAY KOPPEL.

## RECENZOJ

**LONDONO VOKAS 1903-1978** de Harry Holmes; eldonita de la Londona Esperanto-Klubo, 1981; presita de TK-Stafeto, Brasschat, Belgio; artilaboro de Petro Oliver; 131 paĝoj, formato 21 cm x 15 cm; prezo: £3.00 plus sendokostoj £0.60 aŭ ekvivalento.

Jen volumo nemalhavenda por ĉiu kluba biblioteko kaj egale utila konsultlibro sur la librobretaro de iu ajn serioza Esperanto-movadisto. Ĉi tiu interese ga "Historio de la Londona Esperanto-Klubo", kiu pritraktas la jarojn 1903 ĝis 1978, estas verkita de klubano, kiu, i.a., servis dudekon da jaroj (1933-1953) kiel kluba prezidanto.

La kroniko, do, konsistas grandparte el personaj memoroj kaj spertoj, en kombino kun klubaj jarraportoj kaj aliaj interesa'oj — la tuto en belaspekta kaj kronologia ordo sub rubrikaj datoj, kiuj faciligas konsulton. Ĝin ornamas kaj pli interesigas marĝenaj bildetoj kaj fotoj pri klubaj funkciuloj kaj eventoj. Interplektiĝas fonaj priskriboj aŭ aludoj pri gravaj eventoj en la Movado aliloke, same kiel pri eventoj mondskuaj, kiuj neeviteble influis sur la kluban vivadon.

Aliĝinte "iom timeme" jam en 1927, S-ro Holmes kaj lia edzino Norah, baldaŭ aktive implikiĝis en la multflanka kluba vivado, kaj ĉiel klopodis en la penado teni viva kaj progresigi la klubon

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$197
S-ino P. Anson, Canberra	1
S-ino B. Randles, Adelaide	10
S-ino J. Lehan, Toowoomba	5
S-ro Ralph Harry, Canberra	10
S-ro N. Butkunas, Melbourne	2
S-ino M. Eatt, Perth	5
"Revanto", Sydney	10
S-ro I. Grahovac, Sydney	10
S-ro W. Illingsworth, Perth	5
S-ro D. P. Mason, Mansfield, Vic.	5
Ges-roj C. Tronerud, Tweed Heads	10
S-ro H. G. Onn, Adelaide	5
S-ro C. M. Stiles, Rendelsham, S.A.	10
S-ro L. G. Eddington, Perth	5
F-ino A. Curtis, N. Tambourine, Q.	3
F-ino B. Williams, Melbourne	20
S-ino M. Wybenga, Morwell, V.	2
F-ino I. Gale, Melbourne	2
S-ro T. Steele, Brisbane	5
S-ro R. Pearce, Cowra, NSW	5
S-ro I. Slavoff, Melbourne	10
Ges-roj K. Bowling, Sydney	10
S-ro H. Rosengren, Melbourne	5
Ges-roj R. Felby, Adelaide	10
S-ino L. Fridenbergs, Melbourne	5
Ges-roj T. Einihovici, Perth	10

\$377

### Donacoj al Nov-Jorka Oficejo de UEA:

S-ino I. Einihovici \$100, S-ino M. Ellyard \$25, S-ino J. Lehan \$25, S-ro N. Collier \$13.

### Aŭstralia Norma Elementa Diplomo:

Sukcesis kun honoro: S-ro Mac Le Fevre, Launceston (Tas.).

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

## 18 — RUTH McGRATH

"A lady, sweet and shy"

- Me: You say that there have been lots of men in your life. Tell me more
- Ruth: Ne miskomprenu. Jes, mi havas 3 fratojn, 3 filojn kaj unu edzon, sed speciale mi ŝuldas grandan sumon da danko al tri viraj esperantistoj. Unue al David Miller, tiam lingva instruisto ĉe privata gimnazio en Perto. Li gvidis vesperan Esperanto-kurson ĉe la Teknika Kolegio en Perto dum 1945. Li inspiris nin kaj donis al ni firman bazon en la lingvo.
- Me: And the second?
- Ruth: D-ro Caldera, kompreneble. Forta laborgrupestro! Tri horojn, 7 ĝis 10 p.t.m. Longe antaŭ la fino, sidante sur palmola benko, mi sentis min, en la angla, 'a dead end kid'. Sed li estis instruisto senkompara — ne ortodoksa, sed tre inspiranta.
- Me: Oh well, it was only one night a week. For 6 nights you could relax.
- Ruth: Ĉu vi kredas tiel? Mi devis fari ekzamenojn, historietojn, konkursojn. Laboro post laboro! Sed kontentiga laboro. Mi memoras speciale konkurson de la Melburna "Rendevuo". Mi volis forjeti mian verketon en la rubaĵojn.
- Mi: So you felt like throwing your effort into the waste paper basket. It that what you did?
- Ruth: Ne, mi timis la serĉantan okulon kaj la demandantan langon de la Doktoro. Ne, mi partoprenis: mi gajnis la premion.
- Me: So you entered, and won. Congratulations. How many other contestants?
- Ruth: Mi timis, ke vi demandos tion! Mi ne estas certa. Diru ni ke, dum postaj jaroj, kiam mi ne partoprenis, ne estis konkurso. Flustru ni, ke eble mi estis la sola konkursanto.
- Me: I'm sure you under-rate yourself. Now the third Esperanto man in your life . . . er, the third man in your Esperanto life.
- Ruth: Nu, D-ro Caldera, sub kies okulo mi, ne tre volonte, nun instruis klason, foje demandis al mi, "Ĉu vi volas aliĝi al la Traduka Rondo de S-ro Banham?" "Ne, dankon," mi respondis. "Ne gravas. Mi jam aligis vin."
- Me: So he enrolled you, as a conscript, in the Translation Circle, I suppose you soon got out again.
- Ruth: Ne, mi restis dum 20 jaroj. Reg. Banham iĝis ne nur kontrolisto kaj instruisto kaj korespondanto, sed kara amiko.
- Me: Reg. Banham was the third man in the series. No more men in your life?
- Ruth: Memoru ke mia nomo estis Ruth Goodall. En 1947, mi edziniĝis. Mia edzo, Hugh, ne parolas Esperanton, sed li iomete komprenas ĝin kaj diversmaniere helpis nian grupon.
- Me: Have you any other interests apart from Esperanto, Esperanto men and of course, your good husband?
- Ruth: Mia edzo kaj mi partoprenas multajn flankokupojn—speciale fotografion kaj sovaĝajn florojn.
- Me: Oh, wild flowers. "In my wild erratic Fancy", I was thinking of savage flowers — creature eaters of the terrible jungle.
- Ruth: Fakte, multaj el niaj sovaĝaj floraj estas etaj. Ili ĉiuj estas dolcaj. Mi ne nur ŝatas ilin mi amas ilin. Mi estas ŝatinta sovaĝajn florojn, mi kredas, preskaŭ ekde mia naskiĝo en Kojonup, Okcidenta Aŭstralio.
- Me: So you spend most of your time among the wild flowers, and the birds and the bees!
- Ruth: Ne. Sed kiel eble plej ofte mi vizitis, printempe, somere, aŭtune kaj vintre specialajn lokojn de nia ĉirkaŭaĵo.
- Me: Have you studied Botany at University level?
- Ruth: Jes, kaj ne, Hugh kaj mi faris Universitatan kurson pri "plant recognition", tre utila.
- Me: That's pretty good for a girl who attended a one-teacher bush school.
- Ruth: Eble. Mi estas farinta kelkajn aliajn kursojn ankaŭ dum kelkaj jaroj ĉe la ne malproksima Murdoch University.
- Me: To change the subject, you haven't mentioned Esperanto Congresses. Do you attend many?
- Ruth: Mi tre malofte ĉeestas. Foje mi estis ŝlosita en tombejo kiam mi ĉeestis kongreson.
- Me: I hope beginners realise that you were locked in a cemetery, not "sloshed" in one. You got out before dark. I understand. Anyhow, now you are locked into the Esperanto movement and we're glad of it.
- Ruth: Firme, kaj ĉiame!

—Arthur COCKING.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T, G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Eilyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 199 (279)

MELBOURNE

Septembro, 1982

---

Tibor Sekelj

## KIAL MI REVENIS AL ESPERANTO

Foje mi aŭdis pri viro, kiu ekdezigiĝis de sia longjara edzino kaj, post plurjara disa vivo, denove edziĝis kun la sama virino. Mi iel enviis tiun personon: por ĉiuj tri agoj - edziĝo, ekdezigiĝo kaj reedziĝo—li certe havis bonajn kialojn, do li trifoje sukcesis plenumi sian deziron kaj "trovi la ĝustan vojon".

Iom simile okazis al mi rilate al Esperanto. Post kvardekjara "edzeco" kun ĝi, mi forlasis miajn klopodojn por la Internacia Lingvo, kaj post jardeko mi denove revenis al ĝi kun la sama fervoro kiel en la komenco mem.

Sed ni vidu la kaŭzon de tia ŝanceliĝo.

Okjara mi estis kiam en la tirkesto de la skribotablo de mia patro mi trovis hungarlingvan "Slosilon" de Esperanto. Traleginte ĝian unupaĝan antaŭparolon, mi senhezite decidis: tio estas kion la homaro bezonas. Kaj ĉar mi estas parto de la homaro, ankaŭ mi ĝin bezonas. Kvankam mi ne faris klopodojn lerni la lingvon el la ŝlosilo, dum jaroj mi vartis la ideon akiri ĝin kaj tiel fariĝi

vera membro de la tuthoma familio. Nenian dubon mi havis, kaj eĉ aŭdacis ekdiskuti kun mia gimnazia profesoro por defendi la kaŭzon.

Kiam mi deksepjara alvenis al la universitato en Zagreb, mi profitis la unuan okazon por enskribiĝi en kurson de Esperanto kaj lerni la lingvon. Post tri monatoj mi sufiĉe flue ĝin parolis.

Ekde tiam Esperanto okupis gravan parton de mia vivo. Ĉirkaŭ cent kursojn mi gvidis sur ĉiuj niveloj. Kvardekon da societoj kaj ok landajn asociojn mi fondis, plejparte en Latinameriko, sed ankaŭ en Hindujo kaj Nepalo. Sennombrajn miajn prelegojn artikolojn kaj kelkajn librojn produktis mia skribmaŝino. Ankaŭ por organizaj laboroj en internacia skalo mi ne ŝparis miajn fortojn. Tiel la ideo kiu ekgermis en knaba kapo donis siajn fruktojn en matura aĝo.

La kulmina produkto de mia fervoro kunligita al sperto estis mia iniciato de fondo de IOE (1963). La ideo estis simpla: Esperanton oni malmulte lernas, kaj multaj, kiuj lernis, forlasis ĝin, ĉar

ĝi ne estas sufiĉe uzebala en la nuna stato de la aferoj. Do, ni igu ĝin laŭeble plej utila. Ni enkonduku ĝin en la plej diversajn fakojn de homa aktivo, per serioj de kunligitaj kampanjoj.

Kiam UEA rifuzis subteni tian programon, mi iniciatis la fondon de IOE, kune kun mia frato Antonije kaj pluraj aliaj konataj esperantistoj. Malgraŭ la konstantaj atakoj kaj kontraŭagoj de la tiama prezidanto de UEA, dum ok jaroj IOE funkciis kaj rugule eldonadis sian monatan revuon "IOE-Gazeto", poste "Esperanto-Gazeto".

Mi ne intencas okupiĝi pri la motivoj, kiujn havis la citita funkciulo por kontraŭbatali nian poresperantan agadon. Sufiĉu konstati, ke mi konkludis, ke mi ne venis al Esperantujo por batali kontraŭ aliaj esperantistoj, sed nur por Esperanto. Ĉar tio ne eblas en tiaj cirkonstancoj, mi prefere forlasu la Movadon.

Kaj mi ĝin forlasis. Estis 1972.

En tiu tempo krom la ĝeno por la konduto de tiu funkciulo kaj aliaj, kiujn li sukcesis influi; fariĝis al mi klara ankaŭ la fakto, ke ne estos eble progresigi Esperanton per la malnovaj, ŝtoniĝintaj metodoj, ne allasante iun ajn novan ideon. Mia senluziigo tiel kompletigis.

Jen kial mi forlasis la Movadon. Dum dek jaroj mi ne apartenis al ia organizajo; nur mi retenis miajn personajn rilatojn kaj volonte prelegis kiam ajn ia Esperanto-grupo min invitis.

Sed, post tia senluziigo, kio igis min reveni al la Esperanto-Movado? Ĉu ŝanĝiĝis la cirkonstancoj?

Jes, parte ili ŝanĝiĝis. La Funkciulo, kiu min kontraŭbatalis, estis forigita el la Movado, kaj pli liberalaj kaj progresemaj ventoj ekblovis en Esperantujo.

Tamen, ne nur tio okazis. Intertempe mi daŭrigis miajn vojaĝadojn. Ekde 1971 mi vizitis aŭ revizitis ĉiujn kvin kontinentojn, partoprenis kongresojn, konferencojn, festivalojn kaj ekhavis ĉie multajn novajn amikojn. Kaj ĉar la senco de miaj vojaĝoj kaj renkontoj estas komuniĝo kun aliaj homoj, sur plej diversaj niveloj, multlingveco fariĝis mia natura stato.

Sed miaj ideoj pri interhoma kompreniĝo neniel ŝanĝiĝis ekde la tago kiam mi malkovris la "Slosilon" en la tirkesto. Mi ne povis ne rimarki la faktojn pri la mizera interkompreniĝo kaj miskompreniĝo inter homoj, kaj

ankaŭ tion, kiom multaj homoj sur ĉiuj intelektaj kaj socialaj niveloj preterlasas komuniĝi kun aliaj homoj pro manko de komuna lingvo.

Ĉiuj homoj, kiuj havas regulajn kontaktojn kun alilingvanoj, esats potencialaj adeptoj de la Internacia Lingvo. Sed ĉu ili mem tiel pensas?

Unu parto de ili ne scias pri Esperanto, aŭ ne konas ĝian kapablon plenumi la rolon de interkomprenilo. La dua parto favore pensas pri Esperanto kaj estas preta eklerni ĝin tuj kiam ĝi fariĝus ĝenerale akceptita. La tria parto preferas reteni la avantaĝojn de la uzo de nacia lingvo, ĉu propra ĉu poste lernita, pro egoismaj motivoj.

Mi alvenis al la konkludo, ke nia centjara batalo kontraŭ tiuj tri armeoj ne alportis kontentigajn rezultojn. Rekonante la faktojn, ke dank' al unuopuloj Esperanto ekzistas, havas sian respektindan literaturon kaj estas konstante uzata de limigita kvanto da personoj diverslande, ni devas agnoski ankaŭ, ke apud la "gerila" batalado de unuopuloj ni devas turni nian atenton pli kaj pli al la grandaj internaciaj organizaĵoj, do al tiuj, kiuj plej multe suferas pro la multlingveco, kaj krome plej multon povas fari por la ŝanĝo de tiu stato.

Tiel konkludis ankaŭ aliaj. El tio fontas kreskanta kunlaboro de UEA kun Unesko kaj UNO, same kiel kun pluraj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Tiu vojo, se lerte gvidata, povas alporti tre valorajn rezultojn.

Inter la grandaj interŝtataj organizaĵoj, netuŝita ankoraŭ, troviĝas unu, kiu, eble plej multe bezonas la Internacian Lingvon. Temas pri la Movado de Nealiancitaj Landoj. Ĝi estas bloko de cento da landoj — plejparte el la "tria mondo" — kiuj ofte kunvenadas, sur nivelo de ŝtatestro, ministroj diversfakaj, teknikistoj ktp. — kaj reprezentas sufiĉe gravan forton en la Unuiĝintaj Nacioj. En siaj kunvenoj ili uzas ĉefe la anglan kaj francan, krom aliaj lingvoj uzataj okaze, kvankam la du menciitaj estas gepatra lingvo de eĉ ne unu el la cent nacioj. Kontraŭe en multaj el tiuj landoj ĝuste tiuj lingvoj estas malŝtataj, kiel lingvoj altruditaj de la iamaj koloniaj mastroj.

Jen estas tereno prilaborenda. Al mi ŝajnas, ke, se tiu grupo adoptus Esperanton por sia interkomunikado, tiun sian decidon kaj praktikadon ili iom

post iom transplantus en UNO kaj aliajn internaciajn organizaĵojn, kaj la mondo devus sekvi ilin, vole-nevole.

Eble mi nur revas, eble mia optimismo min blindigas. Tamen, ne ekagi, eĉ kun minimumaj ŝancoj je sukceso, estus nepardonebla peko. Iu, aŭ prefere grupo da kompetentaj personoj, devas ekagi en tiu senco, por iel kompletigi ĉiujn aliajn, jam ekzistantajn vojojn.

Sed kiu estas preta ekiri tiun novan vojon? Vojon dornoplenan, necertan, riskan? Kiu provos eklugi la sovaĝan, neniam prilaboritan grundon?

Ho, pardonu, ke mi malproksimiĝis de la komenca temo. Mi ja volis rakonti kial mi revenis al Esperanto, ĉu ne?

—oOo—

La aŭtoro de la supra artikolo, kiu vizitis Aŭstralion fine de 1970 kaj komence de 1971, skribis:

“Mi ĉiam kun plezuro rememoras m’an restadon en Aŭstralio kaj la amikecon kun kiu ĉiuj samideanoj min akceptis tie.”

## ŜERCAJ ANALOJ DE 1981 DE ROLO (Fino)

Sed nun mi devas rapide skizi la alian tendencon, kiun mi menciis—la evoluon de la savarmeoj, ĉar la eterne militantaj ne povis lasi la tutan gloron al la policanoj, ministroj kaj landiranoj.

Nu en Britio, la fonto kaj origino de la ideo de savarmeoj la disĉiploj de Generalo Booth (pron. but) iomete retiriĝis en 1981. La ĵurnaloj raportis, ke la fraĉlinoj kun la pajlĉapeloj kolektas monon ne por personoj handikapitaj per alkoholo aŭ maljuneco, sed ankaŭ por savi morale handikapitajn pekantojn. La Armeo mem anoncis, ke ĝi forlasos siajn aliancilojn en la Monda Konsilio de Eklezioj, kiuj strebas kontraŭ rasdiskriminacio en nekomunistaj landoj, kaj limigos sin al la batalo kontraŭ Satano kaj por la savado de animoj. En la Armeo estas **manioj** por **animoj**.

Sed en aliaj landoj savarmeoj floris kaj plimultiĝis.

En Sud-Afriko, lando de antelopoj kaj jambukoj, la armeo organizis ekspedicion por savi la popolon de Namibio kontraŭ la liberigan movadon de iu onklo Sam. Por efektiviĝi tion la armeo invadis najbaran landon kaj detruis kelkajn vilaĝojn. Iuj knaboj diris al la

invadintoj: “Ĉi tie estas Angolo”. Sed la ĉefo de la S. A. Savarmeo respondis: “Se vi ne silentos estos anĝeloj en ĉi tiu angulo”.

En Sud-Afriko ankaŭ arda grupo da dungitaj soldatoj decidis savi la Insulojn Sejŝeloj. Ili organizis, tiucele, kongreson de ŝaŭmblovantoj por trinki bieron. Sed la bonveno en la flughaveno ne estis sufiĉe ŝaŭme amika. Ili decidis, ke “la diskreteco estas pli grava ol la sekreteco” kaj ili trafis la plej fruan flugon al sia hejmlando. Ili eĉ stimulis la piloton plifruigi la flugon.

En la Filipinoj la savarmeoj de la islamanoj batalis por savi la ŝtaton kontraŭ la markosanoj. Kompreneble spite al la anagramatiko Markos tute ne estas Markso.

En ĉiu kontinento aperis tiaj armeoj. En Sudorienta Azio la Savarmeo de Vjetnamio restis en Kampuĉio por protekti ĝin kontraŭ la Eta Princo kaj liaj amikoj la Ruĝaj Ĥimeroj kaj la Lanolinoj. Eĉ la minaco, ke Savarmeo venos (El Popola Ĉinio) ne timigis la kuraĝajn malgrandajn vjetnamianojn, kiuj jam savis la sudon de sia lando kontraŭ la usonanoj, la aŭstralanoj kaj la sudvjetnamianoj.

En Afganio la ruĝa savarmeo restis ankaŭ por savi la landon kontraŭ la afganoj. Oni diris, ke ĝi restos ĝis oni trovos tiun personon, kiu invitis la ruĝhaŭtulojn sendi siajn aviadilojn kaj tankojn!

En Pollando la laboristoj postulis la rajton striki, kaj konstante faris la pekon de libereco. Ili konfesis tiun pekon al la pastro sed la armeo decidis savi la landon per deklaro de milito. La generalo diris: Se oni deziras pacon oni devas esti preta por milito. Se oni deziras danki, ĝi estu donata al milico.

Dum la mondo rigardis streĉe la kampanjon por savi Pollandon, la Israelanoj decidis savi la altaĵojn de Golano, nomita por fama futbalisto. Tiu ne estis tre fertila grundo, sed la panoramo je la pinto estas tre bela, por la okupantoj.

En la Centra Afrika Respubliko la Prezidento decidis memvole serĉi savon, kaj invitis la Armeĉefon transpreni la prezidentecon. Tiel li ne nur savis sian manion, sed ankaŭ evitis morton pro plumboveneno.

En Esperantio ankaŭ oni fidele prizorgis la kripligitan organizaĵon de la tutmonda movado. En la nomo de neŭtral-

eco oni retenis la obstinajn barojn kontraŭ kunlaborado.

Sed en Brazilo estis ekbrilo de espero. Tie la tri rivalaj savarmeoj organizis batalhalton por organizi la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en la Suda Duonsfero, kaj ĉiuj unuiĝis por handikapi la krokodilojn kiuj svarmas en sudaj kongresoj kaj kripligas la karan lingvon!

Kaj antaŭ la fino de la jaro venis klariona voko de la Apostolo de Neŭtraleco, pledante por simila armistico, kiu ebligus al la verda popolo fari la jaron 1987 "Jaro de la Internacia Lingvo" kaj organizi unuigitan armeon. Se USA estas (kiel "Monato" asertis) "Universala Savarmeo" tiam UEA povus esti Universala Evangelia Armeo, por savi la mondon kontraŭ ĉiuj lingvaj handikapoj kaj kiu povus krei sanktan harmonion eĉ en Esperantio.

### LA 55-a S.A.T. — KONGRESO

okazis inter la 31-a de julio kaj 6-a de aŭgusto en la urbo Iisalmi, en la centro de Finnlando. La kongresejo estis moderna lernejo por metilernantoj, impona konstruaĵo proksima al la urba centro. Venis 237 personoj el 15 landoj, kiuj diskutis pri temoj kaj problemoj de SAT kaj la laborista Esperantomovado.

La dudek-membra loka Esperantogrupa organizis bonegan kongreson sub la gvido de Reino Eriksson. Okazis multaj ekskursoj kaj vizitoj, interalie al la naskiĝdomo de Kekkonen, antaŭa prezidento de Finnlando. Aliaj ekskursoj iris al kuracloko Runne kaj al artmuzeoj meze en la kamparo, kun verkoj de skulptistoj kaj pentristoj el la 20-a jarcento.

Ĉe la Malfermo, inter multaj salutparolantoj, la urbestro de Iisalmi legis siajn salutojn en Esperanto. Por la Plenumkomitato de SAT parolis la novelektita prezidento G. Chevrolat. La urba kaj la provinca gazetaro raportis ĉiutage pri la Kongreso kun ilustraĵoj. Unu provinca gazeto aperigis ĉiutage rubrikon de mondaj novaĵoj en Esperanto. Oni ankaŭ dissendis unu mallongan televidan programon. Postkongresaj ekskursoj kondukis la anaron al Laponio kaj al Leningrado.

La kongreso akceptis 'Deklaracion', destinitan al la nacilingva gazetaro kaj 'Gvidrezolucion', kiu alvokis la mem-

brojn al pli vigla laboro por SAT kaj Esperanto. Interalie la 'Deklaracio' diris: "La Kongreso opinias, ke, per uzo de Esperanto, per sia emfazenda karaktero sendogma kaj sennacieca, SAT havas eblecon plenumi grandajn taskojn en klerigo, emancipado kaj interrilatado de la tutmonda laboristaro."

La venontjara SAT-Kongreso okazos en LINZ, Aŭstrio de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, 1983.

(Laŭ raportoj ricevitaj de Henry Lindkvist, Malmoe kaj de SAT-Gazetarservo, Parizo).

### La 16-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

okazis en Seinano (Italio) de la 15-a ĝis 24-a de julio, 1982. Aliĝis 87 ĝeinstruistoj el 10 landoj (i.a. el Aŭstralio Arthur Cocking kaj ges-roj Einihovici). La ĉefa temo de la konferenco estis "La emancipa principo de Esperanto en la edukado: eblecoj kaj limoj".

La malfermo okazis tre solene. La Ministro pri Publika Instruado sendis saluttelegramon, same kiel la prezidanto de la 179-persona parlamenta grupo, U.E.A. kaj la prefekto de Napoli, S-ro Arthur Cocking salutis en la nomo de Aŭstralio. Dum la Inaŭguro festparoladis la prezidanto Helmut Sonnabend.

Inter diversaj prelegantoj estis el Aŭstralio S-ino Idyss Einihovici, kiu prelegis pri "Mia instruado de Esperanto al infangrupo en la urbo Perth: spertoj kaj konkludoj." Menciinda estas tre interesa prelego de Antoni Marciega pri "Ĉu la mondo vere bezonas internacian lingvon?", kaj prelego de ambasadoro Mustapha Masmoudi pri "La nova mondkala ordo de informado kaj komunikado."

En la kadro de la konferenco oni reelektis la ĝisnunan prezidanton Helmut Sonnabend (Germanio) kaj la sekretarion D-ron M. Dazzini (Italio). Ĉiutage aŭtobusoj kondukis kongresanojn al la maro por ĝui banon.

La venontjara konferenco okazos en Sintra (Portugalia) pri la temo "Etnaj grupoj, etnaj lingvoj kaj Esperanto." Oni multe diskutis pri dezirata konferenco en Aŭstralio (eble en Brizbano).

(Laŭ raportoj ricevitaj de D-ro A. Einihovici, Perto kaj S-ino E. Ernst, Bruselo.)



**Pri la 67-a Univ. Kongreso:** "La informa servo estis nekontentiga. Ekzemple kiam mi demandis kie estas la necesejo por viroj, la fraŭlino ĉe la giĉeto respondis, ke ŝi tion ne scias, ĉar ŝi ĉiam uzas la necesejon por virinoj. Ĉu tio ne estas diskriminado kontraŭ viroj?" (Jozefo Major en "N.Z. Esperantisto")

#### Spertoj de kongresa organizinto

Germanoj estas konataj kiel bonegaj organizantoj. Pro tio sendube la sekvantaj linioj el raporto pri la lasta germana Esperanto-kongreso interesos:

"Mia tasko en la Loka Kongresa Komitato estis la publika laboro, kaj mi provis iel logi la eksteran publikon en niajn rondojn por montri, ke ni ne estas tiom sektecaj kiel ofte dirite. La "Westdeutscher Rundfunk" (Okcident-Germana Radio) sendis nenion. Al da gazetara konferenco venis entute tri ĵurnalistoj. Ili havis neniujn antaŭinformojn, eĉ ne tiujn, kiujn mi sendis, kaj unu sciis nenion pri la Eŭropa lingva politiko kaj la Eŭropa Pasporto. Mi tre dubis, ĉu havis sencen, klarigi al ili rezultojn de la kongreso. Fine mi disdonis memverkitan artikolon jam kun pretaj bildoj! Ankaŭ kelkaj kunlaborantoj de mi el la lokaj grupoj kunportis jam bildojn kaj atendis artikolon de mi, kiun ili preparas por la lokaj gazetoj.

Malsukcesaj estis la porpublikaj aranĝoj, prelego kaj diskutondo, al kiuj mi invitis 30 partiojn kaj ĵurnalarajn grupojn el Muenster. Eĉ **ne unu venis!** Multe pli efikaj estis la vesperaj festoj. Cetere: Al ĉiuj publikaj aranĝoj mi invitis per leteroj, flugfolioj, afiŝoj kaj anoncoj kaj artikoletoj en la lokaj gazetoj kaj en ĉiuj lokaj anonc-bultenoj.

Mi esperas, ke ĉi tiuj spertoj estas helpaj por alilokaj funkcioj, kiuj preparas renkontiĝojn aŭ kongresojn."

(D-ro Rudolf Fischer, Estrarano pri informado de la Germana E-Asocio, en "Esperanto aktuel" 3/82).

## NEKROLOGOJ

### HILDA BANHAM

La 28-an de julio, 1982, en Kvinslando, je la aĝo 81, mortis S-ino Hilda Banham, vidvino de Frank Reginald Banham, Redaktoro de la A.E.A.-gazeto inter 1929 kaj 1974.

Kiam, iam en 1930, Frank Banham, esperantisto jam per privata studado, unue vizitis la kunvenejon de la Melburna E-Klubo, li "ekvidis" sian "estontan edzinon (F-inon Hilda Dawes)"

diplomiton de Brita E-Asocio, kiu plenumis instruan deĵoron. "Mi sekvis ŝin hejmen per tramo, en kiu ŝi jam sidiĝis. Kiam ŝi eltramiĝis, mi ŝin postkure atingis kaj min konatigis. Post iom da enkonduke formala interparolado, ŝi feliĉe (por mi) akceptis proponon, ke mi kaj ŝi lernu kune, ekzercante la paroladon en Esperanto . . . kondiĉe ke ni parolu, kiam duopo **nur** en Esperanto. Post ses monatoj, ni gefianĉiĝis; en februaro 1931, ni geedziĝis". (Vidu "A.E." okt., 1974).

Kiel edzino, kaj poste patrino (al la paro naskiĝis filino Margaret kaj filo Frank), S-ino Banham ŝajne trovis sin sufiĉe okupata sen plua aktivo en la Esperanto-sfero, sed ŝi ĉiam subtenis la agadon de la edzo. Tamen, post lia morto, ŝi denove eklaboris por ordigi aferojn postlasitajn. Tre konsciencie ŝi pritraktis ĉiujn korespondadojn, daŭre alvenantajn dum pli ol jaro, kaj faris sian eblon transdoni al taŭgaj personoj laborojn de li nefinitajn. Fine, sed nur post transloĝiĝo al Kvinslando, responde al multaj petrikuboj rilate la longedaŭran korespondan kurson de la edzo, ŝi surpronis sur sin la grandajn taskojn kaj elspezon maŝinskribi kaj libroforme eldoni selekton de liaj ekzercoj, kun tradukoj kaj notoj.

Tiu verko — "A Translation Course in Esperanto" — kiun S-ro Alan Towsey redaktis, aperis fine de 1979.

S-ino Banham sen averto aŭ malsano, mortis pace dum dormado, kaj estis kremaciita je 30-a de julio ĉe Albany Creek, Brizbano.

—F. Koppel.

### J. T. ALLAN

La 6-an de julio, 1982 mortis en Wellington, Nov-Zelando, James Tait Allan, post subita kaj mallonga malsano.

"Jim" Allan estis la prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ UEA-Ĉefdelegito. Li naskiĝis en Wellington en la jaro 1915 kaj eklernis Esperanton en la jaro 1936, en la E-Klubo de Wellington.

Profesie li laboris en la administrado de la publika hospitalo de Wellington kaj je sia emergentiĝo li estis la ĉefa administranto. Dum la dua mondmilito li de'oris en la medicina korpuso en la pacifikaj insuloj.

En la jaro 1957 Jim Allan fariĝis ĉefdelegito de UEA kaj en 1970 Prezidanto de NZEA. Dum antaŭaj jaroj li estis ankaŭ sekretario (1953-1955) kaj

kasisto (1955-1957). Kiam okazis en januaro 1976 en Melburno la 1-a Pacifika Esperanto-Kongreso, Jim Allan estis la gvidanto de forta Nov-Zelanda delegataro.

Li havis grandan organizan kaj administran kapablon kaj neniu krizo povis venki lin.

Inter la proksimume 200 funebrantoj estis ankaŭ 16 esperantistoj. Nome de la NZ Esperanto-Asocio, Majoro H.W.R. Petersen faris la panegiran paroladon. Al S-ino Allan kaj la tri filinoj kaj filo iras niaj sinceraj kondolencoj.

—H. Koppel.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** La Ligo spertis "malsekan piknikon" je dimanĉo, 22-a de aŭgusto. Alvenis al la Nacia Parko 27 personoj, sed kaim ili komencis manĝi, komenciĝis pluvo. Chris kaj Dolly Dean proponis, ke ĉiuj iru al ilia hejmo por daŭrigi la piknikon. Janek Wolak faris komercan paroladon pri vendado de kuiriloj.

Ĉe la grupa kunveno de la 25-a de aŭgusto, S-ro Illingworth, montris diazitivon pri Brazilo, Argentino kaj Afriko.

● **Adelajdo:** Bonvenaj vizitantoj al nia urbo estis s-ino Ruth McGrath el Perto (22-a de aŭgusto) kaj s-ino Joan Green el Newcastle (27-a de aŭgusto) Je 14-a de septembro okazis kunveno en la Universitato. Bedaŭrinde la du prelegantoj Beryl Randles kaj George Clarke ne povis ĉeesti. Do Bob Felby distris la ĉeestantojn per krucvortenigmoj.

La societo nun eldonas ĉiunonate propran klub-gazeton "TAMEN PLU", kiu estas nete redaktita kaj presita.

● **MELBURNO:** Je 19-a de julio s-ro Jan Makowski denove parols ipir Komputeroj, ties diversaj lingvoj kaj la programado. Semajnon poste, Ken Linton distris per diazitivon kaj prelego pri vizitoj al San Francisko kaj Honolulu.

Je 2-a de aŭgusto s-ro Harry Beechey parolis pri "La leĝoj en Aŭstralio kaj la diferencoj inter la ŝtatoj. Semajnon poste, Herbert Koppel raportis pri la ŝusa Universala Kongreso en Antverpeno kaj la kongreso de la fervojistoj en Hungario.

Ces-roj Linton kaj Koppel ĉeestis la funebran ceremonion por S-ino Ida Cohen, kara edzino de Marshall Cohen, je 3-a de aŭgusto. Ŝi mortis je 31-a de julio post longa malsano. Al Marshall kaj ties familio iras niaj sinceraj kondolencoj. (Vidu biografion pri s-ro Cohen sur la lasta paĝo.)

● **LAUNCESTON, TAS.** S-ro Mac Le Fevre daŭre instruas klason de 9 personoj ĉe la Eduka Centro por Plenajuloj. Du el la studentoj estas instruistinoj; unu el ili nun instruas "elektitan grupon" de 10 infanoj, dufoje semajne.

● **MANLY:** Lastatempe preskaŭ ĉiuj altgraduloj el nia klubo foriris, por ĝui vintrajn libertempojn en pli mildaj klimatoj. Betty Cleminson, Arthur Cocking, Les kaj Betty Scott ĉeestis la Universalan Kongreson en Antverpeno, Marjorie Duncan kaj Eunice Graham vizitis parencojn en Britio, Geoff kaj Mary Myers teriis en Kvinlando, do, ĉiuj instruistoj estis for, krom via raportanto. Bonŝance la vesperlernejo samtempe libertempis, kaj nur mallonge geanstataŭantoj devis instrui. — ROBI.

● **KANBERO:** Estis paŭzeto en nia kluba agado dum julio kaj aŭgusto. Ges-roj Ellyard kaj Ralph Harry partoprenis en la 67-a Univ. Kongreso en Antverpeno kaj Brenda Birkett vizitis sian familion en Okcidenta Aŭstralio.

Tamen, la klubo plenumis sian kontrakon kun la Instituto pri Internaciaj Aferoj en aŭgusto, kiam Katherine Lewis, Brenda Birkett, kun aliaj membroj kaj amikoj pakis kaj enpoŝtigis la kutimajn 3000 ekzemplerojn de "Austrian Outlook". La Klubo kaj AEA dankas al tiuj sindonemaj membroj, kiuj per sia laboro certigis, ke ni kaj la Biblioteko de AEA havu taŭgan ejon dum la venontaj 4 monatoj. (Laŭ "KEK KURIERO", kies revivigon "AE" bonvenigas.)

● **VIKTORIO:** La jara seminario de la Federacio okazis de vendredo, 27-a ĝis dimanĉo, 29-a de aŭgusto, 1982, en la konvena "Cranbrook Lodge" de la Savarneo en Healesville. Dudek tri esperantistoj de ĉiuj 4 Melburnaj Esperantogrupoj partoprenis kaj el Launceston alflugis "nia" Tasmania Parlamentano Mac Le Fevre.

Jam vendredon vespere kolektiĝis 18 personoj en la salono de la "Lodge", kiam Brig. Isabel Gale gvidis ludojn kaj instigis al komuna kantado.

S-ino Fay Koppel okupis 3 sesiojn per pritrakto de gramatikaj malfacilaĵoj en Esperanto. F-ino Ann Hearn legis interesan novelon pri la deveno kaj historio de la kristnaska kanto "Sankta Nokto". Pluraj ĉeestantoj partoprenis en la sesio "Mallongaj Prelegoj", dum la Oakleigh-Crupo prezentis amuzajn skeĉojn.

Sabatvespere John Coogans, kiu lastatempe emigris Aŭstralion el Skotlando, rakontis pri la Esperanto-movado en tiu lando. Sekvis filmo pri la Adelajda E-Kongreso, prezentita de S-ro S. Kan-aĉki kaj lumbildoj prezentitaj de kelkaj ĉeestantoj.

D'manĉmatene Brig. Isabel Gale gvidis Di-Servon. Posttagmeze lokaj membroj, Ges-roj Ruth kaj Gerald Tuman, gvidis vizitantojn tra la bela ĉirkaŭaĵo de Healesville. Ĉefa ero de la posttagmeza adiaŭna kunveno estis prelego de S-ro Mac Le Fevre, pri la proponita akvobarilo de la Franklin-rivero.

La manĝoj kaj loĝado estis bonaj por la modera prezo de \$18 tage. Entute, do, sukcesa semajnfino. Post la seminario aperis en la loka gazeto "Mountain Views" sufiĉe longa kaj favora raporto.

pri reformoj (IDO) kaj la internacian organizadon ĝis 1922. Aliaj ĉapitroj registras rilatojn kun la Ligo de Nacioj kaj kun la socialisma movado (SAT). La finaj ĉapitroj en tiu parto estas "internaj Konfliktoj kaj la Kresko de Naciismo, 1923-47, kaj "La Postmilita Politiko de Prestiĝo". La kontribuo de Ivo Lapenna, lia eloficiĝo kaj la posta "neŭtralia" movado estas analizitaj. Do ĝi estas ĝisdata.

La dua parto, sociologia studo pri la Brita Esperanto-Asocio, estas interesa kvankam iomete tro detala por ne-specialistoj.

Estas kelkaj aldonitaj tabeloj, inkluzive la 16 regulojn kaj tabelon de korelativ-oj.

La libro estos utila por angleparolantaj Esperantistoj. Ĝi ne estos tre utila por konvinki ne-Esperantistojn subteni la lingvon, ĉar ĝi studas nian movadon "kune kun ĉiuj verukoj". Sed ĝi estas honesta kaj objektiva kaj ni nepre devas rigardi nian movadon sen iluzioj. Almenaŭ unu universitato traktas Esperanton serioze. Peter Foster estas gratulinda!  
—Ralph Harry.

## LA "A.E."

### SUBTEN — FONDUSO

Antaŭe raportita	\$377
S-ino E. Oliver, Orelia, Okc. A.	10
S-ro I. Toth, Melbourne	10
Ges-roj R. Ross, Brisbane	10
F-ino H. Mueller, Sydney	10
"Anonima"	10
S-ro E. Bantik, Hobart	10
S-ro J. N. Prewett, Echuca, Vik.	5
Esperanto-Federacio de Kvinlando	
—Memore al S-ino Hilda Banham	20
S-ro J. Harwood, Sydney	10
S-ro A. Gleeson, Cape Woolamai, Vik.	2
S-ro D. McQueen, Warragul, Vik.	10
S-ino W. Greenhalgh, Brisbane	10
S-ino C. Rockcliff, Perth	5
S-ro E. Loorits, Hobart	25
S-ro V. Kosef, Cobar, NSK	10
S-ro E. Errey, Geelong, Vik.	10
S-ino K. Schwerin, Sydney	4
S-ro K. Smith, Sydney	5
	<hr/>
	\$553

**La Fritz Mueller-Soraŭ Muzika Trofeo:** Donacintoj ĝis la fino de septembro. laŭalfabete: S-ino E. Graham \$10, S-ino G. Kirkwood \$10, F-ino H. Mueller \$50. S-ino M. Robertson \$10, Prof-o R. Robertson \$10, S-ino O. Russell \$10 S-ro V. J. Timmins \$10. Entute \$110..

## RECENZOJ

### ★ THE ESPERANTO MOVEMENT.

de Peter G. Foster. Mouton (Contributions to the Sociology of Language 32), The Hague, Paris, New York. 400 paĝoj. Petu prezon ĉe la Libroservo.

Fine ni havas en la angla lingvo studon pri la karaktero kaj historio de la internacia lingvo.

"The Esperanto Movement" estas revizio de tezo "A Sociological Study of the Esperanto Movement" kiun akceptis la Universitato de Hull (Anglio) por diplomo de Doktoro de Filozofio en 1977.

La unua kaj pli granda parto (230 paĝoj) konsistas el priskribo de la lingvo kaj de la "parolkomunumo" de Esperanto. Ĝi rakontas detale la "ideologian" konflikton en Francio, la skismon

Nova eldono de "Nova Testamento" \$4.20.

Havebla ĉe A.E.A. Book Service  
P.O. Box 230, Matraville, 2036

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 19 — HERBERT MARSHALL ("MARSH") COHEN

"Faithful over Little Things".

Marsh certainly has the gift of "keeping on keeping on." He has been an Esperantist continuously and zealously for 63 years. What has he done in the movement? Nothing spectacular!

As we have pointed out several times, "Who's Who" is NOT a passing parade of "bigshots". We need leaders. We have been and are grateful to them. But much of the strength of the Esperanto movement lies in the efforts of those who never bask in the limelight — men and women whose application and attention to minor detail keep the movement moving. One such is "Marsh".

He lays no claim to being a great Esperantist. He confesses that — like so many of us — at times he uses the accusative "n" where he should not, and leaves off the accusative "n" where he should use it. At times he's a little reluctant to speak in Esperanto. However, he has done well and faithfully those things that he **can** do and has done them continuously. He offers no challenge, but is inclined to think that his 30 years' unbroken term of office is an Australian record.

Let's look at his background. His 8th grade teacher had told him about Esperanto. Just before his 17th birthday, (his 80th is now past) "Marsh" joined the Melbourne Esperanto Club. His cousin, Ray Cohen, was Secretary at the time. His joining mate was Percy Williams who became a lifelong friend and who still corresponds with him in "nia kara lingvo". In 1921 he became Treasurer of the club. During that time Walter Burley Griffin was a member as were his wife and mother-in-law. "Marsh" met many notables. Some of the names he remembers are George Gordon ("Gego"), M. Hyde, Sro. Ballard, the Godfrey sisters, Geo. Hussey and Maud Helm. In 1939 "Marsh" became Secretary-Treasurer of the club, a post he held for about 20 years until Herbert Koppel took over as Secretary, leaving our stalwart still as Treasurer.

When the "Rendezvous" was formed in 1939 or 40, "Marsh" was the Minute Secretary. Various members became President, but, having accepted his turn, "Marsh" remained President until the

club's demise in 1970. The "Rendezvous", as the name implies, was a get-together — in this case for advanced Esperantists who met on the last Friday night of each month and were pledged to observe strictly the rule "Only Esperanto Spoken Here".

The above shows the pattern of "Marsh's" Esperanto life. If and when called to office he has accepted office; for much of the time he has been prepared to serve by merely standing and waiting — or, rather, sitting and waiting. For years he was a familiar sight at the Melbourne club, sitting at his little table at the door, collecting fees, handing out leaflets, ever friendly, ever helpful.

True greatness often lies in willingness to be among the least of our servants. "Marsh" has it.

—ARTHUR COCKING

#### EL POPOLA ĈINIO

Abono ĝis 28-a de februaro, 1983

unu jaro \$3.42

du jaroj \$5.76

tri jaroj \$7.98

Interesaj artikoloj kun belegaj koloraj bildoj sur eleganta papero

Petu senpagan specimenon ĉe

K. G. LINTON

4/2 Lyons St., Glenhuntly,  
Victoria, 3163

#### HAZARDO

Malkaŝita per siaj okuloj estis la operacia asistantino Ana Leandro el Barcelono, kiu estis kromprofesie bankrabistino.

Kiam la bankkasisto Ramon Aparicio estis operaciata li sentis, ke iam jam li vidis la okulojn de la asistantino. Post vekigo el narkozo al li klarigis: la okuloj apartenis al unu el la du rabistinoj, kiuj forrabis el lia banko \$37.000 antaŭ kelkaj semajnoj.

Li tuj informis la ĉefkuraciston, kiu informis la policon, al kiu la asistantino konfesis la krimon.

Tiu surpriza solvo aktivigis la statistikistojn. Ili kalkulis, ke la ŝanco malkaŝi krimon per kuniĝo de tiaj cirkonstancoj estas 1 : 5.000.000.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 200 (280)

MELBOURNE

Oktobro, 1982

---

## PRI GEOGRAFIAJ NOMOJ

Ĉiuj lingvoj (popoloj) havas la rajton uzi kian ajn formon por geografiaj nomoj de aliaj landoj, do certe Esperanto havas la saman rajton Ni nur uzu tiun rajton kun inteligento, respekto por la koncerna popolo, kaj sento de universaleco.

La gravaj geografiaj nomoj sekvu regulojn Esperantecajn kaj unuformecajn. Ilin ni povas krei same arbitre kiel Zamenhof kreis personnomojn, kiel Johanon kaj Vilhelmon. Ni nature kreas ilin similaj al la korespondaj nomoj en aliaj lingvoj, ĉu laŭ aspekto (literumado), aŭ laŭ sono. Jen la unuecaj reguloj kiujn mi opinias necesaj por ili:

1. Geografiaj nomoj estu substantivoj, singularaj, havu majuskolon, kaj ne estu antaŭataj de la artikolo (ne "la Blanka Nilo", sed "Blanknilo", ne "la Rokaj Montoj", sed "Rokmontaro").

2. La nomo ne samu al jam ekzistanta vorto (ne "Pesto", "Rigo", "Malto", "Malo", "Togo", "Kuko", "Kvito", "Bono", "Akro", kaj "Limo", sed "Peŝto", "Rigao", "Maltio", "Malio", "Togio" (aŭ "Togoo"), "Kubao", "Kito" (aŭ "Kŭito"?), "Bonno", "Akrao", kaj "Limao", kaj prefere "Ejrlando", "Iranio" kaj "Sudanio").

3. Nomo de urbo ne samu al la nomo de la koncerna lando (do "Salvadoro" kaj "Salvadorio", "Meksiko" kaj "Meksikio" (aŭ "Mehiko" kaj "Meksiko"), "Gvatemalo" kaj "Gvatemalio").

4. Se ne kontraŭe al aliaj reguloj, ni uzu por nomoj finiĝantaj per vokalo nomojn sen tiu vokalo, do ricevantaj la o-finajon tuj post la lasta konsonanto (do ne "Ĉilio", "Haitio", "Kajroo", "Suvao", "Ĵakarta", "Panamaio", "Tongao", kaj "Koreao", sed "Ĉilo", "Haito", "Kajro", "Suvo", "Ĵakarto", "Panamio", "Tongo" kaj "Koreo"; tamen "Peruo" kaj "Kretio" (aŭ "Krito").

5. La vorto ne estu traduko de la signifo en la nacia lingvo (ne "Bonaero", "Januarivero", "Verdlando", sed "Buenosajro", "Riodejanejro", "Gronlando", kaj centoj da similaj).

6. Por la universala rekono, la aspekta simileco al la nacia aŭ internacia formo de nomo estas pli grava ol ĝia fonetika simileco (do "Sidnejo" estas preferinda al "Sidnio" aŭ "Sidneo". aŭ Sidnjo), kvankam ĉiuj eblus; same "Adelajdo", "Brisbano", "Neŭzelando", "Grenviĉo", "Lejpozigo", "Marsilio", kaj "Bombajo" anstataŭ "Edelejdo", "Briz-

bano", "Njuzilando", "Griniĉo", "Lajpcigo", "Marsejo", kaj "Bombejo"). En pluraj kazoj ioma adaptiĝo al la Esperanta prononco tamen ne malutilas, kiel "Tuluzo", "Filipino", kaj "Ĉikago".

7. Karakterizaĵo de Esperanto estas la novformado de vortoj per simpla kunmeto de jamaj vortoj. La rezultaĵo estas nova vorto kun speciala signifo (ne nur adicio de du signifoj: "vagonaro" ne estas aro de vagonoj!). La uzado de streketo (= dividstreko) inter la du aŭ tri elementoj estas kontraŭ la Esperanta spirito kaj naŭza neologismo. Tio samas pri geografiaj nomoj: do ne "Okcident-Aŭstralio" sed "Okcidentaŭstralio". Oni ne uzu du apartajn nomojn por unu memstara geografiaĵo: "Suda Aŭstralio" estas la suda parto de Aŭstralio, enhavanta Melburnon kaj Tasmanion; "Sudaŭstralio" estas la ŝtato. En kelkaj landoj, speciale en Aŭstralio, la aŭtoritatoj en la komenco kreis, pro manko de imago, malbele longajn nomojn kiajn "Nova Suda Kimrujo" kaj "Okcidenta Aŭstralio". Same kiel Zamenhof evitis en Esperanto tiajn burokratajn nomojn an'ante ekz. "la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko" en "Usono", ni rajtas, se ni volas, uzi la nomojn "Vestralio", "Nortralio", "Sotralio" kaj "Nosoujo" (neniu persono pensas pri eneŭropa

"Galio" kiam ĝi parolas pri "Nosoujo, do parolante pri tiu ŝtato estas same senseca pensigi nin pri "Nova" aŭ "Suda"). Se temas pri nomo kies unu parton oni preferas neŝanĝita, estu pli bona lasi la tuton nacilingva, kiel MacDonnell Ranges anstataŭ "MacDonnell-montaro".

Sekvi tuj la de mi donitajn regulojn ne eblas en pluraj kazoj, unue ĉar kelkaj nomoj jam kreas de Zamenhof aliformaj, due ĉar la proponoj de koncernaj popoloj ofte ne jam aŭdiĝis, kaj trie ĉar la kreado de kaj la unuanimeco pri geografiaj nomoj estas grandega laboro, ja konsistanta en kreado de nova aldono al nia vortaro. Ne estas mia celo aŭ kapablo doni kompletan liston (cetero jam parte proponitan) de la gravaj geografiaj nomoj, sed mi verkis la ĉisuprajn regulojn por la uzo de la vortaristoj kaj gramatikistoj, kaj por ĉiu Esperantisto kiu ŝatas uzi Esperantajn formojn de tiuj nomoj. La menciitaj reguloj kompreneble ne koncernas la jam de Zamenhof fiksitajn nomojn de popoloj kaj la el ili per "-io" aŭ "-ujo" faritajn landnomojn kiajn Francio kaj Portugalio.

—MARCELO LEEREVELD

## POST LA UN-JARO DE LA HANDIKAPULOJ

Antaŭ unu jaro, UN startis unu el la kutimaj "Jaroj", imponaj okazoj por malkaŝi problemojn de iu kategorio, kaj por ilin klopodi solvi. Kiuj estas do la rezultoj de la "Internacia Jaro de la Handikapitoj"?

La rezulto konsistas en unu nura vorto kaj en ties sinonimoj: "**Nenio**". Dum la tuta Jaro okazis kunvenoj, debatoj, kunsidoj, televidaj programoj, artikoloj en la ĵurnaloj, publikado de libroj kaj de dokumentoj, statistikoj, enketoj, ktp: sed kion oni konkrete faris por helpi la handikapitojn? Kiel oni klopodis solvi iliajn problemojn, kiel ekzemple la altan koston de rulseĝoj kaj de aliaj rimedoj, la arkitekturajn barojn (ŝtuparojn, malgrandajn liftojn) aŭ la gravan problemon de la transportoj?

Malgraŭ, por veron diri, ie kaj tie aperis io bona aŭ — almenaŭ — en bona direkto, mi povas trankvile aserti, ke la plejparto de la homaro ne atentis tion. Kompreneble, mi povas paroli iel kompetente pri la itala situacio, ĉar mi estas italo kaj handikapito pro poliomi-

jelito; do, ĉi tie, svarmis la retoriko pri "niaj malbonsancaj fratoj", kiu estas ja klasisma kaj eĉ rasisma difino, abundis la frazoj "ni devas ion fari por ilin helpi", sed la konkretaj iniciatoj (multaj, verdire) fontis el privataj kaj ne publikaj instancoj; oni atingis la pinton de absurdeco k' am oni fiksas je 2% la imposton por rulseĝoj ks, kiu ĝis la antaŭa jaro estis . . . nenio. Tamen, ie kaj tie tra tiu ĉi densa mallumo aperas fajreroj de espero: pluraj privataj entreprenoj, inter kiuj la mondfama FIAT, prezentis dum la jaro helpilojn por la handikapitoj; ekz. aŭtobusojn por rulseĝuloj, eĉ vagonojn kun apartaj kupeoj por faciligi la vojaĝon al krip-luloj, diversajn rimedojn por tetraplegiuloj, ktp.

En mia urbo, Bologna, oni ekkonstruis, pere de la monrimedoj akiritaj de katolika porhandikapula organizo, vilaĝon sen arkitekturaj baroj, tre proksime al la urbocentro, kiel renkontejon por handikapitoj — atentu bone, renkontejon. Ne getton — kun pluraj servoj aparte studitaj por ili.

Tamen, ĉio tio estas "blankaj muŝoj", do rarajoj, tra la ĝenerala retoriko, babilado, "elverŝo de fritita aero" (itala proverbo por indiki ion senvaloran), kiu konkludis nenion kaj eĉ donis esperojn al homoj, kiuj ĉion bezonas, esperojn kiujn oni senluziigis per decidoj absurdaj, kiel la supremenciita imposto; aŭ kiel la alia decido pagi al la handikapitoj mem la rimedojn (rulseĝojn, ortopediajn ŝuojn, lambastonojn, ktp.); jes ja, oni plialtigis la penson por la malsanuloj, sed tio estis gutto en la granda maro de inflacio.

Mi, kiel facile diveneblas, estas pesimisto: sed mi ne plu kredas, komparante mian kun alies spertoj en aliaj landoj, en la utilo de tiuj "Jaroj": ni povas nomi "rezulto" de tiu ĉi, kiel de aliaj, "Jaro" nur la fakton, ke nun multaj konas la ekziston, kaj iel la konsiston, de la problemo "Handikapiteco"; nun multaj scias, ke ion eblas fari, kaj ke ion oni devas fari. Ni, tamen, ne lasu, ke la fino de la "Jaro de la Handikapitoj" estu ankaŭ la fino de nia interesiĝo pri tiu grava afero, kiu tuŝas altegan procenton de la tutmonda loĉantaro.

—NORBERTO SALETTI, Bologna

(La aŭtoro de la supra artikolo estas ĉefredaktoro de "Koncize", revuo de TEJO Vidu ankaŭ lian artikolon en N-ro 187, aprilo-majo, 1981 de nia gazeto)

### BEZONATA — BIOLOGIA NOMENKLATURO POR AŬSTRALIO

Kiam la unuaj eŭropanoj venis por loĉi en Aŭstralio, ili vidis ĉion tra eŭropaj okuloj. Ekzemple, nigra kaj blanka birdo estis "Magpie" (Pigo), kvankam ĉi ne similas al la pigo de Eŭropo. Estas en Eŭropo, unu specio de "Wren" (Troglodito). Ne malpli ol 110 specioj de birdoj en Aŭstralio portas la nomon "Wren". Plejparte ili similas al la Troglodito nur pro tio, ke ili portas la voston vertikale. Komunlingve en Aŭstralio estas minimume 65 specioj de "Robin" (Rubekolo laŭ P.I.V., Rubegorĉulo laŭ "Komunlingva Nomaro de Eŭropanoj Birdoj"), 65 specioj de "Warbler" (Silvio), 59 specioj de "Tit" (Paruo), 58 specioj de "Thrush" (Turdo), 52 specioj de "Shrike" (Lanio) kaj multaj aliaj misnomitaj birdoj. Plejparte, tiuj

birdoj ne parencas — eĉ ne similas, al la eŭropaj birdoj kies nomojn ili portas.

Mi estas vidinta, en tradukitaj verkoj, ekzemple, la nomon "Konuro" por niaj papagetoj. "Konurenoj" estas subfamilio de etaj papagoj en Suda Ameriko. Tiuj nur supra e similas al niaj "Lorikitoj" (sub-familio ("Lorenoj")). Mi estas vidinta "Monta Frakseno" por "Mountain Ash". Eucalyptus regnans, nia "Mountain Ash" estas unu el la plej altaj arboj en la mondo kaj ne similas al la eŭropa "Frakseno", eĉ supraje. Estas cetera alia "Mountain Ash" (Panax sambucifolius) kies sola simileco al Frakseno estas la formo de la folioj. Tiaj misnomoj estas multegaj. Ni ne kulpigu niajn antaŭulojn. Kiel mi diris, ili vidis ĉion tra eŭropaj okuloj. Tamen, estas bezonata "Biologia Nomenklaturaro por Aŭstralio".

Jam preparita kaj en la mano de presisto, estas manuskripto de "Komunlingva nomaro de Aŭstraliaj Birdoj", far la Nomenklatura Komitato de la Aŭstralia Sekcio de Ornitologia Rondo Esperantlingva. Por tio ni devis elekti el iom pli ol tri mil popularaj nomoj por 731 birdoj. Tiu tasko estis granda. Felice mi estas emerita, kaj povis dediĉi al la tasko multe da tempo.

Multe pli da dediĉita laboro estos postulata por botanika nomenklaturaro. Pli ol ok mil florientaj plantoj troviĝas en Aŭstralio. Cetera estas la mamuloj. Nur 320 el tiuj ekzistas en Aŭstralio, kompare simpla tasko! Krome estas moluskoj, kaj dudek kvin aliaj klasoj de vivantaj estaĵoj, inkluzive — (Ho diable!) — pli ol 35000 speciojn de aŭstraliaj insektoj (!!) Kredeble, inter niaj emerituloj estas tiuj kiuj kapablas komenci la taskon.

Biologia Nomenklaturaro por Aŭstralio estas vere bezonata, eble ne urĝe. Tamen, ne estas tro frue por komenci la taskojn. Tiuj, kiuj posedas la scipovon, kaj povos dediĉi la tempon, bonvolu pripensi la aferon.

—Wre CHANDLER.

Doktoro dum hejma vizito: Sinjorino, ne donu al via edzo fortan kafon.

Tio stimulas lin, kaj sekve li nervozigas.

Edziĝo: Sed se vi vidus lin, kiel nervoza li iĉas, kiam mi prezentas al li malfortan kafon! ('Hungara Vivo').

## Esperanto en Ĉinio

Ĉinaj partoprenantoj en la Kongreso en Antverpeno raportis pri lernado en tiu lando far miloj da instruistoj kaj studentoj. La Prezidanto de AEA, tial kaj pro aliaj motivoj, varme subtenis planojn por la okazigo de Universala Kongreso en Ĉinio. Reciproke la Sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redaktoro de "El Popola Ĉinio" esprimis fortan intereson pri ebla U.K. en Brizbano en 1988.

Du karavanoj de Esperantistoj — unu organizita en Usono la alia en Eŭropo — vizitis Ĉinion en la norda somero de 1982. La 20-an de aŭgusto Gesinjoroj Einihovici el Okcidenta Aŭstralio, membroj de karavano de 21 personoj, raportis bildkarte de sur la Granda Murego. Ili trovis la ĉinajn samideanojn tre ĉarmaj kaj laboremaj. La antaŭan tagon Esperanto-Klubo akceptis ilin en solena maniero kaj regaligis ilin per belegaj libroj kaj donacoj. Ili diris, ke la etoso estas "laŭ la deziro de Zamenhof", kaj ke tiu eksterordinara lando devas esti modelo por la mondo. La vojpiano estis plenstopita. La ĉinoj diris, ke tiu grupo estas la unua vere esperanta, kiu vizitis la popolrespublikon.

La entuziasmo en Ĉinio pri Esperanto estas atestata, eĉ se per bedaŭrinda afero, en raporto kiu aperis, la 7-an de septembro, en la "South China Morning Post" en Honkongo:

### Esperanto per Poŝto—Fraŭdo Rivelita

Pekino, Sept 6  
Bando de krimuloj estas arestita en suda Ĉinio ĉar ili fraŭdis dekmilojn da dolaroj el studentoj dezirantaj lerni Esperanton — la artefaritan "mondlingvon" — oni raportis hodiaŭ en Pekino.

La fraŭdistoj, kies ĉefo estis iu Qian Hongcen, starigis falsan korespondadan lernejon por Esperanto-edukado, helpataj de kadroj el la urbo Guiyang, la provinca radia de Guzhou diris. Pinjin metodo de literumado uzata.

Ili enpoŝigis la instru-honorariojn sen sendi instrumaterialojn al la studentoj — AFP.

### 73-a Universala Kongreso de Esperanto

Nia prezidanto ricevis la sekvantan mesaĝon de la Prezidanto de UEA: "Ni traktas la inviton por Universala Kongreso en Aŭstralio en la kadro de la ekstereŭropigo de nia movado. Gregoire Maertens."

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto

Bun'ichi Iŝizaki)

La plej forta japana regiona organizaĵo estas KLEG (Kansai Ligo de E-grupoj), kiu festis sian 30-an jubilean kongreson en Takatuki, Osaka. Aliĝis 363 personoj. Pli ol dek grupoj el la osaka-kiota regiono prezentis dum la kultura vespero per diapozitivaj sian agadon; pluraj aliaj grupoj kantis aŭ prezentis skeĉojn.

S-ro Ulrich Lins, germana esperantisto, kiu nuntempe loĝas en Japanio, rakontis kion germanoj diskutas pri Japanio. S-ro K. Ito, kompilanto de la plena verkaro de D-ro Zamenhof, rakontis pri sia renkontiĝo kun Esperanto. Okazis deklamado de opero "Vespera Gruo", kiu estis tradukita de MIYAMOTO Masao memore al la Kongreso.

La 31-a kongreso de Tokai (Nagoya regiono) okazis en Toyota apud Nagoya. Kvindek unu partoprenis. Argentina esperantisto Bondone Jorge prelegis pri sia hejmlando kaj H. Kitagawa rakontis pri sia laboro en la UEA-oficejo en Rotterdam.

Mortis en Tokio D-ro Hidemiti OKA, aŭtoritata zoologo, kiu estis direktoro de la Japana Esperanto-Instituto de 1943 ĝis 1973. Lia patro, D-ro Asaziro OKA, estis la unua japano, kiu eklernis Esperanton en 1892 kiam li studis en Freiberg, Germanio.

D-ro H. OKA estis profesoro pri zoologio 1939-1966. Dum tiu tempo li estis ankaŭ prezidanto de la Japana Zoologia Asocio. Kiam okazis la 50-a Universala E-Kongreso en Tokio (1965), D-ro OKA estis la Rektoro de la Internacia Somera Universitato. Li verkis plurajn fakajn tezojn en Esperanto kaj instigis universitatajn studentojn praktike uzi Esperanton por akademia studo.

### Nov-Zelanda Kongreso

La 48-a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en la urbo Masterton (Norda Insulo) de la 5-a ĝis la 9-a januaro, 1983.

Masterton havas treege aktivan E-societon, kiu jam aranĝis la 38-an kongreson en 1973 kaj la 44-an en 1979. Pluraj grupoj de tiu klubo partoprenis en 1976 la Pacifikan Kongreson en Melburno.

La kongreso okazos en la Kolegio "St. Matthew's", situata en bela tereno.



nur 10 minutojn for de la urbcentro. Aŭstralianoj ne pagos kongres-kotizon.

Por pli da detaloj kontaktu la Konstantan Kongresan Sekretarion, F. E. Wood, 24 Stewart Road, Mt. Albert, Auckland 3, N.Z.

### Lingvo-Politiko por Aŭstralio

Kiam la Konstanta Komitato de la Senato pri Edukado kaj la Belartoj invitis proponojn pri lingvo-politiko por Aŭstralio (Australian Esperantist Junio, 1982) AEA estis preta.

La Estraro provizis ampleksan dosieron pri la lingvo-problemo, la meritoj kaj rolo de Esperanto kaj komentoj pri la specifaj eroj en la mandato de la komitato.

Profesoro Humphrey Tonkin, eks-prezidanto de UEA, kiu atestis al simila usona komitato, kaj verkis libron pri la temo, sendis la jenan komenton: "La dokumento estas tute interesa kaj impona". Li poste sendis detalan komenton, kiu helpas en la preparado por buŝa atestado. La Estraro bonvenigus ideojn, kaj ŝatus ricevi kopiojn de leteroj skribitaj al aŭ ricevitaj el senatanoj.

### Lingvo-Politiko por Sud-Aŭstralio

En septembro la koncerna komitato de la parlamento de Sud-Aŭstralio decidis enketi pri la instruado de lingvoj en la lernejoj de tiu federacia ŝtato.

Je la peto de la Sudaŭstralia Esperanto-Societo la Estraro preparis dosieron.



● **PERTO:** Je 8-a de septembro S-ino R. McGrath parolis pri sia vojaĝo al Suda Aŭstralio kaj S-ro O. Loneragan pri kunveno de la U.N. Organizo en Tasmanio, en kiu li partoprenis.

La Rotaria klubo de Gosnells invitis nian prezidanton (Jack Hawks) kaj nian sekretarion (Chris Dean) por fari prelegon pri Esperanto. Tridek Rotarianoj ĉeestis kaj multaj el ili memoris Ralph Harry, kiu prelegis ĉe Rotaria Kongreso en Albany pasintan marton.

Je dimanĉo, 19-a de septembro, membroj partoprenis en tre sukcesa pikniko ĉe "Wireless Hill". La vetero estis bona

kaj anoj povis admiri amason da sovaĝaj floroj sub la lerta gvidado de Gerroj McGrath.

● **ADELAJDO:** La Sud-Aŭstralia E-Societo festos la naskiĝtagon de D-ro L. L. Zamenhof, je sabato, la 18-a de dec., 1982 kaj interŝtataj vizitantoj estos bonvenaj en la kunveno de la "Uniting Church", ĉe angulo de Main North Road kaj Park Street, Sefton Park, je la 6.30 a posttagmeze.

● **MELBURNO:** Je 30-a de aŭgusto S-ro Ken Linton montris diapozitivajn kaj prelegis pri vizito al Havajo, la strando "Waikiki" kaj la haveno "Pearl". Semajnon poste S-ro Jan Makowski plue prelegis pri la lingvoj kaj programado de komputeroj.

Je 13-a de sept. H. Koppel prelegis pri la ĉi-jara SAT-Kongreso en Finnlando kaj la Universala Kongreso en Antverpeno. La Prezidanto (S-ro S. Kanacki) ĵus revenis de vojaĝo al Fiĝio kaj je 20/9 li rakontis pri sia flugvojaĝo al tiu ekzotika insulo.

● **KANBERO:** Gratulon al Ted Gaider, kiu sendis bonegan "Leteron al la Redaktoro" de 'Canberra Times': "Advantages of Esperanto over 'Eurolish'". (Avantaĝoj de Esperanto super 'Eurolish'). Tiu letero aperis je 16-a de septembro kaj la trafaj argumentoj estis bona reklamo por Esperanto.

La ĉi-jara Zamenhof-Festo okazos je la 13-a de decembro. Vizitantoj al Kanbero estas invitatataj veni je la 7.30-a vespere al la salonoj de la "Instituto de Internaciaj Aferoj" (la iama 'Hotel Canberra') en Commonwealth Avenue, inter la 'Albert Hall' kaj la Altkomisiitejo de Britio.

● **SIDNEJO:** Mankas raporto.

● **MANLY:** La 14-an de septembro la tria trimestro komenciĝis en la "Eduka Centro" (antaŭe nomita "La Vespera Lernejo").

La 8-an de oktobro okazis aferkunveno, kie oni decidis, ke \$100 estu elpezitaj por enmeti mallongajn reklamojn pri la kursoj en la lokan ĵurnalon. La Post-Kongreso en Manly en 1984 estis diskutita. La 16-an de oktobro en la hejmo de Be's kaj Les Scott, Les montris belajn lumbildojn kun interesa komentario pri la Universala Kongreso en Antverpeno kaj pri diversaj vidindaĵoj.

Du sufiĉe grandaj artikoloj aperis en la loka ĵurnalo; la unua pri la spertoj

de Bess kaj Les en Belgio, Nederlando, Francio kaj Usono, kaj la alia pri la vizito de Betty Cleminson al la ĉiujara kunveno de blindaj esperantistoj en Nederlando.

Bonvena vizitanto al niaj kunvenoj estas Simon de Korte el Nederlando.

—EUNICE GRAHAM.

La 24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazos en "Bruce Hall", de la "Aŭstralia Nacia Universitato" de la 7-a ĝis la 14-a de januaro, 1984. Kongresanoj loĝos en unu-litaj ĉambroj, kun ĉiu komforto. Geedzaj paroj povos loĝi en du-litaj ĉambroj, se ili deziras. En la nuna tempo ne eblas fiksi la prezojn, sed oni povus atendi, ke la nunaj prezoj, \$27 tage por unu-lita ĉambro kaj \$40 tage por du-lita ĉambro plialtiĝos pro inflacio.—MARJ ELLYARD

### LA "A.E."

#### SUBTEN — FONDUSO

1982/1983

Antaŭe raportita	\$553
S-ino G. Stanway	2
S-ino P. K. Connolly	10

\$565

#### KIU SEKVAS ?

### JIM KAJ JENNIFER DIMO REVENOS AL AŬSTRALIO

Jam trifoje ni raportis pri la prelegvojaĝo de Jim kaj Jennifer Dimo el Rochester, Viktorio. Ili forlasis Aŭstralion en marto de la pasinta jaro kaj per propra aŭtomobilo traveturis deklodon da landoj en Eŭropo. Ilia prelegvojaĝo estis tiel sukcesa, ke ESPERANTO, la organo de UEA, en sia eldono de junio, 1982 diris: "se ekzistus konkurso por la movada prelegvojaĝanto de la jaro, la plej serioza kandidato por 1981/82 estus la aŭstralia geedza paro, Jim kaj Jennifer Dimo".

Laŭ raporto ricevita de Jim Dimo, li havis lastatempe kelkajn gravajn sukcesojn. Inter ili eble menciindas, ke Bologna TV-stacio unue lasis lin paroli dum du minutoj, sed poste, en marto ĉi-jare, la stacio lasis lin paroli dum 40 minutoj. En majo Ges-roj Dimo parolis en Pariza radio, en Ĝenovo ili prelegis en la Universitato. En Rimini 750 gestudentoj de porinstruista kolegio tiom interesiĝis, ke demand-periodo daŭris 3

horojn. En Palermo, post apero de artikolo en tag-jurnalo, 50 novaj lernantoj aliĝis al Esperanto-kurso.

Ges-roj Dimo revenos al Aŭstralio meze de decembro kaj post ripozo en Rochester ili ekveturos en februaro, 1983, per propra dormveturilo, por viziti Novan Sud-Kimrujon kaj Kvinlandon.

Esperantistoj aŭ Esperanto-Societoj, kiuj deziras aranĝi prelegojn de Ges-roj Dimo povos kontakti ilin en decembro, 1982, kaj januaro, 1983, ĉe la sekvanta adreso: **Jim Dimo, c/o Jenkins, 21 Dawson Street, Rochester, Vic., 3561.**

## RECENZOJ

●NUDPIEDA GEN. Nakazawa Keizi, trad. Izumi Yukio, Rondo Gen, Tokio, 1982. 284 paĝoj. 27 gld. ĉe UEA & 10% por sendo.

En la kelkaj pasintaj jaroj aperis en Esperanto pluraj libroj da bildstrioj. Niaj aĝe kaj kore junuloj povas ĝui la aventurojn de Asteriks la gaŭlo kaj de Tinĉjo la juna detektivo. Estas ankaŭ ofte strioj en **Monato**.

Nun venis bildromano el Japanio, verko de la konata artisto Nakazawa Keizi. Ĝia temo estas la vivo en Japanio dum la Dua Mondmilito kaj la katastrofo de la unuaj atombomboj. Ĝi estas tute ne amuza, sed eduka, tute ne gaja, sed ege realisma. La bildoj estas bone desegnitaj laŭ japana tradicio. La Esperanto estas flua kaj neformala. Kelkfoje la "ŝercoj" estas iomete krudaj eĉ ŝokaj al kelkaj okuloj, sed la milito estas ĉiam ŝoka kaj la soldatoj de ĉiuj landoj estas kutime krudaj ne nur parole sed age.

La aŭtoro diris al "Rondo Gen", kies membroj vizitis lin, ke "Gen" ne estas sole komikso (!) pri atombombitoj. Li deziris priskribi — kaj pridesejni — kiel la popolo estas mensoge kondukita en la militan furoron, devigita "kunlabori" por la militoj; kaj kiaj tamen devas esti la homaj rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj, edzo kaj edzino, en plej malfacilaj tagoj.

Ĉu li sukcesis, juĉu la legonto. Sed almenaŭ denove, per Esperanto, ni povas konatiĝi kun la pensmaniero de niaj japanaj najbaroj.

—RALPH HARRY.

“Vivo de Gandhi” en la Angla

Neesperantistoj ofte ne scias, ke multaj libroj originale verkitaĵoj en Esperanto estas poste tradukitaĵoj en naciajn lingvojn.

La Departemento pri Eksterlandaj Aferoj surpriziĝis, antaŭ kelkaj jaroj, konstatinte, ke grava verkaĵo en sia biblioteko pri Nepalo estas traduko de “Nepalo Malfermas la Pordojn”, verkita en Esperanto de Tibor Sekelj, de Jugoslavio.

En la pasinta jaro aperis traduko de “Metropoliteno”, klasika romano en Esperanto pri laborantoj en la Moskva kaj berlina subteraj fervojoj.

En Aŭstralio ankaŭ aperis, en majo de la nuna jaro, tia traduko — “The Life of Gandhi”, verko de Edmond Privat (“Vivo de Gandhi”), tradukita de Dorothy Threlfall. Artlook Books, 126 p. \$6.95.

Ĉiu membro de AEA bezonas sian propran ekzempleron, por legi pri la vivo de la granda hinda idealisto kaj ŝtatiso, kaj ankaŭ por povi montri al amikoj kaj skeptikuloj la fakton, ke oni verkas originale en Esperanto librojn tradukendajn en aliajn lingvojn. Ankaŭ ni devas subteni niajn kunmembrojn kiuj riskas sian kapitalon, eldonante librojn. —R.L.H.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

20 — ROSS GORDON ROBBINS, B.Sc., M.Sc., Ph.D.

The Magic Academic

We have other magicians in the Esperanto movement: we have several academics of distinction; yet, as far as I know, Ross is our only Esperantist who is both.

There is magic in his patter which he has adapted to the usages of Esperanto; there is magic in his simple yet learned discourse: but to me the greatest magic lies in the fact that he attained Professorial rank after only one year in secondary school. Not that a magic carpet wafted him to the heights — it was done by “toiling upwards in the night”.

Ross's introduction to Esperanto was in Wanganui, N.Z. His half of the French class were taught Esperanto for the first term. He has been using it ever since, for, soon after leaving school, he joined the local Esperanto Club. He felt that “he who learns a second tongue gains a second soul”, so languages have always fascinated him. He wanted to **speak**, not just know, as a slave to the printed word. He was fascinated by the idealism of Esperanto, hence he founded a club magazine — “Nia kara lingvo”.

Transferred to New Plymouth to start an apprenticeship in horticulture (his first love) he found himself isolated temporarily, for it had no club.

Soon after, he was called up and was transferred again — this time to the N.Z.E.F. camp near the Pyramids. Thus began a series of contacts with Esperantists from diverse lands with diverse

backgrounds — with Egyptians (Tadros Megalli and Nassif Isaac still active Esperantists). English, Greeks, Czechs, Canadians, Poles, Maltese, Palestinians and Indians, and, of course New Zealanders.

There were 30 members in the Esperanto Club formed after Ross's notice in a Service newspaper. Moved to Alex, andria-, he sowed the seed of another club — a club which included several Greek girls and blossomed in due course into the first Egyptian Congress in Cairo. On leave in Palestine, too, he made many Esperanto friends and, in 1943, attended the Esperanto Congress in Jerusalem.

Moved again to the Italian front, Ross met local Esperantists including the famous Minnaja family in Rome, and in Trieste, Captain Len Newell from the British Conciliation Commission. There would have been more contacts at this Italian-Yugoslav border city, which the Germans had just left. But Ross's enquiries about local Esperantists there were met with suspicious silence. Later he found out why! In the disputed city many people had just disappeared, their bodies being found later in a ravine.

On returning home, Ross found it hard to settle down to his old job at the nursery. He entered the University in Auckland and in due course gained his B.Sc. capping it with the M.Sc. a year later.

Accepting the post of Junior Lecturer in Botany in Kingston, Jamaica, he stayed away for 3 years. With the help of a young English lecturer, he started a small Esperanto class. As far as he knows, there were no permanent results: alas, many promising students melt away like the snows of yesteryear.

In 1953, back at the University in Wellington, he again became involved in the local scene and became Vice-President of the NZ Esperanto Association. In 1957, now a Ph.D. (thesis on rain forests) he accepted a post as ecologist with the New Guinea Survey Team of C.S.I.R.O. based in Canberra, but involving exciting 3 month stays in New Guinea. Then Ross took up a 5-year Senior Fellowship in Bio-Geography at the Australian National University, a post which offered him travel to New Caledonia, Fiji, Malaya, Thailand, Indonesia and the Philippines. Meanwhile, he was an active member of the Canberra Club and — for 2 years — President of A.E.A.

After an interim as first Curator of the Canberra Botanic Gardens, he moved to Port Moresby where he was Sen. Lecturer in Botany for 3 years.

The work load for students here (and later in Kenya) was so heavy that Ross didn't have the heart to promote Esperanto. Declining a further contract, he returned to Canberra. A respite from the academic world included a season of grape picking down Mildura way.

Back to academia, Ross found himself in Kenya, East Africa, where he became Associate Professor at the University of Nairobi, lecturing in agriculture, ecology, range management and botany. Six happy years, made even happier by the fact that almost every weekend our "prestigious" professor was in great demand as Magic Man for children's parties.

After Kenya, Ross visited South America, where he called on Trevor Steele at "Bona Espero" in Brazil. He almost settled in Cochabamba 8000 ft. up in the Bolivian Andes, but returned to Canberra via Chile, Easter Island, Tahiti, and New Zealand.

Where is the wanderer now? Comfortably settled on his 26-acre, dried fruit (sultana) vineyard at Red Cliffs, down Mildura way. Here he turns theory into practice, harvesting pleasure and profit.

—ARTHUR COCKING.

### SHIRLEY GRADUSSOV

Kiu konas la adreson de tiu okcident-aŭstralia esperantistino? Ŝia adreso en la A.E.A.-Adresaro estas aŭ malgusta aŭ ne komplete, ĉar ĉiujn ekzemplerojn de nia gazeto la poŝto resendis. (Malgusta adreso: Coolbellup, 6183).

Sendu ŝian nunan adreson tuj al S-ro Jack Fallu, 10 Somerset Ave., Oakleigh South, 3167, kaj al "Esperanto", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

### BONA INFORMO

La 1983-a abonvarba kampanjo de "EL POPOLA ĈINIO" jam komenciĝis.

Ekde nov. 1982 ĝis 28-a de feb. 1983 vi povos profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesos varbi 4 abonantojn vi ricevos "Libro-kuponon" kiel donacon. La kupono valoras US \$5.00

**Abontarifo:** 1 jaro \$5.70, rabatita prezo \$4.56; 2 jaroj \$9.60, rabatita prezo \$7.68; 3 jaroj \$13.30, rabatita prezo \$10.64.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic., 3164.

LA PREZOJ, KIUJ APERIS EN LA LASTA NUMERO DE "A.E." ESTAS ERARAJ.

### A.E.A. SOMERLERNEJO

De la 2-a ĝis la 11-a de januaro, 1983, Duval Conference Centre, Armidale. Por detaloj skribu al Ray Ross, 41 Agnes St., Sunnysbank, 4109.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T. 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 201 (281)

MELBOURNE

Novembro, 1982

---

## LA HISTORIO DE "WALTZING MATILDA"

Aŭstralianoj multe argumentas inter si pri la originala formo kaj muziko de la konata kanto "Waltzing Matilda". (Valsi Matilda) Jen estas resumo de la historio, kiel donita en la libro "Waltzing Matilda" fare de Pro Hart; verko en kiu la historian fondon skizas Graham Jenkin.

La sceno estas Dagworth Station (Brutbieno) apud Winton en Kvinslando, frue en la jaro 1895. Estis periodo de financa malfacilo, kiam vaguloj kaj "sunsubuloj" multnombris en la Aŭstralia veprejo. Tiuj, sunsubuloj, estis senlaboremaj vaguloj, tiel nomitaj ĉar ili alvenis al biendomoj je sunsubiro, kiam estis jam tro malfrue por labori interŝange por vespermanĝo.

La esprimo "Waltzing Matilda", jam estis uzata en tiu parto de Aŭstralio, kaj eble ankaŭ en aliaj regionoj. Ĝi devenis de la multaj Germanoj kiuj migris al Aŭstralio en la jardeko 1830-40, al kiuj la esprimo "waltzen" estis germana slango por "vagadi". Matilde estis kromnomo por ina kamarado, kaj precipe aludis al virinoj de dubinda karaktero, kiuj vizitadis la soldatajn tendarojn. Soldatoj uzis la nomon por signifi la volvitajn paltojn, kiujn ili

devas porti; kaj metiistoj ankaŭ aludis al siaj ŝakoj de iloj per la nomo Matilde. Ne mirige estas, ke, kiam tiuj Germanaj enmigrintoj vidis la Aŭstraliajn ŝaftondistojn kaj vagulojn piedirantaj kun siaj volvaĵoj surdorse, ili diris, ke tiuj estis "waltzen" kun siaj Matildaj.

La estiĝo de la kanto koncernas la familion Macpherson, kaj **Banjo Pater-son**, kiu tiam estis skribisto por "The Bulletin". Ewan Macpherson aĉetis la brutbienon "Dagworth" kaj ĝin okupis kun siaj filoj, dum liaj edzino kaj filinoj restis en Melburno. Dum Aprilo, 1894, du el la filinoj ĉeestis la ĉiujaran vetkuradon ĉe Warrnambool, kie la lokaj muzikistaro ludis viglan pecon, "Craig-lee March". Tiu tiel impresis al Kristina Macpherson, ke ŝi parkeris ĝin, kaj ofte ĝin ludis per aŭtoharpo, muzikilo simila al citro.

Baldaŭ poste, la patrino mortis, kaj la tuta familio sin establis ĉe Dagworth. Estis periodo de malprospero. La valoro de farm-produktaĵoj falis; la vendado de lano malmulte profitis; bankoj malsukcesis kaj devis fermi siajn pordojn; bienestroj ne povis dungi laborantojn, kaj el tiaj malfaciloj ŝprucis tiu sento de kamaradeco, kiu ankoraŭ estas parto

de la Aŭstralia vivmaniero. Tiam okazis, ke laborantoj multe translokiĝis, moviĝante de bieno al bieno, serĉante laboron. Saftondisto fariĝas nur vagulo kiam li piediras trans la kamparo por serĉi manĝaĵojn kaj laboron.

Estas tradicie, en la vasta interno de Aŭstralio, provizi al vaguloj manĝaĵojn rekompense por laboro. La sunsubuloj, tamen, ruze evitis laboron, kaj tial ofte mankis al ili la kutima gastama bonvenigo de la bienanoj. Vagulo, al kiu oni rifuzis manĝaĵojn, ofte buĉus ŝafon, lasante la restaĵojn en facile vidota loko, nur pro spito kontraŭ la bienestro. Same defie ili volonte bruligis farmtenejojn kaj fojnstakojn.

Guste tiel okazis ĉe Dagworth, kaj tri rajdpolicanojn oni devis alvoki. Nelonge antaŭe, vagulo estis trovita, droninta en apuda bilabongo (akvofluejo). Baldaŭ poste, kiam ankoraŭ ĉirkaŭflugis tiuj novaĵoj kaj onidiroj, Paterson feris ĉe najbara bieno. Komprenoble, li surpaperigis la aferon, kaj, aŭdinte la muzikon, kiun Kristina ankoraŭ ludis, li ritme akordigis la vortojn al la iomete ŝanĝita, sed tamen ankoraŭ rekonebla "Craigielee March".

Nun, la komploto pli densiĝas! La kanto ĉirkaŭflugis la Winton-an regionon tiel rapide kiel antaŭe flugis la onidiroj, kaj baldaŭ ĉiuj ĝin kantis, ĉiu laŭ sia propra orelo, ĉar mankis skribita muziko. Eĉ hodiaŭ oni povas aŭdi komenton: "Mia avo ofte fajfis "Waltzing Matilda", tamen lia melodio malsamis de la nunkonata, aŭ la Kvinlanda versio".

Tiel naskiĝis la argumento pri la ĝusta versio de nia kanto. La disputado pligrandiĝis pro tio, ke Banjo Paterson ne eldonis la kanton ĝis multe pli poste. Li, tiutempe, kolektis kanzonojn de la Aŭstralia veprejo, kaj li ne povis tiel klasi "Matildan", ĉar ĝi estis kanzono verkita por difinita melodio. Tial, li ne povis enmeti ĝin en "The Man from Snowy River, and other Verses", kiuj estis veprejaj poemoj por parolado. Same, kiam li eldonis "Old Bush Songs" en 1905, li ne povis enmeti "Matildan" ĉar ĝi estis nova kanto.

Paterson vendis la vortojn al eldonejo, "Angus kaj Robertson", en 1903. Ili, samjare, revendis al Ingliš kaj Komp., komercistoj pri teo. Tiuj ĝin uzis por antaŭ-enigi vendadon de la teo. Ĉiu rakaĵo, komerce nomita "Gamelo da Teo", surhavis la vortojn de la kanto.

Veniĝ al la te-vendistoj inundo da petoj por la muziko, kiu estis konata perorele, sed kiu ĝis tiam neniam estis skribita. La edzino de unu el la komercistoj, Marie Cowan, skribis la muzikon. Ŝi neniam pretendis, ke la melodio estis ŝia, ŝi simple skribis la notojn de la plej konata versio de tiu tempo; tamen, poste, la eldonistoj nomis ĝin "la Marie-Cowan-versio".

La alia melodio ankaŭ naskiĝis en Kvinlando, kaj ĝi nuntempe estas nomita la "Kvinlanda versio", kio aldonas al la konfuzo. La Kvinlanda versio, oni diras, devenis de veprejano, kiu havis la vortojn sur sia te-pakaĵo, sed ne konante la melodion, faris propran laŭ sia gusto. Tial, tiu versio havas pli efikan etoson de popola-kanto, ol la unua, kaj multaj opinias, ke ĝi estas la originala.

Strange, la Kvinlanda versio retenas la originalajn vortojn de Paterson, dum, al la "Craigielee" adaptaĵo de Kristina Macpherson, la vortojn Paterson iom alĝustigis al la muziko.

Dum 1917 Paterson fine eldonis "Waltzing Matilda" en "Saltbush Bill, J.P. and other Verses". Kiam la soldatoj revenis de la unua monda milito, kantante "Waltzing Matilda", Paterson diris; "Tiu kanton mi vendis por £5, sed, aŭdante ĝin tiel kantatan, oni volonte pagus milionon".

Jen la historio de la amata kanto, kaj de la konkurso inter la versioj. Nuntempe, oni kelkfoje unuigas ambaŭ, kantante la strofojn laŭ la konata maniero, kaj la rekantaĵon laŭ la Kvinlanda. Provu tion mem.

(El la angla tradukita kaj resumita de Audrey Bruton, Castlemaine, Vik.)

---

Instruisto: "Verku traktaĵojn pri la malutila efiko de oleo sur fiŝojn".

Lernanto: "Mia patrino malfermis ladskatolon da sardinoj; ĝi estis plena de oleo kaj ĉiuj fiŝoj estis mortintaj." (NZE 426).

---

**Ĝentileco:** — Ĉiu mallaŭdas vin pro via kruda malĝentileco!

— Surfaca opinio! Mi ĉiam lasas la virinojn eniri antaŭ mi ĉe la dentkuracisto. ("Hungara Vivo", 1/82).

## D-ro Arthur Baur en "Svisa Radio Internacia"

## SWISSAIR KVINDEKJARA

La 26-a de marto 1981 estis grava ublea dato, ĉar ĝi estis la 50-a naskiĝ-ago de la svisa flugkompanio SWISSAIR. Tiu entrepreno estis unu el la plej sukcesaj en la svisa ekonomia historio. Ĝi transportas en unu jaro pli da pasaĝeroj ol Svislando havas enloĝantojn, tute sep milionojn; ĝi faras en unu jaro 80,000 flugojn kaj havas 16,000 lungitojn. Ĝi posedas 50 aviadilojn de a plej modernaj tipoj kaj jam mendis 27 novajn. Tiuj aeroplanoj flugas al ĉiuj kontinentoj, escepte Aŭstralio, kaj a longeco de la tuta reto mezuras 280,000 kilometrojn, t.e. sepfoje ĉirkaŭ a mondon. Regule SWISSAIR rikoltas a epiteton "plej ŝatata fluglinio de la mondo". Flugante kaj babilante kun eksterlandanoj mi aŭdis ilin diri: "Se mi povas libere elekti, mi ĉiam preferas SWISSAIR".

Kiel povis okazi, ke malgranda lando kiel Svislando povis akiri tiel elstaran pozicion en la granda konkurenco de la flugmerkato? Okaze de la jubileo aperis libro de la konata svisa aŭtoro Lorenz Stucki pri SWISSAIR, en kiu li provas respondi tiun demandon. Li havas tri respondojn. Unue la pilotoj kaj oficistoj, kiuj post la milito restarigis SWISSAIR, estis forte influitaj de la militservo, en kiu ili lernis disciplinon kaj malegoisme plenumitan respondecon; due SWISSAIR profitis de la alta nivelo de la svisa gastigado, tipa por lando kun tiel malnova turisma tradicio kiel Svisio, kio forte influis la personan traktadon de la pasaĝeroj fare de la stevardinoj. Ne estas hazardo, ke SWISSAIR estis la unua flugkompanio, kiu enkondukis stevardinojn jam en 1934. Trie por la svisoj internaciaj rilatoj estas io memkomprenebla, dank'al la geografia situo de ilia lando meze de Eŭropo, kaj same la poligloteco estas io, kies necesecon oni ne bezonas substreki ĉe junaj homoj, kiuj volas fari karieron en tran-ŝtata entrepreno. Post tio Lorenz Stucki nomas ankaŭ ion, kio eble estas eĉ pli grava ol ĉio alia, la sindonemo de la dungitoj de SWISSAIR al ilia entrepreno. Li diras, ke ion simila li renkontis nur en Japanio, kie

la oficistoj de entrepreno sentas sin kiel ĝiaj infanoj kaj la estroj kiel ĝiaj patroj. Tiu familia sento, kiu kaŭzas, ke ĉiu sentas sin respondeca por sia entrepreno, sentas sin ankaŭ protektita en ĝi, estas tiel forta, ke ĝi ne nur ĉirkaŭbrakas la svisajn oficistojn, sed ankaŭ la eksterlandajn. En la alilandaj kaj kompreneble ankaŭ transoceanaj oficejoj de SWISSAIR ankaŭ la nesvisaj oficistoj, kiuj estas tie la plimulto, havas tiun senton de sindonemo al sia entrepreno. Aparte interese estas, ke tio eĉ koncernas usonajn oficistojn, tute kontraie al la amerika tradicio, kie la "job" estas io tre malintima, nepersona, tiel ke oni tie ankaŭ tre rapide eksigās aŭ estas eksigita de firmao.

Jen mi rakontis al vi la historion pri la sukceso de SWISSAIR, sed nun mi volas reiri al la komenco, kaj vi tuj vidos, ke la evoluo ne estis senĉesa vico de triumfoj. La fondiĝo de SWISSAIR estis efektive sekvo de mizera stato de la flugtrafiko. En la dudekaj jaroj funkciis diversaj svisaj flugkompanioj sed neniu prosperis. Plej gravaj estis "Balair", fondita 1925 en Basel kaj "Ad Astra", fondita en 1919 en Zurich. "Balair" havis tre kapablan direktoron Balz Zimmermann kaj Ad Astra ne kapablan direktoron, sed brilan ĉefon, nome Walter Mittelholzer. Li faris pionirajn flugojn, ekzemple al Afriko kaj tre popularigis la flugadon en la svisa popolo. Felice Zimmermann kaj Mittelholzer estis personaj amikoj, kaj kiam ili unuigis siajn du flugkompaniojn antaŭ 50 jaroj, donante al ĝi la promesplanan nomon SWISSAIR, la premisoj por fruktedona evoluo estis kreitaj malgraŭ la tiamaj mizeraj ekonomiaj kondiĉoj.

Zimmermann kreis rapidflugon de Zurich al Munkeno kaj Vieno per sensacia usona aviadilo "Lockheed Orion", kiu flugis kun rapideco de 270 km/h. La sukceso de la linio estis enorma. Aliaj bone funkciantaj linioj sekvis, sed evidente kompare al hodiaŭ SWISSAIR estis ankoraŭ malgranda entrepreno. Ĝi komenciĝis kun 13 aviadiloj, kiuj kune havis 83 seĝojn, la

nombro de pilotoj kaj oficistoj estis 64, kaj la spezo estis 2 milionoj. La afero evoluis esperplene, kiam sortobato trafis ĝin en 1937. Balz Zimmermann mortis kaj Walter Mittelholzer mortfalegis, sed ne per aviadilo, sed grimpante en la montoj. Du jarojn poste la mondmilito haltigis ĉiun aktivecon.

Post la milito SWISSAIR tuj reaktiviĝis, sed mankis la impeto de Zimmermann kaj Mittelholzer kaj en 1950 ŝajnis, ke ĝi ĉiam restos modesta regiona flugkompanio funkciiganta kelkajn eŭropajn liniojn. Estis elektita nova direktoro en la persono de D-ro Walter Berchtold, antaŭa fervoja direktoro, kiu dum 22 jaroj poste kondukis SWISSAIR al sukceso, kaj la svisa "Federacio" aĉetis du grandajn aviadilojn de la tipo "DC6B", luigante ilin al SWISSAIR. Tiamaniere ĝi povis partopreni en la profitdona transatlantika trafiko. Ekde nun la vojo kondukis supren, kaj 1955 SWISSAIR povis repagi la krediton por la du aviadiloj al la svisa "Federacio". Aliajn subvenciojn SWISSAIR neniam ricevis. Ĝi restis privata kompanio, en kiu tamen la svisa Federacio, kantonoj kaj komunumoj havas certan influon, ĉar 22% de la akcioj estas en publika posedo.

Lastatempe SWISSAIR havas certajn malfacilojn, la samajn kiel ĉiuj flugkompanioj de la mondo, ĉefe kaŭzitan pro la daŭra altigo de la prezoj de keroseno, sed oni ne havas kaŭzon por dubi, ke ĝi estas sufiĉe forta por transiri tiun periodon.

## ĈU VI KREDAS PRI KOINCIDOJ?

- Abraham Lincoln estis elektita kiel Prezidento de Usono en 1860. John F. Kennedy elektiĝis en 1960.
- Ambaŭ interesiĝis pri Civilaj Rajtoj.
- Mortis infanoj de ambaŭ edzinoj dum la edzoj deĵoris en la Blanka Domo.
- Ambaŭ Prezidentoj postsekvis nova nomita Johnson.
- Ambaŭ devenis el la "suda" regiono de Usono.
- Andrew Johnson naskiĝis en 1808. Lyndon B. Johnson naskiĝis en 1908.
- Kaj Lincoln kaj Kennedy estis mortpafitaj en la kapo de malantaŭe.
- Ambaŭ estis mortigitaj en la ĉeesto de siaj edzinoj.
- Ambaŭ estis mortigitaj de sudregionuloj, kiuj favoris nepopularajn ideojn.
- John Wilkes Booth naskiĝis en 1839. Lee Harvey Oswald naskiĝis en 1939.

- Ambaŭ Prezidentoj estis avertitaj pri danĝero antaŭ siaj mortoj.
- La sekretario de Lincoln, kies nomo estis Kennedy, konsilis, ke li ne iru al la teatro.
- La sekretario de Kennedy, kies nomo estis Lincoln, konsilis, ke li ne iru al Dallas.
- Booth kuris el la teatro kaj estis kaptita en staplo. Oswald forkuris el staplo kaj estis kaptita en teatro.

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun'ichi Išizaki)

La jara delegitara konferenco okazis en la konferencujo de la Japana E-Instituto en Tokio. 33 delegitoj el tuta Japanio ĉeestis kaj ĉefe diskutis la malgrandiĝon de la membronombro kaj la financajn malfacilaĵojn. Dum la lastaj 6 monatoj JEI perdis preskaŭ 200 membrojn kaj tiu perdo grave influas la financon staton.

Laŭ tutlanda esploro ekzistas nuntempe 80 societoj kun proks. 4000 membroj. Krom tiuj organizitaj esperantistoj ekzistas ankaŭ multaj esperantistoj, kiuj ne apartenas al iu E-societo, kaj varbi ilin al la organizita movado estu la tasko por la estonteco.

La konferenco ankaŭ pritraktis preparlaborojn por la centjara jubileo de Esperanto.

Okaze de la 13-a Internacia Kongreso de Lingvistoj, la Japana E-Instituto organizis "Seminarion pri Internacilingvaj Studoj". Prelegis tri elstaraj lingvistoj. D-ro Helmar Frank, direktoro de Instituto pri Kibernetiko ĉe la Universitato de Paderborn, Germanio, D-ro Probal Daŝgupto, Vicprofesoro ĉe Lingvistika Departemento de Kolegio Deccan, Bharata, Hindujo kaj D-ro Dan Maxwell, usenano, scienca kunlaboranto ĉe la Teknologia Universitato de Berlino.

En sia prelego D-ro Daŝgupto i.a. klarigis, ke en Hindio ekzistas pli ol 1000 parolaj lingvoj kaj 20 skribaj lingvoj. Por japanoj, kiuj parolas unusolan lingvon tra la tuta lando, tiu multlingveco estis malfacile komprenebla. La Seminario estis sukcesa kaj la neesperantista publiko bone komprenis kiel Esperanto funkcias kiel vivanta lingvo. Ĉiu ĉeestanto ricevis resumojn de ĉiu prelego en la japana lingvo kaj en Esperanto.



**PRI "GRONLANDO"**

Pli frue oni kutimis skribi "Grenlando", pura anglisma stultajo. Nun la formo "Groenlando" en PIV estas preskaŭ same stulta, sed francisma.

La nova generacio en "Gronlando" deziras nun enkonduki la nomon "Kaladlito", kaj "inuitoj" por la homoj loĝantaj tie. La vorto "eskimo" estas ofenda al inuitoj, ĉar ĝi signifas "manganto de kruda viando"; Samstile la ĉefurbo, pli frue "Godthab", t.e. Boneŝpero, nun jam tute oficiale nomiĝas **Nuuk**, kiu signifas "duoninsuleto".

—Poul Thorsen, Kopenhago.



• **PERTO:** Je la 9-a kaj 10-a de oktobro okazis en Jarradale 'Esperantista Semajnfino'. 15 membroj partoprenis kaj, dum plaĉa vetero, ĝuis agrablajn programerojn. Sabate S-ro Loneragan gvidis la grupon tra la arbaro kaj klarigis la arbojn de la regiono. Oni kantis, tradukis, ludis kaj rigardis lumbildojn. Dimanĉe la grupo veturis al Digo "Serpentine". Ĉiuj tiel ĝuis la "semajnfino", ke ni decidis rezervi la feriloĝejon ĉe I.H.D. (Institute of Human Development) por oktobro 1983.

En la kunveno de la 13-a de oktobro, D-ro Einihovici montris lumbildojn kaj parolis pri multaj lokoj, kiujn li ĵus vizitis en Eŭropo kaj Ĉinio.

• **ADELAJDO:** Je 26-a de oktobro okazis kunveno en la Universitato. Mi mem prezentis surbendigitan intervjuon inter mi kaj la radostacio 5MMM-FM pri Esperanto ĝenerale kaj Esperanto en Adelajdo precipe. Tiu intervjuo okazis je 4-a de oktobro kaj estis disaŭdigita je 11-a de oktobro.

S-ino Beryl Randles parolis pri "igi-igi" en tre bona maniero, interplektita per amuzaj kaj ŝercoj. Audrey Felby rakontis pri siaj unuaj impresoj pri Danlando. La vespero finiĝis per vigla diskuto ĉu aŭ ĉu ne okazos Univ. Kongreso en Brizbano en 1988.

—Bob FELBY.

• **MELBURNO:** La ĉiujara bazar-vespero "American Tea" okazis je 27-a de septembro, en la Esperanto-Domo.

Partoprenis 21 personoj el la Melburna, Oakleigh-Malvern- kaj Frankston-grupoj. Post 2 loterioj kaj vigla marcandado, la ĉeestantoj ĝuis luksan vespermanĝeton. La profito estis \$65.15, kiu inkludis mondonacojn de F-ino A. Hearn kaj S-ro G. Tumman. La grupoj proporcie dividis inter si la profiton.

Du japanaj esperantistoj el Tokio, S-roj S. Satojoŝi kaj K. Oki, vizitis Melburnon je 21-a kaj 22-a de septembro. Ili estis la solaj esperantistoj en japana vojaĝgrupo. Ĉar ili estis en Melburno dum du tagoj kiam la Melburna Societo ne kunvenas, la prezidanto kaj sekretario de la societo (s-roj Kanaĉki kaj Koppel) renkontis la vizitantojn en la "Southern Cross Hotel" kaj gvidis ilin tra la urbo. La vizitantoj inspektis kun granda intereso nian Esperanto-domon.

Je 11-a de oktobro nia pola membro Jam Makowski parolis pri "Rememoroj pri Finnlando", kie li vizitis plurajn urbojn kaj insulojn, partoprenis en universitataj somerkursoj kaj mem instruis Esperanton. Pri "Novajoj el Esperantujo" prelegis S-ro H. Koppel (18/10) kaj semajnon poste S-ro S. Kanaĉki prezentis memfaritan filmon pri Fiĝio.

• **KANBERO:** Dek du membroj akceptis la inviton de Ges-roj Harry kaj partoprenis, je 11-a de oktobro, 1982, "Belgan Vesperon". S-ro R. Harry, kiu estis aŭstralia ambasadoro en Belgio inter 1965 kaj 1968, prezentis filmon pri tiu lando. Li ankaŭ montris filmon pri la ĉi-jara Universala E-Kongreso en Antverpeno.

Bonvenaj vizitantoj ĉe la klubo, je 25-a de oktobro, estis Ges-roj Kjellander el Svedio.

• **SIDNEJO:** De julio ĝis novembro ni regule kunvenis kaj gastigis eksterlandanojn. Inter ili estis S-roj S. Satojoŝi kaj K. Oki el Tokio, kiuj vizitis nin dum unu vespero. S-ro Alois Wenzlawski, polo, kiu nun loĝas en Zairo, prezentis lumbildojn pri sia nova hejmo. Alia polo, Stan Kulski, dufoje prezentis lumbildojn pri Pollando. Vortludoj okazis kelkfoje —ni uzis 'Vortmozaiko'n. Paroladoj okazis pri hazardaj renkontiĝoj kun aliaj esperantistoj, pri la verkoj de Karel Čapek, pri la utileco kaj malutileco de televido, pri diversaj internaciaj Esperanto-urnaloj kaj pri iloj uzataj en la ŝpinado de diversaj fadenoj. Ni ankaŭ komencis legadon de eta teatraĵeto por

la Zamenhof-vespero.

—Margaret Chaldecott.

• **BRIZBANO:** Okazas ĉiulunde la kvin klasoj en la klubĉambroj. La 4an de decembro, ĉe la hejmo de Mina kaj Rudy Spork, la societo festos memore al Zamenhof dum neformala vespero. Laŭ kalkuloj inter 40 kaj 50 anoj kaj amikoj ĉeestos. Dum la ludoj de la Brita Komunumo Ray Ross iomete propagandis per disdonado de Esp-aj flugfolioj; neniu eksterlanda samideano sin prezentis tamen. Trevor Steele ricevis dankleteron el Pollando pro manĝajdonaco; la skribinto ankaŭ menciis la fortan ĉeneron inter samideanoj kaj ŝajnas ke la penso mem estis pli grava ol la donaco! —RR

### AEA SOMERLERNEJO

Gis nun estos 26 lernejoj en januaro 1983, ĉe Armidale. La novaj studentoj estas: Jan Nelson, Marj Ellyard, Sam Ellyard, Ralph Harry. (ACT). Joan Green, Kitty Gassner. (NSW). Pri la Belarto-Grupoj: Ralph Harry gvidos pri tradukado; Margaret Chaldecott kaj Annie Spencer pri poezio kaj pupteatro; dum Annie Spencer konsentis ankaŭ gvidi pri muziko kaj kantado. La aliajn tri klasojn (laŭ antaŭaranĝoj) gvidos Trevor Steele, Alan Towsey kaj Ray Ross. La Sek/Kaŝ Joan Green ankoraŭ atendas vian fruan aliĝon! —RR

• **MANLY:** La 26-a de oktobro Manlyanoj ĝuis societan vesperon en la hejmo de Frank Mangan, kie Arthur Cocking montris siajn interesajn lumbildojn pri vizito al Eŭropo.

Ni havis la bonŝancon bonvenigi plurajn vizitantojn al Manly. La 24-an de oktobro **FRANCESKA KORSO** el LIVORNO, Italio, kiun Arthur Cocking renkontis ĉe kongreso de I.L.E.I. en Italio, estis gasto en kelkaj esperantistaj hejmoj.

La 2-an de novembro, Anne **WHITTEKER**, delegito por Portland, Oregon, parolis pri la **ELNA-Kongreso** en Vancouver en 1984. La 16-an de novembro, rost kvar jaroj, ni ĝuis revidi Nell kaj Russell Hamilton el Exmouth, Anglio. Ili vizitas filon kaj restas ĉi tie ĝis post la Kristnaska periodo.

Ni adiaŭis Margaret kaj Robby Robertson. kiuj akompanas anglajn parencojn al Nov-Zelando por tri semajnoj. Ili espereble ĉeestos Zamenhof-Vesperon en Christchurch. —Eunice GRAHAM

## EL LA FEDERACIO

• **N.S.W.** Monataj kunvenoj okazas por konversaciaj grupoj kaj samtempe kuniĝas la estraro de la Federacio. Dum la Jarkunveno en septembro oni elektis novan estraron: S-inoj B. Cleminson, J. Green, E. Matasin, E. Peddie kaj S-roj H. Peddie kaj F. Mangan.

Pluraj anoj ĉeestis la Univ. Kongreson en Antverpeno kaj tre ĝuis la sperton.

—Margaret CHALDECOTT.

• **KVINSLANDO:** La 23-24an de oktobro la dua konferenco, 1982, okazis en Kingaroy/Bunya Mountains — ĉirkaŭ 300 kilometrojn for de Brizbano. Inkluzive de du anoj, kiuj loĝas en Kingaroy, 31 konferencanoj tre ĝuis la tre okupitan semajnfino. Vetero, manĝaĵo, kamparo, pejzaĝo, etoso; ĉiuj estis belegaj. Malgraŭ la fakto, ke estis antaŭa reklamado pri la konferenco neniu el la enloĝantoj vizitis nin — krom raportistino, kiu reprezentis la lokan gazeton, "South Burnett Times". Si promesis artikolon kune kun bildoj en la sekvonta eldono. Anoj el la Brizbana, Toowoomba, Rockhampton kaj St. Lucia Grupoj ĉe-estis. Post malfermo de la kunveno, okazis silento, memore al Hilda Banham kaj samtempe oni simpatiis al Doris Sinclair, pro rompita kruro, kaj al Agnes Curtis, pro malsano. Oni diskutis multajn aferojn, akceptis klubraportojn; Cliff Bailey raportis pri aranĝoj por la Skolta Jamboreo. La Prezidanto menciis la subtenon de kelkaj aferoj dum 1982, donacoj al Klinikoj por Blinduloj en la Tria Mondo, kaj al Polaj Esp-istoj; subteno de la Jamboreo kaj la AEA Somerlernejo. Estas nun 87 anoj en la Federacio kaj 5 Grupoj aliĝas. La Prezidanto dankis al ĉiuj, kiuj subtenis la Federacion dum la jaro, kaj speciale al la anoj de la komitato. Li ankaŭ emfazis la bezonon aliĝi al AEA dum 1983. La estraro por 1983 estas jene: Prez. Ray Ross; Vic/Prez. Tom O'Grady, John Paroz; Sek. Decie Shonhan; Kas. Nan McGuckin; PRO. Lynne Farr; "La Voĉo" Ray Ross.

Ĉiuj tre ĝuis konferencan vespermanĝon, viglan distran vesperon kaj viziton al Bunya Montoj, dimanĉe. Gis majo 1983 en Toowoomba!

—Ray Ross.

### ESPERANTO SUKCESAS EN BELGA ELEMENTA LERNEJO

Ĉi-jare unuafoje en la "Elementa Lernejo N.D. de la Paco", en Namur

(Belgio), dank' al la nova juna direktoro, S-ro Deleuze, la 98 gelnantoj de la kvina jaro povis elekti la studon de Esperanto. La instruisto estis mirigita nombri sur la benkoj 40 geknabojn (10-jaraĝajn), tre entuziasmajn.

La instruisto petas, ke samideanoj bonvolu kuraĝigi tiun tre raran iniciaton, sendante bildkartojn al la junaj mond-civitanoj. Jen la adreso: **Ecole Primaire N.D. de la Paix, Route de Velaine, B-5101 ERPENT — NAMUR, Belgio.**

## RECENZOJ

### • DE FRANCISKO EL ASIZO POR VI

. . . Humberto Leite de Araujo tr. Delio Pereira de Souza, Edicoes Alianca da Fraternidade (Pacon kaj Fratecon), Rio de Janeiro 1981. 326 paĝoj.

Denove ni devas danki al niaj brazilaj amikoj pro grava verko en la fako biografio.

Ci tiu libro interesos ne nur religiulojn sed ĉiun, kiu deziras lerni pri la vivo de tiu "grandulo" en la historio de la homaro . . . Sankta Francisko el Asizo.

Kiel diras Geraldo de Aquino en sia antaŭparolo, "ĝi estas invito al meditado en tiu grava horo, kiun travivas la Mondo . . . en kiu abundas malkonsento kaj konflikto".

Speciale interesa por tiuj, kiuj legis "Vivo de Gandhi"n de Edmond Privat (ĵus eldoniĝis en Aŭstralio angla traduko de Dorothy Threlfall) estas la ĉapitro "Mahatma Francisko el Asizo".

Sed estas multaj juveloj, ekzemple (p. 75) versio, kune kun la itala originalo, de la preĝo de Sankta Francisko, kiu inspiris tiom da Kristanoj: "Ho Sinjoro, faru el mi ilon de via paco. Kie estas malamo, zorgu ke mi alportu la Amon. Kie estas ofendo, ke mi alportu la Pardonon. Kie estas malkonsento, ke mi alportu la Unuecon . . . ktp.

Generale la traduko de Delio Pereira de Souza, reviziita de Prof. Benedicto Silva, estas en zamenhofa Esperanto. La citaĵoj estas el la klasika Sankta Biblio. Kaj la ilustraĵoj estas trafaj kaj belaj.

—Ralph Harry.

### FERVOJA ANTOLOGIO

Dum la 33a IFEF—Kongreso en Regensburg LKK organizis Literaturan Konkurson. Partoprenis ĝin 42 verkintoj el lo landoj kun pli ol 60 kontribuajoj. La rezulto estas libreto "La verda relo",

kiun eldonis Literatura Foiro en La Chaux-de-Fonds. En ĝi troviĝas la premiataj kaj laŭde menciitaj verkoj de poezio kaj prozo (originala kaj traduka), ĉiuj kun prifervojaj temoj. La libro estas 68-paĝa, bindita kaj kostas 12 svisajn frankojn respektive 15 germanajn markojn.

Ĝi haveblas aŭ ĉe la eldonejo:

LF-Kcoop, CP 417, CH 2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando), poŝtĉeka konto 23-6636 aŭ pere de.

S-ino Elfriede Kruse, Wiener Str. 121, D 6000 Frankfurt/Main 70 (Germanio) (pagenda al Sparda-Bank Frankfurt/Main, poŝtĉeka konto 57908 (Frankfurt/Main favore al konto 129 957).

### ESPERANTO LINGVO INTERNACIA

—la solvo de niaj lingvaj problemoj. Esperanto Press, Ballieboro, Ontario, Canada, KOL 1BO.

Jen impona kolekto da studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la Rajto je Komunikado kaj la Internacia Lingvo, plejparte en la angla lingvo, sed parte ankaŭ en Esperanto, kompilita de Ruediger kaj Wilma Eichholz, vere granda fonto de informado kaj utila konsultilo por ĉies bretaro.

Mendu ĉe Esperanto Press, Bailieboro, Ont., Canada, KOL 1BO.

### LA "A.E."

#### SUBTEN — FONDUSO

1982/1983

Antaŭe raportita . . . . .	\$565
S-ino O'Doherty (per H. Peddie)	2
	<hr/>
	\$567

Okaze de la festotagoj ne forgesu vian Esperanto-revuon.

### BONA INFORMO

La 1983-a abonvarba kampanjo de "EL POPOLA ĈINIO" jam komenciĝis. Ekde nov. 1982 ĝis 28-a de feb. 1983 vi povos profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesos varbi 4 abonantojn vi ricevos "Libro-kuponon" kiel donacon. La kupono valoras US \$5.00

**Abontarifo.** 1 jaro \$5.70, rabatita prezo \$4.56; 2 jaroj \$9.60, rabatita prezo \$7.68; 3 jaroj \$13.30, rabatita prezo \$10.64.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntingly, Vic., 3164.

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 21 — FAY KOPPEL, née Andres

#### A Modest Violet

You have certainly heard of Herbert Koppel, our esteemed editor, prominent in so many aspects of Esperantism, but have you ever noticed the charming little woman with him—"looking after" him, making sure that he has his notes and that his clothes are in order? That's Fay Koppel, his wife — a lady who prefers to stay in the background and shadow of the "greats" when, because of general erudition and exam-proven excellence in Esperanto she qualifies to be one of the "greats" in her own right.

Yet she is content in her chosen role — "the willing servant of a slave of Esperanto".

Fay wanted to be a schoolteacher. Her aunt was. But the Depression made it impossible to get any teaching post except that of governess to 6 children on a sheep station so remote that a trip to "nearby" Broken Hill was a near impossibility.

The Depression over, she was back in Adelaide where she did a course in typing and shorthand. She entered the State Public Service where, by dint of application and ability (and, she modestly suggests, the war-caused staff shortage) she rose to the position of Secretary to the Director of the Tuberculosis clinic in the Royal Adelaide Hospital.

In the mid 30's (of the century — **not** of her age) she started to learn Esperanto — of which she had heard whilst still at High School. "Conscientious" being her middle name, she studied "A Concise Course in Esperanto" by L. N. Newell at home, one lesson every day, and attended the Adelaide Club once per week. Rumour (which Fay refuses to confirm) has it that after 2 or 3 weeks her teacher Colonel David Fulton, felt that she could teach him more than he could teach her, so had her promoted to the top class of S-ro Waterman. Of course, overseas correspondence helped. Fay at first wanted to improve her French by acquiring a pen friend, but her aunt, whose overseas penfriends were legion, suggested Esperanto, so Fay found herself corresponding with the younger sister of a Belgian teacher in a boy's school in Bruges.

The aunt also told Fay about the Pyke Memorial Examination, open to

all who had studied Esperanto for less than one year. Her soul and her pocket sighed for the 5-guinea prize. She came first with S-ro Keane, so she shared the honour and the 5 guineas with him.

This, of course, was merely the first of Fay's triumphs, for finally she reached the distinction of an honours pass in the "Kleriga" the highest examination in Australia and is one of the 4 chief examiners of A.E.A.

Some time after the War, word went round the hospital that an Esperanto group was to be formed as a sort of therapy to occupy convalescent time, and that it was to be led by a well known "Esperantistino". The lady turned out to be Win Addis who, with others, had struggled to keep the gazette "La Rondo" alive during the war. She it was who — especially in two holidays they took together — introduced Fay to a range of Esperanto literature and a galaxy of Esperanto "stars".

In Perth in 1947 she met, among others, Dr. and Mrs. Einihovici, Ruth McGrath and Dr. Caldera who "fathered" our present system of Esperanto examinations. He introduced her to the British Diploma, which she gained with honours.

It was on a holiday in Melbourne with Win that she attended Melbourne Esperanto Society, the Esperanto "home" of Ges-roj Hanks the mentors of her correspondence course. At the Melbourne club she met a newly arrived member. Fay, wanted, in due course, to marry. This was a man. She preferred older men. He was 4 months her senior. She preferred colourful, expert Esperantists. He was an Austrian, lately arrived from Canada after a series of adventures. He was proficient. He was enthusiastic. He was ready to revive the all-Australian Congresses which had fallen into desuetude. One such was held in Melbourne, and Fay was one of the Adelaideites who attended. Did she make contact again with the dark Austrian? She did, and married him.

Since then, she has spent 30 years as the "woman behind the man who is behind much organisation of events". Next year in Canberra, ask someone to point her out. Go greet her. She speaks delightfully correct, yet simple Esperanto.

—Arthur Cocking.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 202 (282)

MELBOURNE

Decembro, 1982

**Prof. D-ro Ivo Lapenna respondas al:**

## "KIAL MI REVENIS AL ESPERANTO" de Tibor Sekelj

(Vidu "A.E." N-ro 199 de septembro, 1982)

1. Mi konas S-ron T. Sekelj ekde la studentaj jaroj, kiam mi estis fondinto kaj prezidanto de Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb kaj li estis unu el la ĉ. cento de ĝiaj membroj, vizitadis la semajnajn kunvenojn kaj sporade prelegis. En la postmilita periodo ni kunlaboris en la kadro de UEA. Estas strange, ke en sia artikolo li identigas min per "tiamaj prezidanto de UEA". Ĉu li forgesis mian nomon, aŭ en tia misprezenta kunteksto li ne kuraĝis eldiri ĝin?

2. Verŝajne eĉ T.S. ne neos, ke dank' al miaj kvazaŭe "stoniĝintaj metodoj", kiel li esprimis sin, la jugoslavia Esperanto-Movado leviĝis el la cindroj de 1928/29, konstante progresadis malgraŭ la tiamaj persekutoj fare de la diktatureca reĝimo, kaj en 1941 fariĝis unu el la plej fortaj en la mondo, samtempe alte respektata en la kulturaj medioj de Jugoslavio. Neniu konato en la bazaj faktoj povas nei, ke dank' al esence samaj kvazaŭe "stoniĝintaj metodoj" kaj gran-

dega laboro estis sukcese konstruata la moderna UEA ekde 1949/50 por atingi en 1974 senprecedencajn forton, organizitecon kaj eksteran prestiĝon, dum la forlaso de tiuj science bazitaj metodoj kaŭzis regresojn sur ĉiuj linioj. Se iu ne konas la faktojn, li/ŝi bv. legi ĉap. 18 (p-oj 548-634) de "Esperanto en Perspektivo" kaj kompari kun la Estraraj Raportoj de UEA ekde 1975.

3. Neniame mi estis "forigita el la Movado", sed plu aktivas kaj intencas aktivi por la bono de Esperanto. Alia afero estas, ke en 1974 mi mem ekzigis el ĉiuj funkcioj en UEA, rifuzis la honoran prezidantecon kaj forlasis la Asocion nur fine de 1975 pro la enkondukita cenzuro, kiu silentiĝis la veron. Dokumentitaj detaloj troviĝas en mia verko "Hamburgo en Retrospektivo", 2-a eldono. Estus tempo, ke oni ĉesu misprezentadi almenaŭ tiujn faktojn.

4. I.O.E. ne estis fondita en 1963, kiel asertas T.S., sed nur post kiam la Komi-

tato de UEA dum la UK en Hago (1964) malakceptis lian planon "Kampanjo de Kampanjoj", kies celo estis enkonduki la praktikan uzon de Esperanto en "ĉiujn fakojn" de la vivo en la daŭro de dek jaroj. En la Komitata Kunsido de la 1-a de aŭgusto, 1964, T.S. ankaŭ parole eksplikis siajn ideojn kaj prarolis pri 88 fakoj, centra stabo de reprezentantoj de ĉiuj fakoj, landaj komisiitoj por ĉiu fako kaj provincaj/lokaj kunlaborantoj, fakvortaroj, lernolibroj kaj frazaroj por la koncerna fako, ktp., ĉio en la kadro de UEA. Tio estis ne sole nerealeca, sed vere fantazia revprojekto. Iu (se mi bone rememoras, S-ro Pickel en sia gazeto) poste elkalkulis, ke por realigi ĝin en 88 fakoj en kvindeko da landoj kun kunlaborantoj en nur kvindeko da lokoj en ĉiu lando, la Movado bezonus ĉ. 230.000 aktivulojn kaj milionojn da dolaroj! En tiu kunsido de la Komitato tuta aro da komitatanoj esprimis seriozajn dubojn pri la realigeblo de la projekto, inter kiuj S-roj Pickel, Maertens (la nuna prez. de UEA), Wensing, Woesink, Gorov k.a. inkluzive min mem. Laŭ la Proktokolo de tiu kunsido, mi emfazis, ke necesas fortikigi la ekzistantajn asociojn kaj klopodi formi novajn, se la ĉirkonstancoj permesas tion, kiel antaŭvidis la tiama Agadprogramo de UEA kaj kio ja estis farata. En la fino mi denove atentigis, "ke S-ro Sekelj miskomprenas la tutan starpunkton esprimitan en la Komitato, nome ke neniu dubas pri la utileco de agado en fakaj medioj, sed ke temas pri la metodoj laŭ kiuj ni povas sukcese agi. (p. 6). Tiam S-ro Sekelj deklaris, ke "li mem, se necese, nome se UEA ne donos al li la subtenon, kreos milojn da novaj esperantistoj kiuj agos sur tiuj kampoj" (p. 6). La Komitato malakceptis la proponon, sed, laŭ mia scio, T.S. "kreis" eĉ ne unu el la promesitaj "miloj da novaj esperantistoj".

5. Ne estas vera la aserto pri miaj kvazaŭaj "atakoj" kaj "kontraŭagoj" al agadoj de T.S. Male, mi donad's apogon al tiuj agadoj, pri kiuj mi kredis, ke laŭ siaj kapabloj li eble povus realigi ilin, ekz. al "Karavano de Amikeco" en Afriko, aŭ al liaj klopodoj en Hindio kaj Nepalo, k.a. Bedaŭrinde, plurfoje mi trotaksis liajn kapablojn: la "Karavano de Amikeco" finiĝis katastrofe. La bruo ĉirkaŭ la nomo de Vinoba Bhave montriĝis komplete sensignifa, dum la agadoj en Hindio kaj Nepalo restis sen kiaj ajn videblaj rezultoj.

6. Post la fondo de IOE, T.S. daŭre promesadis spektaklajn sukcesojn, i.a. la "esperantigon" de dek mil doganistoj en la valo de Danubo. Ne estas konata, ĉu **unusola** doganisto ellernis la lingvon. Li kreis ian turisman servon de IOE kaj la fiasko estis tia, ke ne mi, sed **Politika**, unu el la du plej gravaj jugoslavaj taggazetoj, akre atakis tiujn fuĝaĵojn, kio siavice kompromitis nian aferon en Jugoslavio.

7. T.S. nur nun malkovris, ke "ni devas turni nian atenton . . . al la grandaj internaciaj organizaĵoj". Kiu, do, iniciatis la Peticion al UN/Unesko? Kiu atingis la faman Rezolucion de Unesko de 1954, la establon de konsultaj rilatoj kun Unesko kaj, poste, U.N.? Pro kies agado D-ro Zamenhof estis deklarita de Unesko unu el la grandaj personecoj de la homaro?

S-ro T. Sekelj sendube havas ankaŭ meritojn por Esperanto. Lia granda eraro estas, ke li ofte vivas en revoj kaj en tiu mensa stato inklinas kulpigi aliajn, plej taŭge min, pro la necesaj fiaskoj de siaj fantaziaĵoj — IVO LAPENNA. , ,

(Ni dankas al niaj eminentaj kontribuintoj, Tibor Sekelj kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna, ke ili elektis nian modestan revuon por interŝanĝi siajn opiniojn. Pro spacomanko tiu debato estas nun finita. —Red.)

### Ges-roj Einhovici vizitis Ĉinion

Post la Universala Kongreso en Antverpeno, ni kun grupo de Esperantistoj el 7 landoj vojaĝis al Ĉinio, kie ni pasigis tre interesajn tri semajnojn. Unuafoje mi vidis landon kie ĉiuj laboras kaj estas kontentaj. Nia grupo estis la unua grupo de Esperantistoj, kiuj vizitis oficiale la landon kaj la ĉinaj samideanoj akceptis nin per "reĉeca maniero". Ek de la unua momento de nia alveno al Pekino ĝis la eliro al Hong-Kongo, la ĉefa ŝtata gvidisto kaj aliaj esperantistoj prizorgadis ĉiam niajn valizojn, loĝadon, ekskursojn, manĝaĵojn, vizitojn al teatroj, komunumoj, fabrikoj, muzeoj, temploj kaj elfosaĵoj.

En Pekino reprezentantoj de "Popola Ĉinio" aranĝis en sia belega domo solenan vesperkunvenon — pli ol ducent homoj partoprenis, kaj ĉiu el ni raportis pri la movado en sia lando. Varmaj salutoj kaj multnombraj donacoj sekvis.

Ili tre serioze lernas Esperanton kaj daŭre starigas kursojn por instruistoj, kiuj dum ok monatoj intense studas Esperanton dum la tuta tago. Tiuj, kiuj sukcesas ekzamenon, ricevas diplomon por instrui. Dum ekskursoj ni renkontis kelkajn el tiuj instruistoj kaj rimarkis, ke ili regas sufiĉe bone la lingvon. En lernejoj Esperanto estas instruata kiel fakultativa studobjekto.

Ni vizitis multajn urbojn. La plej interesaj estis Pekino, Xian, Nankino kaj Shanghai. La stratoj estas inunditaj per bicikloj, tamen dum tri semajnoj ni ne

vidis nek aŭdis pri ia akcidento. Neniu rajtas posedi aŭtomobilon. La teatroj, kies arta nivelo estas tre alta, estas ĉiam plenplenaj.

Ni ricevis la impreson, ke Esperanto progresas rapide dank' al helpo de la registaro kaj la laborkapablo de la ĉina popolo. En ĉiu urbo kiun ni vizitis, grupoj de Esperantistoj atendis nian alvenon kaj aranĝis kunvenojn kaj senĉese prizorgis nin en vere amika Esperanto-etoso.

—T. Einihovici.

## — SPECIAL REQUEST —

Please do NOT send to me any Subscriptions to A.E.A., or Donations for the "Australian Esperantist" Support Fund.

All sums of money should be sent only to our Treasurer, Mr. Sam Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

— Herbert Koppel, Editor.

## LA ETIMOLOGIO DE "HERALDIKO"

Bernard Golden

En *Kolektanto* (1979, n-ro 3-4, p. 14) troviĝas jena klarigo: "Etimologie heraldiko devenas el la germana vorto ERBE — heredaĵo. Ĉar la aŭtoro ne donis pli da detaloj por apogi tiun etimologion, mi deziras prezenti faktojn indikatajn, ke "heraldiko" havas tute alian originon.

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) la zamenhofa vorto "heraldiko" signifas "scienco pri la blazonoj", do ĝi estas sinonimo de "blazonoscienco" kaj "blazonistiko", ambaŭ registritaj en Esperanto-vortaroj. Plue, "heraldiko" estas etimologie parenca al la substantivo "heroldo", kiun PIV difinas jene:

1. regna militisto aŭ oficisto, kies rolo estas anonci gravaĵojn (proklamo de kronado, de milito ktp)

2. diskoniganto

Mankas en tiu ĉi difino informo pri ankoraŭ unu tasko, kiun la heroldo plenumis.

"en mezepoko, oficisto, kiu . . . . okupis sin pri genealogioj kaj blazon-

sildoj" (Charles Verax, *Enciklopedia Vortareto Esperanta*, 1910)

Fakte, kiam Zamenhof elektis la vortformon "heroldo", li malatentis la principon de internacieco, kiun li mem formulis en la Antaŭparolo de la "Unua Libro". Komparu la formon de la vorto "heroldo" en kelkaj gravaj etnolingvoj.

1. angla: herald  
hispana: heraldo  
itala: araldo  
franca: herault  
portugala: arauto
2. germana: Herold  
rusa: gerold.

Estas evidente, ke la aŭtoro de Esperanto estis influita de la germana kaj rusa formoj, kies dua vokalo estas "o", dum en la latinidaj lingvoj ĝi estas "a", same kiel en "heraldiko". La ekzisto de du malsamaj radikoj — "herold—" kaj "heraldik—" — estas ekzemplo de vortformada miskonomio. Zamenhof estus povinta per nur unu radiko—"herald—" — pluformi ĉiujn bezonatajn vortojn

helpe de sufiksoj. Tion ja faras la rivala planlingvo Interlingua: **herald, heraldic, heraldica**.

La etimo de la vorto por "heroldo" en la listigitaj etnolingvoj estas la oldfranca **heralt** aŭ mezfranca **hiraut**, kiu devenas de konjektita germana kunmetaĵo, kies unua elemento estas parenca al la oldaltgermana vorto **heri**, "armeo" (**Heer** en la novgermana), kaj kies dua elemento estas parenca al la oldaltgermana **waltan**, "regi" (**walten** en la novgermana). La supozita formo estas \***heriwald** aŭ **hariwald**, "armea reganto aŭ funkciulo". La ĝermana virnomo **Harald** kaj ĝiaj variaĵoj **Herold** kaj **Heriold** havas la saman signifon.

La germana vorto **Erbo**, "heredaĵo", citata en la artikolo en **Kolektanto**, tute ne rilatas al "heroldo" aŭ "heraldiko". Fakte se oni serĉas vorton en Esperanto, kiu estas parenca al **Erbe**, ĝi estas "orfo". Jen la etimologio de tiuj ĉi vortoj. **Erbe** (neŭtra) devenas de la mezaltgermana **erbe** kaj oldaltgermana **erbi/ arbi**, kiu estas parenca al la gota **arbi**. Tiu ĉi siavice rilatas al la latina adjektivo **orbis**, "orfa, vidva", kaj la helena **orphanos**, "sengepatra persono". Aliaj hindeŭropaj parencaj vortoj estas la armena **orb**, "orfo", kaj la sanskrita **arbhas**, "malgranda, malforta, juna". La prahindeŭropa radiko estas **erbh**. "post-lasi, heredigi".

Estas interese ankoraŭ pli malproksimen spuri tiun hindeŭropan radikon en alia granda lingvofamilio, la finnugra. La parenca vorto en la hungara estas **arva** kaj en la finna **orpo**, ambaŭ signifantaj "orfo". Ili devenas de la konjektita finnugra **orpa** aŭ **orpas3**, kiu verŝajne estis prunto de la hindeŭropa aŭ praarja **orbho-s**.

Fine, estas substrekende, ke ekzistas neniu rilato inter la unua silabo "her-" de "heraldiko" kaj "hered-". La etimo de "hered-" estas la latina substantivo **hereditas/hereditatis**, kiu estas derivita de **heres/heredis**, "heredant(in)o".

—Halo, ĉu hotelpordisto? Terure! Dormi ne eblas en la bruo!

—Mi vere bedaŭras, sinjoro! Sed ni ne povas pli mallalte sonorigi la fajro-signalon. ('Hungara Vivo', 6/82).

—La letero estas tro peza, sinjoro — deklaras la poŝtisto —, oni devas surglui plian poŝtmarkon.

—Kial? Ĉu tiam ĉi ius malpli peza? ('Hungara Vivo' 2/82).

## PASTRA ABSTINENCO

Antaŭ jaroj, kiam mi ankoraŭ estis gaja studento en Heidelberg, mi ofte sidis kune kun nordaj kamaradoj, kiuj vespere trinkis sian bieron. Unu el ili estis granda, blonda, bela ulo, kiu nomiĝis Olaf kaj studis teologion.

Spite de sia pia studado li ofte levis la pokalon. Kiam ni vespere iris en restoracion, Olaf, kiu ne tre ŝatis nian bieron, miksis kun granda sperto vaporajn punĉojn, kiujn li povis trinki je tiu alta temperaturo, kiun krom li nur tiel-nomataj fajromanĝantoj povus toleri.

Li plendis: "Ho, la germana vintro estas tiom humid-frida de ekstere", do li faris ĝin malsek-varma interne . . .

Poste li fariĝis pastro en iu nord-norvega loketo. Dum vojaĝo, mi hazarde venis en la klaran fjordon, ĉe kiu lia komunumo kaj preĝejo troviĝis. Komprenoble mi vizitis lin. Li aspektis same juna, blonda kaj freŝa, sed lian vizaĝon crnamis impona plen-barbo.

La komunumo tre laŭdis lin kaj li mem tre fieris pri la beleco de la regiono. Nur . . . . .

"Ĉu vi scias," diris Olaf kaj lia rigardo ete malheliĝis. "Ĉu vi scias, ke vi troviĝas ĉi tie meze en la abstinenco . . . ."

"Kio, do . . . . via komunumo?"

"Mia komunumo pensas, ke glaso kaj eĉ pli botelo da alkoholo reprezentas grandan pekon. Kaj mi estas nun ĉi tie pastro dum kvin jaroj!"

"Ĝuste vi, Olaf! kiu kunmetis tiujn mirindajn varmegajn punĉojn en tiu humid-frida germana vintro . . . ."

"Tjes, d'ris Olaf, "ĉi tie la vintroj estas sekfridaj, tamen varmegaj punĉoj estus tre agrablaj . . . ."

"Nu, vi certe povus . . . kelkfoje . . . tute sekrete . . . ."

"Kiel fari tion? mi havas mian maljunan onklinton Hildur, ŝi estas eta, sekinta virneto, sed ŝi havas klarvidajn okulojn kaj . . . ŝi estas radikale abstinenca kaj prezidantino de la abstina klubo 'Blua Kruco'.

"Sed certe vi povus . . . sekrete . . . enporti botelon da punĉo . . . ."

"Eble, kun multe da peno. Sed de ĉiu mi ricevas la varmegan akvon sen ke la onklino suspektu ion?"

"Ho, kara Olaf", mi ruze ridetis, "kial vi havas plenbarbon?"





Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1982 venas al vi pro  
la malvaraj donacoj de 68 esperantistoj kaj  
Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la  
"Subten-Fonduso" de nia gazeto.



"Kiel interrilatas mia barbo kun la punĉo?"

"Tiel: nome se vi mem razas vin, vi ricevas tute sensuspekto varmegan akvon . . ."

La grandaj bluaj okuloj de Olaf fariĝis ankoraŭ pli grandaj kaj pli bluaj, kiam li parolis kun granda ekmiro: "Vere! necesas, ke studkamarado venu el Germanujo por . . . ! Li danke premis mian manon kaj akompanis min al la ŝipo; kaj la lastaj vortoj trans la akvo estis: "Morgaŭ la barbo forfalos! Ĝis revido!"

Post unu jaro mi refoje vojaĝis norden kaj volis viziti la amikon. Mi vidis apud la preĝejo la blankan dometon kaj en ties ĝardeno laboris maljuna virineto-do, 'onkline Hildur'.

Je mia demando, ĉu la pastro enestas, ŝi diris kun iomete juneca riverenco: "Ho, tion li tre bedaŭros, li ĵus vizitas malanulon. Sed se vi volas atendi . . ."

"Neeble", mi diris, "la ŝipo ne restos longe. Sed kiel fartas Olof?"

"Ho, entute li ja estas freŝa kaj sana. Kaj ekstere oni ne rimarkas ion, kaj tamen . . ."

"Kio? Ĉu iu ĉagreno? Iu aflikto?"

"Ĉagreno, ne, aflikto—mi ne certe scias—sed mi timas pri io terura . . ."

Evidente, ŝi estis kontenta, ke ŝi povas konfidi sian sekretan al viro, kiu estas amiko de ŝia nevo kaj baldaŭ forvojaĝos, kaj diris duonvoĉe: "Mi timas ofte, ke li estas ĉi tie . . ." kaj ŝi faris signifan movon per la montra fingro al la frunto "ne plu tute normala . . ."

"Dio mia, tio estas terura: ĉu tio evidentiĝas en liaj predikoj?"

"Ne, ne. Ne en la predikoj, ili estas bonaj . . ."

"Do, ĉu li estas melankolia hejme?"

"Ne. tute ne. Li eĉ multe kantas, ofte student-kantojn el la tempo en Heidelberg".

"Nu, kara fraŭlino, kiujn simptomojn li montras por viaj timoj?"

"Jes, mia kara doktoro"; ŝia osteca mano kuŝis sur la mia, kaj mi sentis la tremadon de ŝia anima ekscito, kiam ŝi komunikis en mian oreleon sian teruran rimarkon: "Kara doktoro — pensu: la bedaŭrinda Olaf, li razas sin okfoje en la tago! "

(Ricevita antaŭ jaroj de S-ro Paul Schwerin)



### INAŬGURO DE ESPERANTO — STRATO

Post okjara persista laboro de S-ino I. Einihovici venis fine la tago kiam oni en antaŭurbo de Perto inaŭguris straton, kies nomo estas "ESPERANTO WAY" ("Esperanto-Vojo").

Je dimanĉo, 21-a de novembro, 1982 okazis en antaŭurbo BALGA la inaŭgura ceremonio. La prezidanto de la Okcident-Aŭstralia E-Ligo, S-ro Jack Hawks, bonvenigis 90 membrojn kaj amikojn de la Ligo. La urbestro de la civito Stirling, S-ro Birkett laudis la celojn de la Esperanto-movado, proklamis la novan straton "Esperanto Way" kaj malkovris la strat-nomplaton. En la nomo de la ĉeestantoj, S-ino Einihovici dankis la urbestron kaj esprimis la feliĉon de la lokaj esperantistoj, ke same kiel en multaj aliaj urboj de la mondo, nun ankaŭ en Okcidenta Aŭstralia ekzistas strato nomita Esperanto.

● **MELBURNO:** Je 8-a de novembro Harry Beechey parolis pri la "Korpa Lingvo" kun speciala pritrakto de nova libro rilate al angleparolantaj personoj.

Bonvena vizitanto ĉe la Esperanto-Domo estis (15/11) A.E.A. Prezidanto Ralph Harry. Samvespere Jan Makowski plue parolis pri "Memoroj pri restado en Finnlando".

"Kio estas nova en nia Biblioteko" estis la temo de prelego de S-ino Fay Koppel. Ŝi pritraktis kaj montris aron da novaj E-libroj, kiuj atingis nin dum la pasintaj 20 monatoj (22/11). Semajnon poste prezidanto S Kanaĉki prelegis kun diapozitivoj denove pri Figio.

La E-klubo en antaŭurbo **OAKLEIGH** havis sian ĉef-kunvenon je 13-a de novembro. Pro multokupiteco la plujara sekretario Robert Reed rezignis kaj la membroj elektis la jenan komitaton: Prez: Jack Fallu; Vic-Prez: N. Butkunas; Sekretario/Kasisto: F-ino Ann Hearne; Vic-Sekr. kaj bibliotekisto: Ivy Fallu. La grupo decidis ne plu kunveni dufoje monate en la biblioteko de Oakleigh. Kunvenoj nun okazas ĉiun merkredon posttagmeze alternative en la hejmoj de F-ino Ann Hearne aŭ de Ges-roj Fallu.

● **MANLY:** La 22-an de novembro finiĝis la tria trimestro ĉe la Eduka Centro. La kvin grupoj renkontiĝis por duona horo da diskuto pri la aranĝoj por diversaj societaj kaj aferaj kunvenoj dum la feria periodo. La 25-an de nov. la loka ĵurnalo aperigis informplenan artikolon pri Esperanto kaj niaj anglaj vizitantoj Nell kaj Russell Hamilton.

La 28-an de novembro en la hejmo de Edna Giles, Betty Cleminson montris lumbildojn pri la kongreso en Antverpeno kaj la Post-Kongreso, ankaŭ pri diversaj lokoj survoje tien. Betty ĝuis gastigadon de pluraj Esperantaj geamikoj, kiujn ŝi renkontis dum antaŭaj kongresoj.

Manly-anoj volas preni la okazon dezi al ĉiuj "Feliĉan Kristnaskon" kaj ĉion bonan en la Novjaro.

—Eunice GRAHAM.

● **KANBERO:** Klubanoj organizis ampleksan ekspozicion en la kadro de la Konferenco pri Nacia Lingvo-Politiko, organizita de la Federacio de Etnaj Konsilioj de Aŭstralio (29-31 okt., 1982). Ĉirkaŭ 100 konferencanoj vizitis nian ekspozicion, inter ili Kevin Smith kun edzino.

La 1-an de novembro okazis en nia klubejo "Franca Vespere". Membroj rigardis ekspozicion de franca literaturo

en Esperanto. Sam Ellyard paroladis pri la urbo Rheims, kie situas fama katedralo kaj kie oni fabrikas famajn ĉampanojn. Marj. Ellyard rakontis pri problemoj dum somero en Parizo, kiam francoj forlasas la urbejon kaj turistoj invadas ĝin. S-ro Ralph Harry prezentis filmon pri Parizo.

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita .....	\$567
F-ino Win Addis, Adelaide ..	10
S-ro Herbert Koppel, Melbourne	3
S-ino Fay Koppel, Melbourne ..	3
S-ino E. J. Ballinger, Horsham ..	20
Ges-roj T & I Einhovici, Perth ..	10
	<hr/>
	\$613

The Australian Esperanto Association is an independent organization which does NOT receive any Government Subsidies or donations from any source whatsoever.

Our strength comes from our faithful members only. If you desire to receive in 1983, more than eight copies of our magazine, please support the "Australian Esperantist" Support Fund.

## F O L I O J

Gardenuloj en Kanbero  
Post somero, en aŭtuno  
Kiam velkas krizantemoj  
Vidas decidaŭjn arbojn  
Faligantajn la foliojn  
Veas: "Malbenita tasko!"

Turistantoj al Kanbero  
Post somero, en aŭtuno  
Venas vidi belajn florojn  
Miras je folikoloroj  
Buntajn fotobildojn faras  
Diras: "Ja ĝi estas bela!"

Vizitantoj en la vivo  
Povas ĝui ĉiun sperton  
Verdon novan de printempo  
Laborvivoton de somero  
Kadukiĝon de aŭtuno  
Eĉ trankvilon de la morto!

—ROLO.

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 22. — KEVIN GOODHOPE SMITH

#### The Compleat Linguist.

If you want to know the Aramaic word for camel or how to say "Good day" in Pushtu or how to write in Vietnamese, ask Kevin Smith. In the unlikely event of his not knowing, he'll pretty soon find out.

This wealth and breadth of erudition come largely from his experience — as a teacher and executive—in the language section of the Commonwealth Education Office. In Kevin's case, the twain—West and East—**have** met, for his academic background was in European languages.

Kevin matriculated as an adult and in due course graduated B.A., Dip. Ed. in French, Italian, Psychology, Education, History and Music. (He later qualified for his Ph.D., Esperanto, at the Independent University of Australia.) He then proceeded to teach for 3 years in secondary schools in N.S.W.

In 1954, Kevin's "itchy feet" (and the S.S. Stratheden) took him to Marseilles, Paris and Italy. He obtained a position of "English language assistant in French High Schools and Colleges. He was 4 months at Pau in southern, (Pyrenees) France, and then in the "College Classique et Moderne" in Romnas (Drome). In 1956 he married Raymonde Devrainne, a peacetime rose of Picardy. The outcome of this interlingual union has been two bilingual daughters.

On his return to Australia in 1960, Kevin started employment as Commonwealth Education Officer, North Sydney. Here he did linguistic research and preparation of materials for the teaching of French and for the teaching of English to adult migrants. In 1965 he began full-time teaching of English to Colombo-Plan students from Vietnam, Laos, Cambodia, Afghanistan, Bhutan, etc. His merit and skill were recognised in 1975 when he was given the post of Counsellor at all levels — secondary through to post graduate — to Private Overseas students, and for some years prior to his retirement (sic) in 1981 was responsible for the administration of English courses for Colombo-Plan students. Nowadays he does some part-time teaching of Eng-

lish to migrants, and is avidly doing a course in theology.

So much for Kevin the academic and pedagogue. What of Kevin the man? He's an urbane gentleman with catholic interests. Yes, this is a pun, for he has a very Catholic background, having received all his primary and secondary education in Catholic Schools and Colleges: he is a Lay Preacher and a keen, practising Catholic. However, he is most ecumenical in outlook and is pursuing his theological studies at an Anglican College.

He plays the piano—mainly by ear. He reads History, Archaeology, Current Affairs, Comparative Religion, and practically everything else that can exercise the mind of man. He's a member of Amnesty International, and of the Jewish-Christian study centre. His friends include Quakers and Salvation Army Officers.

What of Kevin the Esperantist? He speaks Esperanto so fluently and lovingly that it sounds like his mother tongue. It all began in 1936, when, as a teenage reader of science fiction he encountered the name "E. peranto". (Let's hope the accent was on **science** rather than fiction!) So, when he read a Brisbane newspaper article about the Esperanto activities of Maurice Hyde in New Guinea, he wrote for further information. In a charming letter, a Miss Carrick replied, inviting Kevin to a picnic with her and 2 or 3 beginners in her class. Thus began his association with Esperantists, — an association main-trained until now, when he is a member of the Manly Club, U.E.A., A.E.A., and the N.S.W. Federation.

Unfortunately, being a boarder in Nudgee College, Kevin couldn't regularly attend classes so he bought a "ĉifosilo" and "Esperanto for Beginners" by Montague C. Butler (still in use.) From then on, Kevin was self taught and self schooled, buying secondhand textbooks and doing all the written exercises.

During the War, contact was made with the Sydney Esperanto Club, where

Paul and Kathe Schwerin, the Matasins and Wre. Chandler especially befriended the young soldier. He gained the diploma of the B.E.A. after passing the Pyke Memorial Examination.

Through Esperanto, Kevin has received and at times dispensed (with Raymond's help) hospitality in France, Holland, England, Spain, Italy and Switzerland. He is convinced that Esperanto is a bridge. It makes an otherwise irreplaceable contribution to the cause of peace and friendship.

—ARTHUR COCKING.

● **La 69-a Japana Kongreso de Esperanto** okazis fine de aŭgusto en la urbo Kamakura. Partoprenis, 344 esperantistoj inter ili ankaŭ eksterlandanoj el 9 landoj. D-rino Flora Szabo-Felso, Ĝenerala Sekretario de UEA, prelegis pri "Kion celas UEA?"; H. Frank, Germanio prelegis pri "Kibernetiko kaj la Internacia Lingvo" kaj S-ro H. Sakaedo pri "Orient-Eŭropaj Landoj".

La 70-a jubilea kongreso okazos venontjare en Kameoka, urbo kie troviĝas la Oomoto-centro.

● **Monda Komunika Jaro:** Temo de la venontjara 68-a Universala Kongreso de Esperanto estos "Sociaj kaj Lingvaj Aspektoj de la Moderna Komunikado". La kongreso okazos en Budapeŝto de la 30-a de julio ĝis la 6-a aŭgusto, 1983. La kongreso dediĉos apartan atenton al la interrilato de lingvo kaj komunika teknologio. La temon oni elektis kiel kontribuon al la Monda Komunika Jaro.

● **Esperanto-Reprezentanto ĉe UN-Konferenco:** D-ro H. M. Maitzen, aŭstria astronomo, reprezentis U.E.A. ĉe la Dua Konferenco de UN pri la Paca Utiligo de la Kosmo, kiu okazis en Vieno en aŭgusto. D-ro Maitzen emfazis la gravecon de "la principoj de egaleco de nediskriminada konduto kaj reciproka respekto" en la internacia agado en la kosmo. Tiuj principoj, laŭ D-ro Maitzen, estas aplikendaj ankaŭ en la lingva demando.

● **Esperanto-Kursoj ĉe la Novjorka Oficejo de UEA:** La Esperanto-Klubo de la Oficista Konsilio de UN malfermos

sian aŭtunan kurs-programon por oficistoj kaj funkciuloj de UN-misioj kaj registaraj organizoj.

● **Esperanto-Poŝtmarko:** La Esperanto-poŝtmarko speciale eldonita okaze de la Universala Kongreso en Lucerno, 1979 atingis eldonnumbron de 7,988.000 ekzempleroj. Kvankam tiu granda eldonnumero signifas bonan reklamon por Esperanto, la filatelista valoro de la poŝtmarko estas nun tre malgranda.

● **Esperanto-Kulturdomo 30-jara:** La Esperanto-Kulturdomo de la francaj esperantistoj, Kastelo Gresillon festas ĉijare sian 30-an datrevenon. Ĝi konstruiĝis antaŭ 100 jaroj, en la jaro 1882. Kiam la esperantistoj aĉetis ĝin, ĝi estis tre malmoderna. Grade la kastelo modernigis kaj havas nun komfortajn du- kaj tril'itajn ĉambretojn.

Pluraj aŭstraliaj esperantistoj pasigis feliĉajn semajnojn en Gresillon. Se ankaŭ vi deziras iam aliĝi al la internacia vizitanto petu detalan programon de: **Esperanto-Kulturdomo, Kastelo Gresillon, F-49150 BAUGE (Francio)** ...

● **Esperanto en brazila universitato:** La konsilantaro de la Universitato de Rio Grande de Norte, Brazilo, aprobis la enkondukon de Esperanto. Profesoroj W. Pinheiro kaj E. Macie instruos Esperanton ekde la unua semestro de 1983.

## JIM kaj JENNY DIMO.

kiuj juŝ revenis al Aŭstralio post 21-monata vojaĝo tra Eŭropo, dum kiu ili vizitis 150 Esperanto-Societojn, estos pretaj prelegi en via urbo.

Post nelonge ili ekveturos per ruldromo kaj trairos Nov-Sudkimrujon survoje al Kvinlando.

Skribu tuj pri aranĝoj al:

21 Dawson Street  
Rochester, Vic., 3561

